

KATALUNA ESPERANTISTO

(L'ESPERANTISTA CATALÀ)

MONATA GAZETO, ORGANO DE LA



DUA EPOKO - JARO III^a : JANUARO 1923

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉ (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (i), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba

LA
article determinatiu

el, els
la, les

J
(sona j)
forma el plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN
sufixe per a formar
el femení

sinjorino, reĝino
katino, leonino

O
terminació
substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerç)

A
terminació
adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I
terminació verb
(infinitiu)

kompreni
labori
komerchi
(comercial)

E
terminació
adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

	AS	IS	OS	US	U
	<i>temps present</i>	<i>temps passat</i>	<i>temps futur</i>	<i>mode condicional</i>	<i>mode imperatiu o subjunctiu</i>
Mi	skribas	skribis	skribos	skribus	skribu
Jo	escric	escrigui	escriuré	escriuria	escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti* i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita.

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En Esperanto, tota paraula que reb l'acció d'un verb (complement directe) va seguida de la lletra **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius s'expressa per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakolo kaj Administracio:
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gataro*

Redaktoro: Jaume Grau Casas

FELIĈAN JARON 1923

AL LA MEMBROJ DE

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

KAJ AL LA

TUTMONDA SAMIDEANARO

DEZIRAS

LA KOMITATO

Als esperantistes catalans

EA dos anys, en emprendre'ns la tasca de fer reaparèixer la revista «KATALUNA ESPERANTISTO», portaveu de la nostra Federació, creguerem seguir la seva tradició donant-li un caient netament literari i publicant-la gairebé totalment en la llengua internacional.

D'altra banda, això ens era imposat pel fet d'ésser la Federació Catalana d'Esperantistes la organitzadora dels Jocs Florals Internacionals, que tan bellament són celebrats durant els nostres Congressos, i que cada any enriqueixen la literatura esperantista amb bon nombre de composicions en vers o en prosa, la sola publicació de les quals és suficient a omplir les planes de «Kataluna Esperantisto».

El nostre criteri segueix essent el mateix; creiem, però, que l'inserció d'articles de propaganda en la nostra llengua nacional esdevé cada dia més convenient, si volem assolir una major difusió de l'Esperanto a Catalunya, principalment en esferes intel·lectuals.

Amb aquesta finalitat, des d'avui serà redactada la nostra Revista en català i esperanto indistintament. En català, donarem informacions serioses i documentades sobre els progressos en l'adopció de l'Esperanto com a llengua auxiliar internacional, començant en el pròxim número la publicació en fulla apart del Rapport del Secretari General de la Societat de les Nacions, aprovat unànimement en la darrera Assemblea, sobre els resultats d'una enquesta oficial d'aquell organisme relativa a l'estructura, difusió i ensenyament públic de l'Esperanto; seran inserits també articles de propaganda i estudis semblants al famós «Essència i pervindre de l'idea de llengua internacional», de la «Fundamenta Krestomatio», que tenim en curs de traducció. En esperanto, seguirem publicant els treballs premiats en els Jocs Florals Internacionals, ultra excel·lents traduccions de literatura catalana, i tot allò que afecta la vida interna dels esperantistes.

Mes, per a poder realitzar aquests propòsits i atényer en la nostra tasca la màxima eficàcia, ens cal la col·laboració decidida dels esperantistes catalans.

Per mitjà d'aquestes ratlles ens adrecem a tots, demanant l'ajut econòmic, car les quotes anyals dels adherits a la Federació no deixen prou marge a despeses de propaganda. Esperem que els més entusiastes voldran encoratjar-nos amb l'espontània tramesa de donatius.



Kongreso de Iberaj Esperantistoj en Valencia

Niaj Valenciaj amikoj preparas por Pentekosto (dum venonta Majo) Unuan Kongreson de Iberaj Esperantistoj, kiu, espereble, atingos grandan sukceson. Ankaŭ ni esperas ke tiu kongreso estos partoprenata de granda nombro de Katalunoj.

Kvankam la organizantoj alnomas tiun okazontan Kongreson «Unua», ĝi fakte ne estos la unua kunveno de Iberaj esperantistoj, ĉar estas jam okazintaj kun pli-malpli da sukceso «Unua Kongreso de Hispana Esperantista Konfederacio» (Reus 1916), «Unua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberaj Landoj» (Barcelona 1920) kaj «Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberaj Landoj» (Zaragoza 1921).

Ni deziras ke tiu ĉi kunveno estu pli fruktodona ol la antaŭaj, kaj ni ĝojos se fine montriĝos ebla la ree malsukcesinta kunligo de esperantistaj fortoj en la Ibera Duoninsulo.

X^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Manresa : 1-2-3 Aprilo 1923



RE sukcese disvolviĝas la organizado de nia proksima solena jarkunveno.

Ni volas honori ĉi tie la nomojn de la entuziasmaj samideanoj el Manresa, kiuĵ plene sin oferas por la preparo de la Deko Kongreso.

ORGANIZA KOMITATO

Prezidanto: S-ro Josep Albagés

Vic-prezidanto: S-ro Felip N. Pujadas

Kasisto : S-ro Angel Llobet

Sekretario: S-ro Joan Oliveras

FAKOJ:

S-ro Francesc Pijoan

S-ro Alexandre Badia

S-ro Artur Torrents

Ili ĉiuj apartenas al la loka Grupo «Bela Espero», fondita antaŭ unu jaro de la Kongresa Prezidanto S-ro Albagés.

Honora Komitato estos baldaŭ ŝtarigata, konsistanta ĉefe el la urbaj aŭtoritatuloj, kies protekto estos tre efika al la celoj de la Kongreso.

Ĉiusemajne raportas pri la estonta manifestado de Esperantismo en Manresa, la lokaj ĵurnaloj «Pàtria» kaj «El Pla de Bages» kaj ankaŭ la ceteraj.

Estas preparata la programo de la Kongresa festaro, kiu antaŭvidiĝas tre interesa kaj alloga. Krom la kutimaj Floraj Ludoj, Oficiala Festeno, Esperanta Diservo, Ekskursoj, k. t. p., okazos pluraj eksterordinaraj festoj, plene plaĉaj, speciale aranĝitaj de la Manresanoj.

La Kongresaj laboroj konsistos el malfermo de Propaganda Ekspozicio, okazigo de Esperantaj Ekzamenoj kaj la ordinara Labora Kunsido, al kiu oni dediĉos tutan posttagmezon. En ĝi oni devas solvi la demandon pri reformo de la Federacia regularo.

La Direkta Komitato de K. E. F. atentigas la federacianojn pri tio, ke ili devas sendi ĉiuspecajn gravajn proponojn diskutotajn ĉe la Kongreso, al la Sekretario S-ro Romà Guardiet, antaŭ la 1^a de Marto.

Ankaŭ estas petataj anonci sin antaŭ la Kongreso, tiuj kiuj volas ekzameniĝi kaj akiri la diplomojn pri «Kapableco» kaj «Profesoreco».

Fine ni rekomendas al la Grupoj ke ili helpu la aranĝon de la Ekspozicio, per sendo de taŭga materialo al la Kongresa Komitato.



IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

LISTO DE RICEVITAJ VERKOJ

1. Alta celo postulas grandan laboron. — 2. Sama devizo (versaĵo). — 3. Mezmara libera vojo. — 4. Dolĉa rigardo ravis min. — 5. Lasu la versfaradon al poetoj! — 6. Ĉio estas necesa kio okazas. — 7. Al la verda stelo, eterna fidelo. — 8. Dolĉe kaj dece estas pro patrujo morti. — 9. Simbolo. — 10. Feliĉa kiu scios estimi intelekton. — 11. Treballem puig el treball és vida. — 12. Fiat Justitia. (Daŭros)

Ni dankas la gazetojn «Esperanto Triumfonta», «Belga Esperantisto», «The British Esperantist», «La Progreso», «Itala Esperantisto», «Literatura Mondo» kaj «France-Esperanto», kiuj bonvolis represi tute aŭ parte la Alvokon al la Floraj Ludoj.

Sanga Nokto

(7 Junio 1640)

Dies irae, dies illa

Patroland' Katalunujo,
 nokten iĝis taga bril',
 se nuntempo estas nigra
 estontec' ankoraŭ pli.
 Arbojn sur vojoj kaj grenon
 sur eben' aŭ montdekliv'
 tagon post tago surverŝas
 sang' de iu via fil'
 ĉar mortigas ilin ĉie
 soldatar' de reĝ' Filip',
 kvazaŭ el ras' via esti,
 estus la plej nigra krim'.
 El filoj, kiuĵn vi nutris,
 nur unu ĝuas je ind',
 nur li povanta vin helpi,
 nur li via torturist'!
 Grafo de Sankta Koloma,
 malben' por via naskint'!
 Ve, ke el fulmoj ĉielaj
 ne vundis vin la furi'!
 Tago, kiam vi naskiĝis,
 estis tag' de malfeliĉ';
 estus por patruj' pli bona
 la naskiĝo de skorpi'!
 Certe vi rodis la mamon
 de la via nutristin',
 ĉar nur lakton al vi donis
 anstataŭ venenon ŝi;
 ĉar vin vidinte sur tero
 ŝi vin ne pelis el ĝi,
 vin tra la voj' de l' anĝeloj
 sendante al paradiz'.
 Tiel ne devus ĝin fari
 land', kiu grandigis vin,
 nekredante, ke por pago
 vi ĝin subjugos per lig'.
 Vi vidis fortiri filojn

el la brakoj de patrin',
 forpuŝatajn el la mondo'
 pro la plezur' de mortig',
 dum nestfaris fremdaj trupoj
 en brakoj de la naci',
 serajloj, tombejoj l'urbojn
 farante pro la milit'.
 Ja de l' patrujo la plendojn,
 ja la ĝemojn aŭdis vi,
 ja vi vidis manligitan
 ĝin, kvazaŭ voja rabist';
 sed bastarde ne atentis
 vi pri patrina sopir',
 kaj permesis malbonkore
 ke streĉiĝu la ligil',
 kaj ke iĝu ĝia krono
 junko pika sur temp'i',
 kaj la ora sceptro, kano
 per kiu vi frapas ĝin.
 Se ĝia kruco tro pezas,
 almetas aliajn vi,
 kaj nur galon kaj vinagron
 donas al ĝi por soif'.
 Se ĝi montras siajn vundojn,
 turnas vizaĝon kun rid',
 se vi ilin ne disŝiras
 kvazaŭ per ungoj de tigr'.
 Ĉenojn vi metis al Serra,
 al Vergos', al Tamarit',
 kaj nur pro tim' ne kuraĝis
 peti morton de Klaris'.
 Sed' haltu! De malbonfaroj
 pleniĝis jam la sufiĉ';
 vole de l' martir' - patrujo
 alvenas nokto de l' fin'.
 Punon ĝi nun jam ricevas,
 je ĝi, do, estas maltim':

almenaŭ se oni punos,
tio estos sen insid!
Jam aŭdiĝas sur ĉefstrato
kiel sovaĝa longkri'
trumpet', pro kiu en manoj
de popol' brilas falĉil'.
Ili ĝin ŝvingas malame,
kaj ĉe ĝia kruda tint'
post ĉiu frap' kelkaj kapoj
ruliĝas sur la pavim'.
Ve, la sango tiel arda
ebriiĝas kiel vin':
kiu trinkis unu guton,
nek river' satigos lin.
Kaj respondas la najbaroj
la alvokon al mortig'
per, ĉe fundo de l' butikoj,
denta kaj muela grinc'.
For survoje! For survoje!
krias dum falĉilo-ŝving',
klopodante ĝin akriĝi
sur kolo de malamik'.
For survoje! For survoje!
aŭdiĝas en alto dir',
ĉar *nank, nank*, laŭte sonoras
en preĝejturo de l' Pin'.
Pordoj defalas sur teron,
sangas seĝaro kaj lit',
kiu dormas, ne vekigigas;
se maldormas, ve al li!
Petoj kaj larmoj ne taŭgas,
ne taŭgas ĝemo, nek kri',
ĉar iras pli furiozaj,
kien aŭdiĝas sopir'.
Pravas tie nur la glavo,
leĝon faras la dezir',
kaj oni ja tiel agas
pro, de l' mortantoj, ekscit'.
Tie l' viroj de Sankt-Cilja,
de Rok-Ginart tie ĉi:
fajrerumas per okuloj
ili pli, ol torĉa bril'.
Deputitoj iras meze
de la popolo por gvid',

kaj antaŭ ili sur stango
la kapo de malamik'.
Tro forta estas revengo,
barcelon-popol' falĉist',
tro forta estas estinta,
ĉar da gren' restas nek spik'.
Restas la malbona Grafo:
pretiĝu li al destin',
ĉar por trinki sangon lian
je vin' ne estos soif'.
Krias antaŭ lia domo
—Enen!—kun arda indign'
aroj da homoj sovaĝaj
en infera kunmiksiĝ'.
Je pecoj falas sur plankon
pord', kiun fermis riglil';
oni ŝtuparon surgrimpas
kiel malbona spirit'.
En ĉiu angul' lin serĉas
venenoplana skorpi',
kiu rompus eĉ la feron,
se per fer' li kovrus sîn.
Nek ŝtonon, nek meblon lasas
timante pro artifik';
kion lertec' ne atingas,
frakasas peza hakil'.
Sed se blasfemis enire,
blasfemas pli dum elir',
ĉar el la kaĝ' frakasita
estas fluginta la bird'.
Kaj la amaso, brulanta
pro l' malsukcesa sciig',
reiras al mur', tra kie
li forkuris laŭ la dir'.
Je centopoj alŝutiĝas
tien, po cent kaj po mil
dezirante lian bruston
vundi per sia armil'.
Unuj ĉe l' pordo restadas,
por kontrolo de l' elir';
kamparon iras aliaj
malluman kiel pupil'.
Kiuĵ iras tra kamparo
nur divene serĉas lin;

sed kun obstin' rigardinte
vidas lin en malproksim'.
Kaj kvin apud li troviĝas
hazarde dum la ating';
kvin tranĉilojn ili portas,
lin trapikas ĉiuj kvin.

De Sankt-Bertran' en ĝardenoj,
malsupre de Monguik',
sur amas' de ŝtonoj staras

kruco de pinarba lign'.
Tien iru, montarano,
iru, barcelona-fil',
preĝi unu Patro-nian
por l' estinta torturist'!

JACINTO VERDAGUER

El kataluna lingvo tradukis
JOSEP GRAU CASAS



Stranga Danco

Ne vant', amuz',
sed sankta Muz'
inspiras min por kanti,
per sorĉa fort'
de l' dolĉa vort'
al versoj rimojn fandi.
Tintante kante trilas rim'
en fund' profunda de la sin'
kaj ride — spite la reten' —
jam vibras vive la poem'.

Se arda flam'
per arta man'
sur liro lule ludas,
Vi, mia kor',
en tia hor'
ravite mire mutas.
Multfoje ĝoje, se minut'
agordas kordojn de l' liut',
senhalte alte vokas pet'
al versaj formoj de l' poet'.

Se ĝema sent',
gehena tent'
la koron torde mordas,
konsolon por
la sola kor'
la Muzo verse portas.
Jen larme svarmas rim' post rim'
dolore plore en la sin',
jen vigle tiklas rida son'
por verki versojn per krajon'.

Ne vant', amuz',
sed sankta Muz'
min igas versojn forĝi,
por dia ben'
per pia pen'
en korojn amon sorĉi.
Aklama amo de la lir'
senpene venas per inspir'.
Modeste festas ritma danc'
de l' rimo kaj de l' asonanc'.

JULIO BAGHY

La kalikota vesto



UR sia larĝa seĝego, sidas apud la fenestro la avino. Armita per akra tondilo, rajdantaj sur la nazo la okulvitroj, punkton post punkto, ŝi malkudras zorgeme la trouzitan tegajon de sia piedkovrilo.

Ĉirkaŭ ŝi, kliniĝas super brodaĵoj tri blondaj kapetoj. La silento estas kompleta. Ĵkra-kra-kra! diras la tondilo, ĵtik-tik-tik! la kudriloj balbutas kiel raŭka cikada kantaĵo, kiu akompanas la iluziajn ideojn de la junaj nepinoj de la avino.

Ankaŭ la avino revas. La revoj estas propraj de ĉiuj aĝoj...

Sed la fantazioj de la junuloj flugas ĝis la estonteco, kontraŭe tiuj de la maljunuloj returneniras ĝis la estinteco. La avino sopiras kaj ridetas samtempe... Io videbla nur por ŝi disvolviĝas inter ŝiaj okuloj kaj la teksaĵo.

—Ĵkiom da fervoro, avineto!—ekkrias subite Marino, la plej maljuna el la tri fratinoj, kvazaŭ ŝi vekigis ektimigita.—Kial vi ne lasas tian malplaĉan laboron al la servistino? Vi sufokiĝas de laciĝo.

—Ne grave—respondas la avino, kies vangojn ruĝigas la pala karmino de la vintraj rozoj.

—Tre bone mi konas Justinon... Ĉion ŝi dispecigus, ŝi lasus tiun ĉi teksaĵon kiel netaŭgan ĉifonaĵon; kaj mi ja deziras konservi la restaĵojn...

—Ĉu de tiu malbela kalikoto?—interrompis Liso.—Sed, avineto, ĉu vi ne vidas ke tiu teksaĵo estas tute disŝirita?

—Ĉu vi avariĝas, avineto?—ekkrias Liano, la plej juna el la nepinoj, kun ia komika teruresprimo aperinta en ŝia vizaĝo.

Kaj la tri nepinoj gaje ekridegis.

—Marino scios trovi la manieron savi pecon sufiĉan por kovri mian «Imitacion»—respondis trankvile la maljunulino.

—Ĉu el tiu maldelikata katunaĵo?—protestis la junulino—Ĵestus tre malbelege! Prefere mi deziras brodi al vi belan veluran tegilon.

—Dankon, infanino—dolĉe respondas la avino;—ĝi ne valoras la pecon. Tiu ĉi malnova kalikoto daŭros, se Dio volas, tiom kiom mi mem, kaj dum mi vivos mi ne volos forigi ĝin... Je mia aĝo, inspiras profundan amon la objektoj konservantaj rebrilon de la estinteco... Sed, kial mi ne rakontos al vi tion kio okazis dum la tago en kiu mi ekuzis mian veston siringkoloran? Jam vi estas en la aĝo kompreni la nekalkuleblan valoron de kelkaj restaĵoj...

Rimarkante la malican rideton de la avino, la tri junulinoj iom ruĝiĝis.

—Sciu, ke el tiu ĉi milstria kalikoto, mi konfekciis, per miaj propraj manoj, veston destinitan triumfi en la edziĝofesto de mia kuzo Filiberto.

Mi esperis sukcesi en tiu kampara edziĝofesto. Mi vestis min laŭ tiuj fasonaĵoj de miaj antikvaj modaj gazetoj kiuj tiom amuzas vin: ŝuetojn kun bantoj, pintfiniĝantan korsaĵon kaj pagodajn manikojn malfermiĝantajn sur

belega kamizolo el brodita *nansuo*, rubandojn el nigra veluro en kolumo kaj manumoj, blankan ŝalon el ĥina krepo, nigrajn senfingrajn gantojn. Paj-la ĉapeleto garnita per rozaj floroj de akacio subpremis malforte miajn frititajn harojn.

Mi estis ravata de mi mem, kaj mi grimpis ĝoje la veturilon.

Ne estis eble al miaj gepatroj akompani min; sed — negrave... ĵiom da fojoj mi efektivigis tian mallongan vojaĝon! La bonega veturigisto gardis min, kaj kuzo Filiberto devis min atendi en la perono. — Ĵis la revido pan-ĵo! Ĵis la reveno ĵ aĉjo! — mi kriis inter la krakado de la vipo per kiu la rajdisto ekscitis la bestojn kaj surdiga bruado de tintiloj. Tremadis la vitroj de la veturilo pligrandigante la bruegadon, knaris la radoj, ektuŝegis kontraŭ la ŝtonoj la hufferaĵoj de la ĉevaloj, kaj miaj piedoj formikumis dancante anticipe ĉar la edziĝofesto de Filiberto estos io simila al tiu de «*Camacho*». Ni estos ducent, festenontaj dum kelke da horoj, kaj saltdaŭcontaj Ĵis kiam al la laciĝinta muzikisto falos la violono el la manoj. Mi renkontos tie multe da onkloj, onklinoj, kuzoj kaj kuzinoj el ĉiuj gradoj, krom grandega nombro da konatuloj; sed kio ĉefe maltrankviligis min, estis la viro estonta mia paro en la balo.

— Mi destinis al vi la plej belaspektan junulon el la edziĝofesto, la posedanton de nia akvomuelejo — estis dirinta al mi la onklino Gertrudo. Vane mi petegis... Ĉu ne estus malplaĉa afero aspekti dum tuta longa tago kiel fraŭlino pli aĝa kaj serioza ol mi estis, kontraŭ nekonatulo kiu eble timigos min, kaj Ĵuste tiam, kiam mi estis en la deksesjara aĝo en kiu oni deziras nur ridi kaj Ĵoji?

Dume, mi amuziĝis babilante kvazaŭ papageto kun la maljuna veturigisto. Sed Ĵkia urso estis tiu kunvojaĝanto sidanta dekstre de mi! Kovrita per sia mantelo, li elparolis nek unu vorton, kaj nek ankaŭ li prezentis al mi la manon kiam ni malsupreniris el la veturilo por supreniri piede krutan vojon. Tamen mi konsoliĝis kolektante florojn ĉe la deklivo, malseka de la roso.

Iom post iom, liberigis la suno de sia nubŝalo kaj mia najbaro de sia mantelo. Mi ekvidis lian brunan vizaĝon kontrastantan super blanka kolumo; kravato *à la «Colin»*, kaŝtankolora frako kun perlamotaj butonegoj, ŝalveŝto, kaj brodita ĉemizo laŭvice montriĝis. Ĉar mi lin kaŝe rigardis, niaj rigardoj renkontiĝis. Mi ruĝiĝis ĝenita ĉar li surprizis mian scivolemon, kaj mi turnis al li la dorson.

La ĉevaloj nun malsupreniris la deklivon kvazaŭ senbride, kaj mi spiris la freŝan venton kiu vipis mian vizaĝon, kiam okazis kataklismo. Kaleŝo, alvenante el transversa vojo, Ĵus ektuŝegis kun niaj ĉevaloj. La veturilo renversigis kaj subite la pejzaĝa aspekto ŝanĝiĝis. Mi kredis min Ĵetita al la ĉielo en la momento mem, kiam mi falis renversita sur la teron. Feliĉe, mia kunvojaĝanto, kiu alvenis rebatita sur la tero antaŭ ol mi, servis al mi kiel kuseno.

— Ĉu vi vundiĝis? — li demandis al mi.

— Ne; okazis ke nek li nek mi vundiĝis. Nur la siringvesto kaj la kaŝtana kolora frako havis ian difekton.

Kion diros la «ĝentila kavaliro», mi pensis, malĉifante kaj senpolvigante la ĉifitan jupon.

Ĉirkaŭ ni regadis nepriskribebla konfuzo: virinoj, kiuj plendis ĉagrene, infanoj, kiuj surdiĝis per siaj kriegoj, kaj ĝeneralaj plendoj, ĉar rompiĝis la akso de la veturilo kaj estis neeble daŭrigi la vojaĝon.

— Kiom da tempo mankas por alveni Thorigné'n? — demandis la vojaĝanto de la frako konsultante sian horloĝon.

— Unu horo tra la vojeto — mi riskis respondi, ĉar la kondukisto, nur okupiĝinta je siaj ĉevaloj, ne atentis la demandon.

— Dankon: rapidiĝante ankoraŭ mi alvenos akurate — murmuris la sinjoro, adresante al mi ĝentilan saluton kiun mi korespondis per riverenco.

Li foriris, kaj, ne rimarkate de li, mi sekvis lin iom distance. Mi ne kuraĝis peti al li ke ni iru kune, kvankam nia celo estis sama, kvankam mi iom timis piediri sola tra la dezertaj kampoj.

La gamboj de tiu junulo estis tamen tiel longaj kaj tiel facilmovaj ke baldaŭ li malaperis for de mia vido. Ĝuste tiam, almozpetulo kun timiga vizaĝo eniris post mi la vojon. La teruro pruntis al mi flugilojn, kaj kun granda plezuro mi renkontis denove mian kunvojaĝanton starantan meze de vojkruciĝo, — kaj treege ŝanceliĝantan. Li sin turnis, ridetis... sed mi devas konfesi ke dum mia vivo mi neniam vidis pli bonan nek pli sinceran rideton.

— Kiu el tiuj ĉi kvin vojetoj estas la konvena vojo por mi, fraŭlino? Ŝajnas al mi ke mi perdis mian vojon, kiel la hebreo ĉe la dezerto.

— Do mi servos al vi kiel lumiga kolono, — mi gaje respondis. — Ĉu vi iras al Thorigné?

— Jes: mi estas invitata al la edziĝo de Filiberto Barton.

— Ankaŭ mi.

— ĴHo feliĉa hazardo! — ekkriis kontenta la junulo.

— ĴKaj kia sorto por mi! — mi respondis plena de dankemo.

En tiu momento pasis la ĉifonulo, kaj mi rakontis la timon kiun mi sentis.

— ĴNeniom timu! — respondis mia kunvojaĝanto svingante sian bastonon kun argenta tenilo.

ĴHo! mi tiam jam timis nenion. Mi sentis konfidon, eksterordinaran sekurecon. Kaj, kiel dece silenti por mallongigi la vojiradon? ĴHo la vojirado! La aprila suno ridetis tra la branĉaroj, la plektobariloj estis superŝutitaj de ruĝaj floroj de kratago, kaj la merloj fajfis kvazaŭ konkurence. Mi estis kuraĝiĝinta, rimarkinte ke la junulo de la frako estis pli timema ol mi... Sed ĵkrak! subite la suno estingiĝas kaj fortega subitpluvo falas sur nin. Feliĉe, mi estis kunportinta el mia hejmo verdsilkan pluvombreton... Kaj, ĉar ne estus helpeme nek korekte profiti mi sola tian ŝirmilon, mi proponis al li ke li akceptu ĝin... kiam samtempe li prezentis al mi la brakon.

— La pluvo post la polvo! — mi diris — ¡Certe, mia kavaliro rifuzos danci kun mi! ¡Domage! ¡Kaj li estas la plej ĝentila viro el la edziĝofesto!

— Kaj mi, estis havonta kiel paron la plej belan fraŭlinon el la sekvantaro! — respondis la junulo, ridante. Per kiaj okuloj ŝi rigardos tiun ĉi malpurigitan frakon?

Ni ambaŭ ridis gaje.

Ankoraŭ ne estis ĉesinta la pluvego, kaj tial ni iris ankoraŭ brakon ĉe brako, kiam ni ekvidis la domon de Filiberto kaj lin en la porda sojlo.

— ¡Tie ĉi ili estas, tie ĉi ili estas! — ekkriis mia kuzo svingante sian ĉapelon.

Kaj kiam mi alvenis apud lin, li malice flustris al mia orelo:

— Nu, mi jam vidas ke vi kunrilatiĝis kun la kavaliro kiun mi destinis al vi kiel paron. — Ĉu li plaĉas al vi? Ĉu vi volas ŝanĝi?

— Kiel? Ĉu tiu junulo estis la ĝentila kavaliro kun kiu mi estis danconta? — mi pensis kortuŝite.

Ne: vere mi ne havis ian kialon por repuŝi lin: kontraŭe... kaj post ne multe mi akceptis lin ankaŭ por vojaĝo multe pli longa kiu daŭris la tutan vivon...

— Ĉu miaj filinetoj komprenas nun, kial mi havas tian amon al tiu ĉi modesta kalikoto? ¡Ha la antaŭaj, la bonaj, forpasintaj tempo! Ankaŭ vi iam rememoros ilin kiel mi. — ¡Atendu ĝis kvindek jaroj!

— Jes, — ekkriis energie Marino, — la plej bona tempo estas tiu, kiam...

Kaj ŝi finis la frazon ĉe la orelo de la avino, sur kies buŝo aperis kvieta rideto.

ELENA ALANIC

El hispana lingvo tradukis

ISIDRE TORRENTS



Lingvaj Respondoj

laŭ la vulgara scio kaj saĝo de Iu Aĵn

PRI LA RADIKO *ALI'*

La radiko *ali'* povas esti substantivigata (alio), adjektivigata (alia) kaj adverbigata (alie).

Sed rimarku, ke *alio* egalvaloras kiel *o alia*, sed ne kiel *io alia*, laŭ era-ra supozo de kelkaj samideanoj. Do ekzistas delikata nuanco inter «Vi ne faras alion ol malhelpi» kaj «Vi ne faras ion alian ol malhelpi».

Se ni uzus la radikon *al'* antaŭ io, iu, ia, ies, iom, iam, iel, ial, ie, same kiel ni uzas «nen», «t», «k», aŭ «ĉ», tiam ni havus, ekzemple, *aliiu*, *aliies* kaj *aliiel*, sed tute ne *aliu*, *alies* kaj *aliel*, kiuj estas nekorektaj kvankam ilin uzis iu samideano. En tiuj tri lastaj nekorektaj formoj, antaŭ la sendifinaj *iu*, *ies* kaj *iel* estas uzata la prepozicio *al* sed tute ne la radiko *al'*.

Kun larĝe tolerema spirito, ni povus konsenti la formojn *aliiu*, *aliies* kaj *aliiel*, sed ni preferu super ili *iu alia*, *de iu alia* kaj *alimaniere*.

ALIAJ, MULTAJ, KELKAJ

Ĉi tiuj tri adjektivoj bezonas akompani iun substantivon. Tamen, tre ofte ni antaŭsupozas tiun substantivon (homoj, samideanoj, aŭtoroj) kaj tiuj adjektivoj vidiĝas solaj en la esperantaj frazoj. Ekzemple: «Kontraŭ la nuna lingva reformemo, kelkaj protestas, multaj silentas kaj aliaj simple amuziĝas, vidante tiom da malsaĝaĵoj». Laŭ la ĝenerala uzado, do, la formoj *aliaj*, *multaj* kaj *kelkaj* estas tute korektaj. Kaj pro tio ni konsideras superflujaj la esprimojn: *aliuj*, *multiuj* kaj *kelkluj*.

ĈU BOVO, BOVVIRO AU VIRBOVO?

Ankaŭ ni povus simile demandi: ĉu kato, katviro aŭ virkato? kaj tiel plu pri ĉiuj bestoj.

Bovo estas per si mem virseksa. *Bovino* estas virinseksa. Tamen per *bovo* ni povas paroli pri la *bova speco* ĝenerale, sen diferenco pri seksoj.

Viro signifas nur *virseksulo* kaj ne montras al kiu animala speco apartenas tiu virseksulo. Pro tio ni devus diri *homviro* kaj *homvirino* anstataŭ *viro* kaj *virino*. Tamen, estas kompreneble ke ni, homoj, kiam ni parolas pri anoj de nia propra speco, ni diras nur: *viro* aŭ *virino*. Ĉe la kata respubliko, eble oni diras «niaj virinoj» aludante la katinojn.

Bovviro estas uzata kiam oni timas ke *bovo* estos komprenata en senco de *bova speco*, aŭ kiam oni volas pliakcentigi la ideon pri vira sekso de la bovo. *Bovviro* egalvaloras kiel *bova viro* aŭ *viro de la bova speco*.

Virbovo estas ankaŭ uzata esprimo, kun signifo de *vira bovo* aŭ pli bone *vira bovbesto*.

Ni pli ŝatas la esprimon *bovviro* ol *virbovo*, ĉar el *bovviro* ni povas facile kaj klare formi *bovvirino*. Kontraŭe, kion ni formos el *virbovo*? Ĉu *virbovino*? Ĝi estas nelogika. Ĉu *virinbovo*? Ĝi estas stranga kaj malpli bela ol *bovvirino*.

Bibliografio

UNUA KURSA LEGOLIBRO, kompilita de W. M. Page, F. B. E. A. Numero 2 de la Kolekto de Brita Esperantista Asocio, 17, Hart Street, London W. C. 1. Prezo: 4 respondkuponoj.

Kolekto de anekdotoj kaj humorajoj, ĉerpitaj precipe el «The British Esperantist» kaj «The Esperanto Monthly». La legaĵoj estas aranĝitaj laŭ gradoj de malfacileco. Tiu ĉi legolibro, 24-paĝa, estas tute rekomendinda.

AMA STELARO, tradukaĵoj kaj originalaĵoj de «La Forgesito». Eldonis: Oskar Ziegler & Ko., Marktredwitz (Bayern) 1922.

120-paĝa libreto kun du unuaktaj komedioj, tradukitaj el la portugala lingvo, kaj aliaj legindaĵoj. Bona stilo.

LA LEIPZIG-A FOIRO (Printempo 1923). Bela propaganda broŝuro pri la fama Foiro, kun multaj bildoj el Leipzig. Tute redaktata en Esperanto.

ESPERANTO IN TWELVE LESSONS. Lernolibro kun la Gramatiko simple aranĝita en dek du lecionoj, sekvata de dek du ekzercoj pri legado. De «Stella». Eldonis: B. E. A., 17, Hart Street, W. C. 1. 1922.

FIRENZE (Informoj pri la urbo). Flugfolio kun sciigoj utilaj al vojaĝanto, frazareto kaj prononco de italaj literoj.

LA DEMANDO PRI LA PLIBONIGO DE LA MUZIKSKRIBO KAJ GIA SOLVO PER LA AUTONOMA MUZIKNOTADO. Historio de la Muzikskribo kaj de la Ĉefaj provoj pri plibonigo, de L. Cogen, Vic-prezidanto de la «Belga Ligo Esperantista». Eldonis: «Biblioteko de la Autonomia Muziknotado», 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen (Belgujo). Prezo: Fr. 0'50.

KARLO, de Edmond Privat, kun antaŭparolo de Marie Hankel (Sepa Eldono). Esperanto-Verlag, Berlin S. 59, 1922.

Bonega legolibreto kun malgranda romano tre delikata kaj alloga. Stilo modela.

ESPERANTO KATECHISMUS.

Germanlingva propaganda broŝureto, de Hanns Sappl. Eldonis: Paulusverlag, Karmeliterplatz, 5, Graz (Aŭstrujo).

RAKONTOJ EL LA BIBLIO, laŭ la traduko de D-ro L. L. Zamenhof. Eldonis: Brita Esp. Asocio, 17, Hart Street, London W. C. 1. Prezo: 1 ŝ. 4 p.

80-paĝa libro bonege presita, enhavanta kelkajn rakontojn el la Biblio, unuafoje presitajn sur «The British Esperantist».

VORTARO DE LA OFICIALAJ RADIKOJ DE ESPERANTO. Th. Cart. Kolekto de la Akademio. Eldonis: Esperantista Centra Librejo, 51, rue de Clichy, Paris. Prezo: 1 Franko.

32-paĝa broŝuro kun la jena enhavo: Klariga noto; El la «Deklaracio pri Esperantismo»; Konsiloj pri enkonduko de novaj vortoj en la komunan

lingvon; Plena gramatiko de Esperanto; Oficiala Radikaro (laŭ «Universala Vortaro» kaj la tri oficialaj aldonoj); Ĉefaj Landnomoj.

La aŭtoro petis, ke ni avertu pri la jenaj prezeraroj: *dud'* estu legata *duel'*; *duel'* estu legata *duel'*; *kiom* estu legata *kiam*. Ni rekomendas al ĉiu la akiron de tiu ĉi interesege verko, kaj ĉefe la atenton de ĝiaj konsiloj por la bono de nia lingvo.

J. G. C.

ENCIKLOPEDIA VORTARO ESPERANTA-GERMANA. Aŭtoro: Eügen Wüster.

Ĝus alvenis al miaj manoj propaganda folio de tiu ŝajne tre grava vortaro kiun preparas S-ro Wüster, kaj kiun eldonos la firmo Hirt & Son el Leipzig. La verko devas esti tre grava, ĉar S-ro Grosjean-Maupin, internacie konita pro liaj konoj de la esperanta lingvo, diras en letero al la aŭtoro adresita, «ke tiu ĉi verko kiu postulis kolosan laboron estos tre utila por la kompilado kaj definitiva starigo de la teknikaj vortaroj».

Mi ne dubas pri tio, post la vido de la specimeno de l' kolonoj de l' vortaro. Sed, dume, la aŭtoro permesos al mi fari kelkajn rimarkojn rilate la prospekton, kiun mi devas supozi *lia*. Kelkaj formoj estas tiom strangaj al latinaj oreloj, vortoj tiom malfacile kompreneblaj unuavide, ke mi ne povas lasi la okazon diri mian komenton.

«Laboraĵoj ĝise publikigitaj». Kial ĝise? *ĝis nun* kaj ĉiam *ĝis nun* Morgaŭ venos alia aŭtoro kiu diros «de Paris ĝise Londono» kun sama rajto.

«Ĝia esenco estas *alirebligo*»; korekta sed nekompenebla; pli bone rekonstruo, restarigo.

«Ĉiam enkrampa aldonado»; pli bone kaj pli korekte «interkrampa».

«Kontrolo pri la idea ĝusto»; pli bone «kontrolado pri la ĝusteco de la ideoj — almenaŭ por latinaj lingvuloj — .

«Ebligo de ĉiutempa memkontrolado per kunfonta enmanuskripta notado»... (?) Kunfonta = de pluraj fontoj? Enmanuskripta?

«Ĉiu deziranta koniĝi la esperantan lingvoprovizon». Tio estas libereco kiun mi unufoje vidas; «koniĝi la esperantan» oni neniam devus diri. Koniĝi — aŭ laŭ nia majstro — «konatiĝi kun la esperanta» estas la sola korekta esprimo.

«Ĉiu volonta propagandi en seriozaj rondoj, ĉar *maljam*...». Maljam? kion signifas «maljam»? Ĉu iam? Ĉu nun? Tiu vorto montras ĝis kia limo, certaj esperantistoj prenas la liberecon formi aŭ kunmeti vortojn. Ne pasos multaj tagoj kaj ni vidos «maljes» kaj «malne» anstataŭ ne kaj jes. Kaj tiam la esperantistoj havos la plej riĉan lingvon de l' mondo... kaj la plej absurdan.

Tiu «maljam» preterpasas la limojn de la lingva seriozeco.

La aŭtoro bonvolos pardoni; sed antaŭ la eldono de tiom talenta verko, kia ŝajne estos tiu kolosa vortaro, eble estus dece aŭ rifuzi la patrecon de l' reklamilo, aŭ iom korekti la stilon, kiu, laŭ mi montris, tiom deflankiĝas de l' klasikeco.

J. BREMÓN MASGRAU

L. K. por la Kataluna Lingvo.

XV^a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg

UNUA CIRKULERO

1. *Starigo de L. K. K.* La Loka Kongresa Komitato, elektita de la Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth, konsistas el jenaj personoj :

S-ro Dro Richard Ledermann, prezidanto (ĝenerala organizo)

S-ro Otto Pilhofer, la vicprezidanto (propagando)

S-ro Dro Heinrich Orthal, II^a vicprezidanto (gazetaro)

S-ro Max Hönigsberger, sekretario (financoj)

S-ro Lorenz Meyer (plezurajoj)

S-ro Emil Muscat (loĝigo)

S-ro Heinrich Nass (akceptejoj)

S-ro Alfred Meyer-Kirstin (oficejo).

2. *Adreso.* La oficiala leter-kaj telegram-adreso de L. K. K. estas: *Esperanto Nürnberg.* — Ĉiuj korespondaĵoj koncernantaj kongresajn aferojn, ankaŭ mensejoj, estu adresataj nur al tiu adreso.

3. *Aliĝo.* Samideanoj, dezirantaj aliĝi al la XV^a, estas petataj, uzi la aliĝilojn eldonotajn de la L. K. K. La aliĝiloj estos dissendataj pere de la tutmonda Esp. gazetaro, dum oktobro-novembro. Samideanoj, kiuj tiel ne ricevos la aliĝilon, petu ĝin de L. K. K.

Ĉar por bona prosperado de la kongresaj preparoj estas tre necese, ke la L. K. K. jam tuj en la komenco havu je sia dispono sufiĉe da mono, la samideanoj-aliĝontoj estas serioze petataj, kiel eble plej baldaŭ aliĝi kaj pagi la kotizon.

4. *Kotizo.* La Kongresa Kotizo, tre malfacile fiksebla en la nunaj valutaj cirkonstancoj, estos publikigata interkonsente kun la L. K. K., en la dua cirkulero.

5. *Fakaj kunsidoj.* Same kiel en antaŭaj kongresoj, okazos ankaŭ en 1923 specialaj fakaj kunsidoj. Pri eventualaj deziroj ni petas kiel eble plej baldaŭ informi la L. K. K.

Oficiala organo. Kiel oficialan organon de L. K. K. ni elektis la neŭtralan, sendepandan kaj ĉiusemajnan gazeton «Esperanto Triumfonta» kiu publikigos ĉiujn niajn pri-kongresajn komunikojn kaj transdonos ilin al la cetera Esp. gazetaro. Jen, laŭ nia opinio, la plej rapida kaj plej malkara vojo por diskonigi la kongresaĵojn al la tutmonda Esperantistaro.

Loka Kongresa Komitato

Dro Ledermann

Clau Esperanto

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeditada per la F. C. d'E.

Conté la gramàtica i vocabulari, amb text de propaganda a la coberta, relatiu als darrers progressos de la llengua internacional.

Preu: 10 cèntims

100 exemplars: 6 ptes.

Literatura Mondo

Monata gazeto, ilustrita, grand-formata, almenaŭ 20-paĝa.

Interesa enhavo kaj bonega stilo. Originaj esperantaj verkoj kaj tradukoj el ĉiuj lingvoj.

JARABONO : 12 PESETOJ

K. E. F. akceptas abonojn

Andrássy-ut, 81.

BUDAPEST

Th. Cart Kolekto de la Akademio

VORTARO

de la oficialaj radikoj
DE ESPERANTO

kun Antaŭparolo, la Fundamento kaj listo de la ĉefaj landnomoj

PREZO : 1 franko

Ĉiu esperantisto aĉetu ĝin!

Esperantista Centra Librejo

51, RUE DE CLICHY

PARIS

CURS PRÀCTIC DE LA LLENGUA

ESPERANTO

PER FREDERIC PUJULÀ I VALLÈS,

amb les regles gramaticals,
exercicis en Esperanto i en
Català, i vocabulari
Català - Esperanto.

SEGONA EDICIÓ

PREU: 0'75 PTES.

Federació Catalana d'Esperantistes

CARME, 30 - BARCELONA



23 GRUPS ADHERITS I 500 MEMBRES INDIVIDUALS

Aquesta entitat, fundada poc després del V Congrés Esperantista Universal a Barcelona, en 1909, amb l'objecte (Art. 2.^{on} dels Estatuts) *d'unir tots els esperantistes de terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto*,

CELEBRA anyalment, amb motiu de la seva reunió general, brillants Congressos Esperantistes, portant-ne ja 9 de realitzats a Sabadell, Tarragona, Terrassa, Olot, Sant Feliu de Guixols, Vilanova i Geltrú, Reus, Manlleu i Girona, i en preparació el desè a Manresa.

ORGANITZA els Jocs Florals Internacionals que són celebrats simultàniament amb els nostres Congressos, contribuint així a l'enriquiment de la literatura esperantista.

PUBLICA com a orgue federatiu la revista mensual «Kataluna Esperantisto», gratis per als adherits, en la qual apareixen interessants informacions sobre el moviment esperantista mundial, ultra excel·lents traduccions de literatura catalana i treballs premiats en els esmentats «Jocs Florals Esperantistes».

EDITA, a mesura de les seves possibilitats, opuscles de propaganda i ensenyament de la llengua internacional.

COL-LABORA a la celebració d'actes de propaganda, com conferències, obertura de cursos, exposicions, visites, etc.

ATORGA títols de Professor d'Esperanto, segons condicions estatuïdes en el II Congrés a Tarragona, i d'acord amb els membres catalans del «Lingva Komitato».

CUIDA, en general, de coordinar els esforços dels adeptes de l'Esperanto a Catalunya, i

REPRESENTA la nostra nació davant la Organització Esperantista i en els Congressos Esperantistes Universals.

ADHERIU-VOS-HI!

QUOTA ANYAL: 5 PTES.

KATALUNA ESPERANTISTO

(L'ESPERANTISTA CATALÀ)

MONATA GAZETO, ORGANO DE LA



DUA EPOKO - JARO IIIª : FEBRUARO 1923

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉ (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (i), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba

LA

article determinatiu

el, els

la, les

J

(sona l)

forma el plural

faktoj, manoj

okuloj, animoj

IN

sufixe per a formar el femení

sinjorino, reĝino

katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto

urbo

komerco

(comerç)

A

terminació adjectiu

blanka

antikva

komerca

(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni

labori

komeraci

(comerciar)

E

terminació adverbial

klare

konstante

komerce

(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

mode condicional

U

mode imperatiu o subjunctiu

Mi skribas

skribis

skribos

skribus

skribu

Jo escriu

escrigui

escriurá

escriuria

escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti* i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita.

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En Esperanto, tota paraula que reb l'acció d'un verb (complement directe) va seguida de la lletra **N**.

Li vidas min. Ell em veu.

Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escriv la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius s'expressa per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

Redaktoro : Jaume Grau Casas

Stranga procedo

SINJORO Teo Jung, eldonanto de la semajna gazeto «Esperanto Triumfonta», komencis sian entreprenon humile petante kaj akceptante la helpon de ĉiuj esperantistoj.

Sed, ju pli kreskis la sukceso de lia entrepreno, des pli fiera iĝis la tono de ĉiuj liaj diroj.

Jam multajn fojojn, ekdezirinte diri ion pri la sinteno de «Esperanto Triumfonta» antaŭ diversaj esperantistaj aferoj, ni fine decidis silenti. Agante tiel, ni kredis esti diskretaj kaj eviti helpi al la plikreskigo de tiom da malpacoj ekzistantaj ĉe la esperantistaro.

Sed ni ne plu volas deteni nin antaŭ ia ajn konsidero, nun kiam ni vidis novan specimenon de la tiom ofte ripetita maldiskreteco de S-ro Jung kaj lia gazeto.

Li permesas al si diri, — en la n-ro 123, 11^a de Februaro — , parolante pri niaj Lingvaj Institucioj: «Ni scias, ke la malnova L. K. konsistis grandparte el personoj tute netaŭgaj por tiu ofico,

kiuj nur pro sia rango aŭ nomo, aŭ pro tio, ke ili hazarde troviĝis inter la unuaj Esperantanoj, estis akceptitaj en la L. K.-on.»

Ni komprenas, post la malrespektimo montrita per tiuj vortoj de S-ro Jung, kial li antaŭe tiel arogante parolis pri la «gazetfonda febro» de tiuj, kiuj opinias ke la sola ekzisto de «E. T.» ne sufiĉas por la esperanta movado; pri tio, ke esperantisto estas «serioza» nur se li abonas la semajnan gazeton «E. T.»; pri la «devo» de ĉiu samideano aboni tiun gazeton, prefere al ĉiu alia, k. t. p. Ne estas strange ke S-ro Jung faris tiel akrajn «kritikojn», se li ne hezitas stariĝi eĉ kontraŭ la plej alta institucio en Esperantujo, kaj kuraĝas publike esprimi tian opinion pri la historio de nia Lingva Komitato kaj pri la «taŭgeco» de ĝiaj membroj.

Sed ni revenu al la frazoj de nia tondranta Jupitero-eldonanto. «Kelkaj el tiuj unuotempaj L. K.-anoj hodiaŭ apenaŭ scipovas Esperanton, ne apartenas al iu Esp. grupo aŭ asocio, ne abonas iun Esp. gazeton, ne skribas iun artikolon pri aŭ en Esperanto, mallonge — absolute nenion faras por Esperanto kaj tamen fanfaronas per sia titolo de L. K.-ano.»

Ĉu S-ro Jung submetis al ekzameño la 79 nunajn Lingvo-Komitatanon? Se iu el ili fanfaronas per sia titolo (ni ne scias kiamaniere povas fanfaroni tiuj L. K.-anoj kies nomojn «oni ne legis nek aŭdis de jardeko!»), tiu fanfaronado estas pli pardoninda ol la konduto de tiu, kiu pretendas agi kvazaŭ papo, estante apenaŭ ortodoksulo.

En alia parto de sia artikolo «Antaŭ elektoj por L. K.», (kaj tute kvazaŭ tiu elektado devus esti farata de la legantoj de E. T.), S-ro Jung ne hontas proponi kelkajn nomojn.

Ĉu decas kvazaŭ aranĝi elekto-propagandon kaj persone aljuĝi majstrecojn al siaj plej proksimaj aŭ konataj amikoj? Ĉu tia laboro estas farota de la gazetaj Redaktoroj aŭ de la Lingvo-Komitatanon?

Ni kredas ke oni devas havi pli da respekto al la Lingva Komitato, al la esperantistaro — kaj al si mem.

J. G. C.

X^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Manresa : 1-2-3 Aprilo 1923



CERTE niaj legantoj ĝojos sciigi, ke jam nun la sukceso de nia Deko Kongreso estas certigata. Sed ni devas atentigi, ke por ĝia plej brila disvolviĝo estas necese ke la Katalunaj samideanoj pretiĝu al grandara ĉeesto. Ni esperas preterpasi la nombron de 250 kongresanoj, atingitan lastfoje en Girona. Estus tre interese, se la Kongreson ĉeestus almenaŭ unu samideano el ĉiuj katalunaj vilaĝoj kie Esperantismo kalkulas adeptojn. Ĉefe ne manku delegito de ĉiuj Grupoj aliĝintaj al K. E. F. Barcelona, Terrassa, Sabadell, Girona, Vendrell, kie la movado estas aparte vigla, alportu al la Kongreso esperantistan popolamason! Ĉiu malnova, laciĝinta, forgesema samideano partoprenu nian Dekan, por ke ni povu taksi niajn fortojn kaj definitive reorganizi nian pacan armeon!

Cetero la alloga festaro de la Kongreso mem altiros ĉiujn. Niaj Manresaj amikoj surprizos nin per aparte bona organizo kaj hela soleneco. La akcepto de la urbo estos plej favora. Ni profitu tiun okazon por pruvi unu fojon ankoraŭ ke Esperanto neniam mortis en nia lando, sed ĝi vivas, kreskas kaj floras!

EKSPozICIO. — Oni bonvolu sendi al la Organiza Komitato kiel eble plej grandan kvanton da materialo, ĉar la propaganda ekspozicio estos instalata en vasta halo. Ĉiuspecaj esperantaĵoj estos danke akceptataj.

EKZAMENOJ. — Por faciligi ilian aranĝon, la ekzamenoj anoncu sin. Oni devos pagi la kutiman sumon por la diplomoj de «Kapableco» kaj «Profesoreco».

KONGRESLIBRO. — Estas en preparo bela kongreslibro, kun gravuraĵoj, priskribo de la kongresurbo, kongresa programo,

nomaro kaj adresaro de la federacioj, k. t. p., kiu estos donacata al la Kongresanoj je ilia alveno. Ĝi estos eldonata de la Manresaj organizantoj. Oni akceptas anoncojn: Plena paĝo: 25 ptoj. Duonpaĝo: 15 ptoj. Kvaronpaĝo: 10 ptoj. Varbu anoncojn por helpi!

DISKUTOTAJ PROPONOJ. — Oni sendu ilin al nia Sekretario antaŭ la deka de Marto. En la venonta numero ni publikigos la plej gravajn el ili, ĉefe tiujn pri reformo de la Federacia regularo.




IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

LISTO DE RICEVITAJ VERKOJ

13. Litera-turo. — 14. Si vis pacem para pacem. — 15. Miniaturo. — 16. Al la verda stelo eterna fidelo. — 17. Homo estu homo. — 18. Vaneco. — 19. Muta larmo. — 20. La patra amo estas blinda. — 21. Ni ĉiuj estas homoj. — 22. Semado kaj rikoltado neniam ĉesos. — 23. Faciam eos in gentem unam. — 24. Peripetum mobili. — 25. Baskolando. — 26. Severa unueco. — 27. En bazaro. — 28. Aviadejo malgaja. — 29. Ridi estas pli bone ol plori. — 30. La vivo. — 31. Gralla i tamborí. — 32. Laŭ mia scio. — 33. Kanto de l' Trobador'. — 34. « ??? ». — 35. Floramiko, Mi ne povas, Ne florldi. — 36. Bela espero. — 37. Gloron al la fruktarbo. — 38. Progreso. — 39. Laboru kaj ne malesperu. — 40. Krambambuli. — 41. Verda pluganto. — 42. La poésie, Voyez-vous c'est bien-Mais la musique, c'est mieux. — 43. Sigillum veri simplex. — 44. Beethoven. — 45. Ŝalmisto. — 46. Larmoj. — 47. Petrarca. — 48. Sonu la voko tra mondo. — 49. Amo ne konas barojn. — 50. Amu la naturon. — 51. Neniu tago sen Esperanto. — 52. Verŝajna rakonto. — 53. Al la infera sonorado de

militaj trumpetoj sekvos naiva kantaĵo de paŝtistoj. — 54. Montanya miracle. — 55. Preĝo al la cipresoj. — 56. Sopiĝo. — 57. Post velko de la somero. — 58. Brulu sankta flamo de fidela amo. 59. Milito fruktas nur larmojn. — 60. Ne mortos jam nia bravega anaro. — 61. Patrolando. — 62. Post la morto de la majstro. 63. Vekvoko. — 64. Al miaj lernantoj. — 65. Ram. Lullano. — 66. Per verda stelo al bono kaj belo. — 67. Orion. — 68. Rozujo. — 69. Amo venkas ĉion. — 70. Fremdulino Asja. — 71. Naturamanto. 72. Per scienco al scio. — 73. Katalunujo, nia patrujo. — 74. Kion la amo alportos al vi? — 75. Homoj ni devas fariĝi. — 76. Amo romantika. — 77. Eterna kanto. — 78. Supren! — 79. Cum gaudio et amenitate. — 80. Jam satis. — 81. Si aliis licet, tibi non licet. 82. Stranga renkonto tra la holanda ebenaĵo. — 83. Kongresa fabelo. — 84. For la batalilojn! — 85. Fruktado de la milito estas sufero. — 86. Ceres. — 87. Idealo esperantisma. — 88. Se ĵunan burĝonon deŝiras vento, La koron ekpremas dolora sento. — 89. Se ne plaĉas al la sorto. — 90. Bernard Palissy. — 91. Tagoj ŝtelire forpasis. — 92. Xenius.

Krom la gazetoj cititaj en nia lasta numero, ankaŭ «Esperanto» de U. E. A. bonvolis publikigi la Alvokon al la IX^a Internaciaj Floraj Ludoj. Ni kore dankas.




EN LA PROKSIMA NUMERO

aperos la programo de la Kongreso kiun ĉiaj detaloj, hortabelo de la vagonaroj, prezaro de hoteloj, verdikto de la IX^a Internaciaj Floraj Ludoj (se estas tempo), bilanco de K. E. F., proponoj ricevitaj, k. t. p.

SUPLEMENTO KUN BILDOJ

de la Kongresurbo valorigos ankoraŭ nian venontan numeron, per kiu estos dissendata la kongresa insigno.



Lingvaj Respondoj

laŭ la vulgara scio kaj saĝo de Iu Ajn

«JAM» KAJ «ANKORAU»

Ni rimarkis, ĉefe ĉe germanaj esperantistoj, eraran uzon de la vorto *jam* anstataŭ *ankoraŭ*. Iam ni longe ridis pro la aserto, cetere farita sur serioza gazeto, pri tio ke, en la unuaj tempoj de Esperanto, D-ro Zamenhof *jam* ne sciis uzi la lingvon tute bone.

La esprimo *jam ne*, iom simila al *ne plu*, estas plene korekta. Sed uzi *jam ne* aŭ eĉ *ne jam*, anstataŭ *ne ankoraŭ*, estas tute ne konsilinde. En klara stilo, oni diras: *li jam venis kaj li ne ankoraŭ venis*.

«BEZONA» KAJ «NECESA»

Ĉu ni bezonas la radikon «neces»? Ĉu estas necesa la radiko «bezona»? Jes. La radiko «neces» estas necesa kaj ni bezonas la radikon «bezona».

Tre ofte ni legis ambaŭ radikojn, erare uzatajn, unu anstataŭ la alia.

Necesi signifas *esti bezonata*; *bezoni* signifas *esti bezonanta*.

Unuflanke: *necesas, estas necese, estas bezonate*.

Aliflanke: *mi bezonas, mi estas bezonanta*.

Havi bezonon egalvaloras *senti neceson*. Io ne bezonata estu prefere nomata *necesita*. Ekz.: «Se neniu atakus nian Fundamenton, ĝia defendo estus *necesita* kaj tiam ĝiaj defendantoj defendus ĝin *senbezona*».

ĈU MISKOMPRENO AU MALKOMPRENO?

Ni opinias ke la proponata nova prefikso *mis* estas nenecesa ĉiam, sed ĉefe kiam ĝi estas uzata antaŭ la vorto *kompreno*, anstataŭ la Fundamenta prefikso *mal*.

Ĉu oni povas *kompreni bone* kaj *kompreni malbone*? Iel, jes. Kaj ankaŭ oni povas *ne kompreni*. Sed, fakte, kiu *komprenas bone*, tiu nur simple *komprenas*. Kiu *komprenas malbone*, tiu *malkomprenas*. Ĉar *kompreni* signifas «*ĝuste*» *koni la sencon de io*.

La uzon de *mis* antaŭ aliaj verboj, ekzemple *misuzi*, ni ankaŭ trovas nenecesa, ĉar, en Esperanto, kion oni *mise* uzas, tion oni povas ankaŭ uzi *malbone, malĝuste, erare, fuŝe, maldelikate*, k. t. p.

«TIES» ANSTATAŬ «LIA», «ŜIA», «ĜIA»

Eĉ fame konataj samideanoj sentas ian specialan amon — tute senbazan — al la formo «*ties*». Ili emas diri, ekzemple: «La asocio kaj *ties* kaso»; «La sekretario kaj *ties* raporto»; «La fraŭlino kaj *ties* akompananto». Ili ne

imagas «la kaso de ĝi», «la raporto de li» kaj «la akompananto de ŝi», sed «la kaso de tiu», «la raporto de tiu» kaj «la akompauanto de tiu».

Ĉar la celo de pronomo estas anstataŭi nomon, ni elektu el la pronomoj tiun plej klare prezentantan la karakteron de la anstataŭata nomo. Do, por eviti «La Sekretario kaj la raporto de la Sekretario», ni diru «La Sekretario kaj la raporto de li» (aŭ «lia raporto»). Ni uzu la formojn «li», «ŝi» kaj «ĝi» prefere al la sennuanca pronomo «tiu».

Nur oni devus uzi «ties», genitivo de «tiu», kiam oni volas precize signifigi «de tiu» kaj ne «de li», «de ŝi» aŭ «de ĝi». Ekz.: «Tiu staras tie, antaŭ ĝi, kaj ĝi moviĝas en ties lumo». («Pri la morto de hundeto», Maeterlink, trad. Solà).



Esperanto en nia Specimena Foiro

Same kiel la lastan jaron, nunjare la Barcelona Foiro de Specimenoj cedas al la «Kataluna Esperantista Federacio» unu standon, kie ni instalos propagandan ekspozicion kaj samtempe estos esperanta informejo por la eksterlandaj foirvizitantoj. La Foiro ankaŭ eldonis kaj dissendis esperantajn murafiŝojn.

Dum la okazo de la Foiro — de la 17^a ĝis la 28^a de Marto — deĵoros en la esperantista stando samideanoj el la Barcelonaj grupoj, kies bonvola kunhelpo ebligas la ne facilan aranĝon de tiu ĉiujara ekspozicio de esperantaĵoj, ĉefe komercaj, tiel grava el propaganda vidpunkto.

K. E. F. eldonis 5.000 foliojn, kun kataluna teksto unuflanke pri la utilo kaj uzo de esperanto en komerco kaj aliflanke pri ĝia gramatiko, kiuj estos disdonataj al la vizitantoj krom certa nombro da esperantaj ŝlosiloj en lingvoj kataluna kaj hispana.

La kamenoj de la gastejoj



RIAM dumvintre mi iras al la montaro por fari miajn malgrandajn ĉasadojn kaj samtempe prizorgi mian bienon, kiun mi administras ekskluzive por profito de aliuloj, de la Ŝtato ĝis la animoj de la Purgatorio, mi kutimas halti ĉe la gastejoj.

Tio ĉi estas kutimo tre plebeja, kiun mi sekvas kun neklarigebla persistemo, ĉar mi pensas ke estas necese manĝi, trinki kaj varmigi, kio estas ĝuste la penso de la vulgaraĵ kaj simplaj personoj tie ĉeestantaj.

Kion mi diros...? mi ja volus esti milda spirito sentanta abomenon restadi en tiaj lokoj: sed, malgraŭ mia volo, tie mi min sentas ravata kaj kvietigata, ĉar, en ĉio, de la pinarba branĉo, kiu pendas supre de la blankigita pordo, ĝis la lasta angulo, kie kuŝas meze de araneaj teksaĵoj la barelo da bona vino enlanda, mi vidas ion plaĉan kio min interesas kaj allogas.

Nenie regas tiel granda harmonio kaj sincereco kiel ĉirkaŭe de tiuj malavaraj fajrujoj de la vilaĝaj gastejoj. La viroj eniras piedfrapante, kun manoj en poŝo, kun la ĉapo alpremita kaj la pinto de la nazo ruĝa, spiroblovan-taj kvazaŭ lokomotivoj: Brrr...

Ekstere, la prujno malmoligas la vojojn, blankigas la pajlejojn kaj la tegmentojn, kaj pinĉas la orelojn. La alvenantoj komentarias tion, alproksimigas senceremonie, prenas seĝon aŭ ne prenas, sed ĉiuj etendas la piedojn al la flamoj; kaj ĉiam enpremiĝas en la rondon unu pli, ĉar ĉiu volonte kuntirigas. Se la ĉeestantaro estas tiel supermezura ke la rondo iĝas nepenetrebla, tiuj jam varmigitaj apartigas kaj lasas lokon al la pli bezonantaj, al tiuj kiuj tie malantaŭe atendas kviete kuntirigintaj en la ĉarpioj de eluzita trikoto aŭ promenante ŝirmitaj per siaj lankovriloj, kiujn ili senzorge trenas kaj malpurigas tra la planko.

Kaj la servistino de la gastejo, kiu kutime estas malbela kaj dika, kun malicaj okuloj kaj ŝatinda submentono, eltrovas rimedon ankoraŭ alveni al la fumaj brulŝtupoj, ŝi submovas, arangas, blovas, flamigas ilin, ŝi eltiras brulajojn per la ŝovelilo, ili falas, ŝi prenas ilin denove per la fingroj, zorgeme, kun mirinda imuneco, dum ŝi ridetas al la dusencaj vortoj kaj forigas siajn fortajn brakojn, kovritaĵn de vira vilo, for de la kuragema palpado de iu manuo, kaj poste ŝi malaperas urgema, brue frapante per la galoŝoj, kun la jupo suprentirita sur la flankojn, montrante dum la belmova irado la superbelan ekkurbigon de siaj tibikarno, kies molaĵo blanka kaj premita ekvidigas tra la malplektiĝintaj trikoptoj de la nigra kaj streĉita ŝtrumpo.

Ĉiam estas apud la varma cindro iu panrostilo provizita per grandega pantraŭĉaĵo, iu poto da vino varmiganta, iu haringo kiu rostigas, aĵoj kiuj restas tie sub la lojala protekto de la personoj plej apudaj; kio ebligas ke la haringo ne fariĝu karbo, nek la pano bruliĝu, nek la vino elversigu.

Poste tio pasas de mano en manon, ĝis ĝi alvenas ĉe tiu al kiu ĝi apar-

tenas. Se estiĝas konfuzo, se estas du kiuj ĝin petis samtempe, ili partigas ĝin kiel bonaj fratoj, kaj denove oni provizas la panrostilon, plenigas la poton kaj ĵetas sur la cindrovvarmon alian haringon.

La paco regas ĉiam. Aŭdiĝas ŝercaj paroloj, trankvilaj diskutoj pri la prezo de la brutaroj, la kulturado de la kampoj, la bona aŭ malbona rikolto proksimiĝanta. Oni parolas pri la morto de iu maljunulo; oni komentarias proceson; oni sin plendas pri la malbonsorto de iu malriĉa familio kiu havas filon en militservo; kaj oni filozofas malgaje pri kio estas la mondo, meze de afablaj ridetoj.

De tempo al tempo, eniras ĉaristo kun la vipo sur ŝultro, kriante pli ol ĉiuj. Li postulas ke oni urĝe lin servu kaj servite li forgesas pri sia urĝemo; li metas la piedojn laŭeble sub la krurojn de tiuj kiuj varmiĝas, kaj li alkroĉiĝas al la ŝultroj de la proksimulo por konservi la ekvilibron; li miksiĝas en la konversacion, lasas elfali sentencon kiu silentigas ĉiujn, kaj denove li petas trinki. Jam kun la glaso en la mano, lia ĉaro ekmoviĝas. Sonoras la tintiloj kaj resonas la radferajoj sur la malmolaj ŝtonpecoj de la vojo, kaj li per sola plumbuŝo ensorbas la brandon, li ĵetas ekkrion de satulo, klaketas per la lango, blasfemas kaj rapideme eliras.

Poste venas la malnovaj klientoj, la intimuloj, tiuj kiuj mem detranĉas la panon kaj mezuras la vinon; kiuj manfrapas la dorson de la mastrino kaj pinĉas la femurojn de la servistino. Tiuj prezentigas je la horo de la matenmango. Ili estas najbaroj aŭ terlaboristoj kiuj faras sian ĉiutagan viziton kiam la flamoj de la kameno ekmortigas kaj la trairantoj, kiujn la senkompata frumateno kunigis, marŝas jam, sub plena suno, al siaj aferoj.

La trairantoj de la gastejoj! Mi ne scias kia sorĉo restigas min ĉe ili; mi ne scias kian sugestian efikon ili havas sur min! Ĝi estas eble la bona akcepto kiun ĉiam mi trovis ĉe ili, la frapanta allogo konatigi kun hardita j homoj, kun aventuremaj kunuloj, kiuj trairis la samajn vojojn, kiuj konas la samajn rektirejojn, kiuj venkis la samajn barojn: la lignotabulon moviĝeme kuŝantan super torento, la pasejon el ŝanceliĝantaj ŝtonoj, la glitigan deklivan vojeton, la koton, la mallumon, la malvarmon, la pluvon kaj la ventveteron. Homoj kiuj dum momento kunpartigas kun mi la komforton de varmiga kuirejo, la pecon da pano, la kruĉeton da vino, kaj kiuj afable parolas, kaj konsilas min, kaj montras sin komplezemaj ĉar neniam intereso koncernas ilin kaj ili scias ke baldaŭ ni disiĝos kaj eble neniam plu ni revidiĝos, ĉar la mondo estas vasta kaj ilia vivo kaj mia iras diversflankajn vojojn.

De tio venas tiu ravanta konkordo kun ĉiuspecaj homoj: karbfaristoj brunaj saturitaj de akraj elspiroj de la bruliĝinta lignosuko; arboesistoj kun grandaj lipharoj kaj sangfluriĉa kolo, odorplenaj je rezino, kiuj amasiĝas siajn ŝtalajn laborilojn en angulo, kun teruranta bruo; brutarvendistoj kun longaj kiteloj kaj fraksenaj bastonoj, afablaj kaj amuzaj, kiuj pagas la ŝuldon kun trankvila gesto, tirante el la larĝa zono sian ledan saketon plenan da arĝento; barbarloĝantoj mizeraj, de timiga aspekto, kiuj marŝas al sia malproksima kabano, farita el trunkoj kaj kovrita per ŝtonoj kaj terbuoj,

kun la sako provizita, la kamizolo ŝvitplena, sen zorgo en la vestaĵoj, maĉante la pinton de la estingita cigaro, kiu fulgplenigas al ili dentojn kaj liĵojn, kaj kiun ili ne rebruligis kun la subtila intenco ke ĝi plue daŭru.

Ne klopodu scii kiajn strangajn malvirtecojn, nek kiajn malbonajn instinktojn gardas en sia kruda animo tiuj kompatindaj trairantoj, kiuj sidigas momenton apud vi, nur la tempon necesan por sekigi siajn piedojn, engluti pecon da pano kaj trinki iom da vino, dum ili vin rigardadas scivole kaj penas sciigi kiu vi estas. Nenion signifas ke en la arbaraj solecoj, sub la tegmento de la ruiniganta domaĉo kie tudas la edzino, ploras la gefiloj kaj tremas la bovino agonianta, la kamparano pripensas krimajn aferojn. Li nun estas optimisto de la vivo, lia korpo revivigas, en la nuna momento li liberigas de la malvarmo, de la pluvo, de la ĉagreno kaj de ĉiuj korpremoj ĉielaj kaj teraj lin torturintaj dum la tago, kaj nun li sentas inklinon al la bono kaj malavareco, kaj li volus pagi al vi glaseton da ranca vino per la lastaj rustplenaj kvin centimoj kiuj restas en la poŝo de lia dispeciĝanta veŝto.

Vi povas foriri kun li kiel kunulo tra dezertaj vojoj, en plena nokto, en plena mallumo, ne timu; la bonfara influo de la gasteja kameno daŭre forigas de li ĉian malbonan penson, eĉ se li estus ema havi ilin, kaj certe li partigus kun vi la plej grandajn danĝerojn kiel antaŭe li kunpartigis la pecon da bruna pano.

Nenie en la mondo estas pli facile vekti la estimon de la kamparanoj nefidemaj kaj premegataj de la laboro kaj la mizero. Sufiĉas elmontri ke vi scias kio estas sufero, ke vi ne estas fiera, ke vi malamas la sekretariojn de vilaĝo, la juĝistojn kaj la advokatojn, kaj ke vin ne timigas la rigoroj de l' ĉielo nek la krutaj vojoj de la tero. Tiam vi estos kun estimo de ili konsiderata, kaj eĉ via hundo havos bonan kuŝlokon en la rondo, sub la granda kamentubo.

Ĉe la gastejaj kamenoj vivas ankoraŭ la frateco kaj harmonio de la klanoj de la prahistoria aĝo. Ili estas la komuna hejmo de la senhejmuloj. Angulo gastama kaj sankta, kien ne alproksimiĝas la bruema junularo de la festotagoj, nek la persistemaj ebruloj, nek la kartludistoj obstinaj. Tie vi renkontos ordinare la mueliston vidvan, kiu, dum la liberaj horoj, ne scias resti en sia muelejo malgaja kaj silenta; la kamparano vundiĝintan pro falo, kiu lamirante prezentiĝas, frumatene, por distri sin de sia deviga senlaboro kiu lin ĉagrenas; kaj la neeviteblan mallaboremulon, abomenitan de ĉiuj, iom idioto, kampara histriono, kiu ĵus leviĝis el dormado ĉe la pajlejo kaj sekvas per senviva rigardo, plena de hontinda voluptemo, ĉiujn movojn de la grasa servistino. Aldonu, ankoraŭ, la maljunulon kadukan kaj forlasitan, kompatinda invalido kiu per dek centimoj mangas, trinkas, varmiĝas kaj iluziĝas je la feliĉeco de fremda hejmo, kiun li fine eĉ imagas propra. Tie ankaŭ, preskaŭ ĉiam, li povas ludi infanon aŭ distri ĝin per la movigo de brulanta branĉeto, kaj ricevi la kareson de paŝtista hundo endormiĝinta apud la cindro.

Hol! kredu, ĉio malnobla kaj abomeninda el la senaga restado en la gas-

tejoj, ĉirkaŭe de la grandaj tabloj bruoplenaj pro la frapoj de la kartludistoj kaj la kantaĵoj de la ebruloj, nobliĝas dumvintre per la ekzorcismo de flamanta fajro kaj per la familia kuniĝo en la fuma kuirejo, meze de infanaj ploroj kaj ridoj, patrinaj kisoj kaj bruetado de marmitoj odorantaj tiele kiel tiuj de via hejmo.

Mi povas diri ke ĉiufoje kiam mi sidigis tie, estis al mi malfacile ekiri for. Neniam tie mi sentis tiun malgajigan impreson kiu subite aperas al mi, kiam mi troviĝas sola en la grandaj urbaj hoteloj. Mi ne scias kian neplaĉan aspekton de malvarma gastameco havas la longaj koridoroj, la ĉambroj, kaj la tabloj pretigitaj zorge kaj simetrie; nek kion mi trovas malamika kaj fiera en la rigardo de la gastoj, nepenetreblaj sub sia afektita singardemo, senkarakteraj pro identaj manieroj kaj pro la samaj ceremoniaj movoj. Malgraŭ la komforto de bona lito kaj bona tablo, daŭran frostotremon oni sentas en la koro; oni nostalgias je intimecoj, sincereco, frateco...

Ĉe la gastejaj kamenoj la homoj montras sin ĵus alveninte; nur unu vorto, unu ekkrio, unu gesto malkovras ilin. La animo ĉe ili diafane vidigas tuj, mirakle, pro la varmo kiu senrigidigas al ili la membrojn kaj pro la glaso da vino rekomfortiganta la stomakon.

Kiu volas trapenetri en la erarigan komplikecon de la kamparana animo, tiu haltu kaj travivu kelkajn horojn meze de la ir-venantoj de tiuj kamenoj vilaĝaj, komunaj al ĉiuj.

Ili ĉiuj havas ion aparte interesan, elvokantan la medion kie trafluas ĝlia vivo. Kaj la koto de iuj galoŝoj, la substato de iu jako, la kriploco de iu membro, la morta haŭto de iuj manoj, la flikaĵoj de iu pantalonon, kompletigas la naturvidaĵojn kiujn vi kolektis aŭ pretiĝas kolekti. Kaj aperas al viaj okuloj la silenta farmodomo, alkroĉita al senfrukta montdeklivo, melankolie rigardanta al la malproksimo, al la fruktodona ebenaĵo; la soleca kampo ĵus erpita, kun siaj nigraj terbuloj, kun siaj junaj kverkotrunkoj verdaj meze de la mortantaj arbustoj; la pinaro malluma kaj legenda, kun la ruĝkoloraj maldensejoj kie la rikoltistoj kreviĝas la pinfruktojn; la dehakata arbaro, kie la kolosaj arboj faladas kun uragana muĝado kaj montras la kompatindan nudecon de siaj senŝeligitaj trunkoj; la kaŝita krutaĵo, plena de mortaj folioj kiujn maljunulo amasigas per bruetanta rastilo; kaj la supra de impona montflanko, kie la triumfa fosisto donas la lastan kaj bruatan baton, glitigante la tenilon de sia pioĉo inter la kaloj de la malbelformaj manoj.

Kaj ĉio ĉi, kio estas ekstere, kio estas for, kaŝita de la nebuloj, de la nokto aŭ de la pluva vualo, parolas tie, spiras tie per buŝo de tiuj homoj, dum krakadas la flamoj, bolas la marmito ĉe la fajrujaj hokoj, kaj ĉe la fulgo de la buŝo de l' kamentubo kuras misteraj procesioj de malgrandetaj fajreroj.

Aŭskultu tiujn homojn, kaj vi scios kiom kostas eltiri tiujn herbaĵojn, faligi tiujn trunkojn, surgrimpi tiujn pinarbojn. Vi scios ĉi tion kaj kion povas la laboro, la rezistemo de homo; kiom oni gajnas amasigante tiun folia-

raĵon, farante karbon el tiuj arbradikoj; vi lernos koni la valoron de multaj aĵoj kiujn vi kredis senvaloraj; kiamaniere oni povas gaje vivi manĝante bulbojn kaj kuiritajn terpomojn; kiamaniere oni povas subteni kaj prizorgi la gefilojn per batoj de fosilo, amasigante ŝtonojn sur deklivoj preskaŭ neatingeblaj, gratante la teron per la ungoj, senŝeligante korkarbojn per la dentoj, kaj forlasante la semaĵojn al la volo de la Sanktuloj. La spirito de la montaro estos kun vi, vi divenos la intiman kunrilaton de la homo kun ĝi, kaj vi ĝin trovos pli gastama, pli malavara, kaj vi ĝin amos kun pref ero.

Jen kion vi povos lerni, krom multaj aliaj aferoj, ĉe la kamenoj de la gastejoj.

PRUDENCI BERTRANA

El kataluna lingvo tradukis

JAUME GRAU CASAS



Verkoj de Pujulà

Nia kara amiko S-ro Pujulà i Vallès donacis al K. E. F. la restantajn ekzemplerojn de siaj verkoj «La grafo erarinta», «Nai-vulo», «Vortaro Esperanto-Kataluna» kaj «Vocabulari Català-Esperanto» kiujn oni eldonis antaŭ kelkaj jaroj. Per tiu malavara donaco (la tuta profito de la vendado de la libroj estos por la kaso de K. E. F.), nia eminenta amiko liveras al ni tre oportunan helpon, kiu permesos iom plivastigi la propagandon. Ni denove esprimas al li ĉi tie nian koran dankon.

La prezo de ĉiu vortaro estas 3 pesetoj kaj tiu de ĉiu el la du legolibretoj (luksege eldonitaj) 0'50 ptoj. Al la Grupoj ni faros 25 % da rabato.

Bibliografio

POŝKALENDARETO POR ESPERANTISTOJ - 1923. — Kompilita de Karl Minor. Eldonis: Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel, Berlin kaj Dresden. Prezo: 0'50 fr. sviss.

Krom la kalendaro, ĉi tiu 80-paĝa broŝureto enhavas multajn interesaĵojn, inter ili: Kronologiaj klarigoj, Tabelo por difino de la dimanĉotagoj, Esperantista fajfsignalo, Nürnberg, Deklaracio pri Esperantismo, Organizaĵoj esperantistaj, Fundamenta Gramatiko.

PER TOLBOATO. — Skizo de Jotoka-Eldonejo: Oskar Ziegler & Ko., Marktredwitz (Bavarujo), 1922.

22-paĝa broŝureto, kun originala skizo pri boatveturo sur la rivero Isar. Oni legas ĝin agrable kaj interese.

HIMNARO ESPERANTA, kompilita de Montagu C. Butler, L. R. A. M. Dua eldono, reviziita kaj pligrandigita. Eldonis: British Esperanto Association, 17, Hart Street, London. Prezo: 1 ŝ. 6. p.

Bonege prezentita libro, kun 146 paĝoj kaj bonaj kovriloj, enhavanta 212 religiajn himnojn. Ĝi estas uzebla (laŭ la antaŭparolo) de ĉiu Kristano, greka, protestanta aŭ roma. La versoj estas korektaj kaj la stilo tute bona.

VENEZIA KAJ LA XIII^a INTERNACIA ARTA EKSPOZICIO. — Eldonita de «Grupo Zamenhof», S. Luka, 4115, Venezia.

Kajero pri la Arta Ekspozicio, kun gravuraĵoj kaj priskribo de la urbo.

LUMO SUR LA VOJON KAJ KARMO, de Mabel Collins, tradukis O. Collyn. Eldonis: Teozofia Esperanta Ligo, Krakovská 17, Praha, 1922. Prezo: 5 ĉ. kronoj.

Luksa broŝuro, 32-paĝa, enhavanta 21 teozofiajn regulojn, kun notoj, kaj artikolon pri Karmo. La lingvaĵo estas tre bona.

LA EKONOMIAJ FORTOJ EN FINNLANDO. — Esperanta publikaĵo n-ro 1 de Finnlanda Foiro. Verkis: Leon Ekstrand kaj Martti Kovero.

Studo pri la ekonomio de la nuntempa Finnlando, kun interesaj statistikoj kiuj montras ĝian kreskantan progreson. Sciigoj pri la Internacia Finnlanda Foiro, 1923.



XV^a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg

DUA CIRKULERO

1. *Dato.* La XV^a okazos, laŭ interkonsento kun K. K. K., de la 2.^a ĝis la 8^a de Aŭgusto 1923.

2. *Kotizo.* La fiksado de la Kongresa Kotizo estis tre malfacila en la nunaj cirkonstancoj. Ni konsideris, ke la sumo pagota de altvalutaj landoj povas esti pli alta ol tiu pagota de malbonvalutaj, tamen ne tiel, ke la laste nomitaj kaŭzu efektivan malprofiton al la kongresa kaso. Serĉante konvenan bazon, ni starigis, interkonsente kun K. K. K., jenan tabelon:

Belgoj 30 frankoj, Britoj 20 ŝilingoj, Danoj 20 kronoj, Ĉeĥoslovakoj 50 kronoj, Finnlandanoj 75 markoj, Francoj 30 frankoj, Germanoj 200 markoj, Hispanoj 25 pesetoj, Italoj 50 liroj, Nederlandanoj 10 guldenoj, Norvegoj 20 kronoj, Svedoj 15 kronoj, Svisoj 20 frankoj, Usonanoj 4 dolaroj; Aŭstroj, Hungaroj, Poloj kaj Rusoj po 200 germ markoj.

Ĉiu pagu en la mono de sia lando per monbiletoj aŭ bankoĉeko. Samideanoj el landoj kun aliaj monunuoj ol la supre nomitaj pagu aŭ dolarojn aŭ ŝilingojn aŭ guldenojn aŭ svisajn frankojn aŭ petu pri speciala arango.

Favorkotizoj por familianoj ne ekzistas. Kiu aliĝos post la 1.^a de Junio, pagos plialtigon de 50 %_o. Repago de kotizo ne okazos. La unuaj mil aliĝintoj ricevos priurban donacon.

3. *Garantia Kapitalo.* Por certigi la financojn, estas fondita speciala Garantia Kapitalo, al kiu la samideanoj bonvolu noti garantiojn po almenaŭ 5000. — gmk. La garantiitaj sumoj estos enkasigataj nur, se la kongresaj elspezoj superos la enspezojn, kaj proporcie al eventuala malprofito.

4. *Donacoj.* Sub ĉi tiu rubriko ni notas mondonacojn, faritajn al la Kongresa Kaso. Ĉar la organizaj elspezoj estas tre grandaj kaj nur parte povos esti repagataj per la kongresa kotizo, la L. K. K. sin turnas al ĉiuj samideanoj, petante monsubtenojn.

5. *Blindula Kaso.* Plenumante deziresprimojn de la XIII^a kaj XIV^a Kongresoj en Praha kaj Helsinkí, L. K. K. akceptas pere de la aliĝiloj mondonacojn por la kaso de blindaj Esperantistoj.

6. *Envojaĝa permeso.* Por envojaĝa permeso, laŭ bavara leĝo, ne la registaro, sed la distrikta polico estas kompetenta. La Esperanto-ema Nürnberga konsilantaro, kiel invitinto de la kongreso, promesis ĉian apogon kaj forigon de ĉiuj rilataj malfacilaĵoj.

7. *Fakaj kunsidoj.* Ĉar estonte la Kongresaj fakkunsidoj certe havos pli grandan gravecon, ni speciale priatentos ilin. Elektinte jam lokajn organizantojn, ni publikigas jam nun la adresojn por kelkaj fakoj:

por *blinduloj*: Wilhelm Reiner, direktoro de la blindula instituto, Koberger Strasse 147;

por *filatelistoj*: Max Höningsberger, Albrecht-Dürer-Platz 6;

por *juristoj*: Dro Heinrich Orthal, Fürther Strase 2;

por *kmercistoj*: Emil Muscat, Tucher Strasse 21;

por *kuracistoj*: D-rino Eugenie Steckelmacher, Spittlertorgraben;

por *laboristoj*: Georg Gerber, Allersberger Strasse 57^{III};

por *scienculoj*: Dro Otto Kleider, Kaiser-strasse 7.

Ni aranĝos ankaŭ aliajn fakkunsidojn, pri kiuj ni raportos pli poste.

8. *Plezuroj*. Dum la kongreso ni aranĝos, laŭ tradicio, diversajn festojn kaj plezuraĵojn: teatrajn prezentadojn, internacian balon, ekskursojn, koncertojn ktp.

9. *Komitato*. Dro Richard Ledermann, prezidanto de L. K. K., kaj Otto Pilhofer, la vicprezidanto de L. K. K., estas elektitaj anoj de K. K. K.

10. *Korespondado*. Ni petas, ke oni aldonu por kongresaj respondoj la afrankon per laŭlandaj poŝtmarkoj aŭ respondkuponoj.

Loka Kongresa Komitato

Dro Ledermann

(Oficiala leter- kaj telegramadreso:

Esperanto, Nürnberg)



Tra la gazetaro

Verda Utopio. Osaka (Japanujo) 5265 Mehom machi 7 Chome Minamiku. Jen estas gazeteto tre interesa por ni eŭropanoj. Sur ĝi aperis antaŭ kelkaj monatoj tre kurioza studo pri «Japanoj kaj nuda korpo»; ĝi aspektis iom strange al ni, filoj de civilizacio tiom diferenca de la Japana. Sed oni legis ĝin scivoleme pro la kuriozeco de multaj scenoj priskribitaj.

La de ni ricevita lasta numero enhavas: «Deklaro sensubskribita»; «Virino en moderna Japanujo» de S-ino K. Jamakaŭa, tria ĉapitro de serioza studo rilate la laboran vivon de japaninoj, kaj «Impresoj pri Japanujo».

Bedaŭrinde laŭ niaj ŝatoj, la revuo estas eldonita en tro malgranda formato. Ni deziras al ĝi ke ĝi kresku.

Bizantio. Pera Konstantinopolo. Tepé Bachi 59. Sur la kovriloj de tiu ĉi gazeto aperas listo de societanoj de Konstantinopola Asocio; per ĝi oni vidas ke nia lingvo progresadas senĉese en tiu granda urbo. La nomaro atingas la n-ron 199, kaj estas ankoraŭ daŭranta.

En la Novembra-Decembra n^o 5-6, oni legas «Iom da bioĥemio en komparo kun la nacioj» de la klera esperantisto D-ro Anakreon Stamatidis, «La Rusoj en Konstantinopolo» de Lauza, kaj multaj artikoloj en greka lingvo.

Bedaŭrinde la cirkonstancoj nuntempe travivataj en tiu lando multe influas sur la vivon de la societo; tion ni konjektas el sciigo ke ĝenerala kunveno de Konstantinopola Societo ne povos okazi «pro forveturo el la urbo de la tri kvaronoj de la membroj».

GAZETEMA

Kongreso de Esperanto en Valencia

Per la nuna numero (aŭ eble per la venonta) ni dissendas aliĝilon al la Unua Kongreso de Iberaj Esperantistoj, okazonta dum Pentekosto en la Valencia ĉefurbo.

Eĉ se tiu kongreso ne tute efikus rilate al la starigo de Ibera Esperantista Konfederacio (kies ekziston ni ne kontraŭstaras, sed kies vivipovon ni ne klare vidas), tamen ĝi estas tre bona propagando. Lasttempe multe kreskis la nombro da esperantistoj en la Valencia lando, kie ĉiam kalkulis nia movado eminentajn adeptojn.

Ni rekomendas al la katalunaj samideanoj aliĝi kaj se eble ĉeesti la Valencian Kongreson, kiu okazos proksimume du monatojn post la Kataluna. Kaj reciproke ni invitas la Valencianjn amikojn al nia Deko en Manresa, kie ili certe sukcesos pligrandigi la nombron da veturontoj al la bela lando de la parfumaj oranĝarbaroj kaj graciaj virinoj.



Parolado de S-ro Dalmau

Antaŭ nelonge aperis, sur la Barcelona ĵurnalo «La Vanguardia», artikolo de la verkisto «Andrenio» titolita «El autómata lingüístico», kiu enhavas amason da sensencaĵoj pri Esperanto kaj pri la ecoj de internacia lingvo.

Responde al tiu artikolo, samideano Dalmau faros paroladon ĉe «Ateneu Ĝmpordanès» (Carrer del Pi, 11), la 9^{an} de marto, je la deka vespere. La anonco de tiu parolado, al kiu niaj legantoj estas invitataj, vekis fortan intereson.

Clau Esperanto

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeditada per la F. C. d'E.

Conté la gramàtica i vocabulari, amb text de propaganda a la coberta, relatiu als darrers progressos de la llengua internacional.

Preu: 10 cèntims

100 exemplars: 6 ptes.

Literatura Mondo

Monata gazeto, ilustrita, grand-formata, almenaŭ 20-paĝa.

Interesa enhavo kaj bonega stilo. Originalaj esperantaj verkoj kaj tradukoj el ĉiuj lingvoj.

JARABONO : 12 PESETOJ

K. E. F. akceptas abonojn

Andrássy-ut, 81.

BUDAPEST

Th. Cart Kolekto de la Akademio

VORTARO

de la oficialaj radikoj

DE ESPERANTO

kun Antaŭparolo, la Fundamento kaj listo de la ĉefaj landnomoj

PREZO : 1 franko

Ĉiu esperantisto aĉetu ĝin!

Esperantista Centra Librejo

51, RUE DE CLICHY

P A R I S

CURS PRÀCTIC DE LA LLENGUA

ESPERANTO

PER FREDERIC PUJULÀ I VALLÈS,

amb les regles gramaticals, exercicis en Esperanto i en Català, i vocabulari Català - Esperanto.

SEGONA EDICIÓ

PREU: 0'75 PTES.

Federació Catalana d'Esperantistes

CARME, 30 - BARCELONA



23 GRUPS ADHERITS I 500 MEMBRES INDIVIDUALS

Aquesta entitat, fundada poc després del V Congrés Esperantista Universal a Barcelona, en 1909, amb l'objecte (Art. 2.^{on} dels Estatuts) *d'unir tots els esperantistes de terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto,*

CELEBRA anyalment, amb motiu de la seva reunió general, brillants Congressos Esperantistes, portant-ne ja 9 de realitzats a Sabadell, Tarragona, Terrassa, Olot, Sant Feliu de Guíxols, Vilanova i Geltrú, Reus, Manlleu i Girona, i en preparació el desè a Manresa.

ORGANITZA els Jocs Florals Internacionals que són celebrats simultàniament amb els nostres Congressos, contribuint així a l'enriquiment de la literatura esperantista.

PUBLICA com a orgue federatiu la revista mensual «Kataluna Esperantisto», gratis per als adherits, en la qual apareixen interessants informacions sobre el moviment esperantista mundial, ultra excel·lents traduccions de literatura catalana i treballs premiats en els esmentats «Jocs Florals Esperantistes».

EDITA, a mesura de les seves possibilitats, opuscles de propaganda i ensenyament de la llengua internacional.

COL·LABORA a la celebració d'actes de propaganda, com conferències, obertura de cursos, exposicions, visites, etc.

ATORGA títols de Professor d'Esperanto, segons condicions estatuïdes en el II Congrés a Tarragona, i d'acord amb els membres catalans del «Lingva Komitato».

CUIDA, en general, de coordinar els esforços dels adeptes de l'Esperanto a Catalunya, i

REPRESENTA la nostra nació davant la Organització Esperantista i en els Congressos Esperantistes Universals.

ADHERIU-VOS-HI!

QUOTA ANYAL: 5 PTES.

KATALUNA ESPERANTISTO

(L'ESPERANTISTA CATALÀ)

MONATA GAZETO, ORGANO DE LA



DUA EPOKO - JARO III^a : MARTO 1923

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉ (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (i), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona ĵ)

forma el plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufixe per a formar el femení

sinjorino, reĝino
katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerç)

A

terminació adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

terminació adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

mode condicional

U

mode imperatiu o subjunctiu

Mi	skribas	skribis	skribos	skribus	skribu
Jo	escrie	escriĝi	escriuré	escriuria	escriĝi

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti* i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita.

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En Esperanto, tota paraula que reb l'acció d'un verb (complement directe) va seguida de la lletra **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius s'expressa per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

Antaŭ la Kongreso

TEN nia Dekna Nacia Kongreso, samideanoj! Ni veturu al Manresa kun la nobla deziro refreŝigi nian entuziasmon en gaĝa festa medio, sed kun la firma volo kunrilatigi tie ĉies fortojn, por ebligi vastan planon de propaganda laboro en nia kataluna lando.

Ĉiuj samideanoj atentu, ke ne sufiĉas nura aprobo kaj aplaŭdo, sed necesas pli kaj pli tuja, proksima, intensa helpo. Oni meditu, ke la giganta laboro de vigla nacia Federacio ne povas esti efektivigata de malgranda aro konsistanta nur el kelke da personoj. Por ke nia Kataluna Esperantista Federacio estu bone funkcianta organizo, estas necesa la kunlaboro de ĉiuj.

Ni, do, studu en nia venonta Kongreso la plej bonajn rimedojn por atingi tiun celon, kaj neniu ŝparu por tia laboro siajn fortojn.

La vicleco de la esperanta movado dependas de ĉiuj samideanoj senescepte kaj sur ilin ĉiujn falas la respondeco aŭ la honoro de senaga vegeto aŭ agema vivo.

X^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Manresa : 1-2-3 Aprilo 1923

HONORA KOMITATO

Lia Ekscelenca Moŝto Sinjoro Markizo de Carulla, Rektoro de la Barcelona Universitato, *Prezidanto*.

Lia Ekscelenca Moŝto Doktoro Francesc Muñoz, Episkopo.

Lia Moŝto Sinjoro Ignasi Suaña, Urbestro de Manresa.

Lia Moŝto Sinjoro Josep Alaberch, Arcipresto.

Lia Moŝto Sinjoro Francesc A. Segrelles, Juĝisto.

Lia Moŝto Sinjoro Enric Periquet, Militista ĉefo de Manresa.

Lia Moŝto Sinjoro Josep Creixell Iglesias, Parlamenta Deputito.

Lia Moŝto Sinjoro Joaquim Borràs, Deputito de la Mankomuneco de Katalunujo.

Lia Moŝto Sinjoro Iu Minoves, Deputito de la Mankomuneco de Katalunujo.

Lia Moŝto Sinjoro Josep Piquer, Deputito de la Mankomuneco de Katalunujo.

Lia Moŝto Sinjoro Ferran Valls Taberner, Deputito de la Mankomuneco de Katalunujo.

Sinjoro Fermí Roca, Prezidanto de la Komerca Ĉambro.

Sinjoro Antoni Arderiu, Prezidanto de la Ĉambro de Domposedantoj.

Sinjoro Joaquim de Marimón, Prezidanto de la Terkulturista Ĉambro de l' Bages.

Sinjoro Fructuós Berneda, Direktoro de la Lernejo de Artoj kaj Metioj.

Sinjoro Doktoro Josep Servitje, Direktoro de la Urba Duagrada Lernejo.

Sinjoro Felip N. Pujadas, Prezidanto de la Gazetara Asocio de Manresa kaj regiono.

ORGANIZA KOMITATO

PREZIDANTO: S-ro Josep Albagés

VIC-PREZIDANTO: S-ro Felip N. Pujadas

KASISTO: S-ro Angel Llobet

SEKRETARIO: S-ro Joan Oliveras

FAKOJ:

S-rino Emília Ramon

S-ro Alexandre Badia

F-ino Lourdes Soler

S-ro Francesc Pijoan

S-ro Artur Torrents

PROGRAMO

DIMANĈO, 1

- 10^a Oficiala alveno de la Kongresanoj.
 11^a Akcepto ĉe la Urbdomo.
 Malferma Kunsido de la Kongreso.
 12'30 Vizito al la Akceptejo. (Disdonado de la Kongresa Libro).
 16^a Esperantaj Ekzamenoj.
 17^a Labora Kunsido. (En la Komerca Ĉambro).
 22^a Inaŭguro de la Propaganda Ekspozicio (ĉe «Orfeo Manresa») kaj Esperanta Festo.

LUNDO, 2

- 8^a Solena Diservo kun esperanta prediko de Pastro Josep Casanovas en la preĝejo «Kavo de Sankta Ignacio».
 9^a Vizito al la Muzeo kaj Arĥivo de la Urbo, Katedralo kaj aliaj vidindaĵoj.
 11^a Festo de la Floraj Ludoj en la Teatro Konservatorio.
 13'30 Oficiala Festeno ĉe «Hotel de S. Domingo».
 17^a Ferma Kunsido.
 22^a Dancado de «Sardanoj» ĉe «Centre de Dependents».

MARDO, 3

- 7^a Ekskurso al la monto de salo de Cardona.
 Ekskurso al la Monaĥejo Sant Benet de Bages.
 18'30 Reveno de la ekskursantoj kaj adiaŭa kunveno.



Hortabelo de vagonaroj inter Barcelona kaj Manresa

Forveturo de Barcelona	{	6'20 - 8'04 - 9'00 - 13'27 - 16'25 - 17'27 - 18'30
Alveturo al Manresa	{	8'47 - 9'55 - 11'07 - 15'30 - 18'34 - 19'31 - 20'49
Forveturo de Manresa	{	6'02 - 7'15 - 9'16 - 11'10 - 13'30 - 16'23 - 18'41
Alveturo al Barcelona	{	8'05 - 9'15 - 11'15 - 13'08 - 15'27 - 18'15 - 21'15

Estas substrekitaj la OFICIALAJ vagonaroj uzotaj de la Kongresanoj.
Ĉiuj Kongresanoj, eĉ partoprenontoj de la ekskurso al Cardona dum la tria tago, povas aĉeti rabatitan bileton Barcelona-Manresa (Iro kaj Reveno).

Prezo de la bileto Barcelona-Manresa: Dua Klaso: Ptoj. 4'65. Tria Klaso: Ptoj. 3'35.



Hoteloj

Hotel de S. Domingo: Taga pensiono, 12 ptoj. Unu mango, minimume 3'50 ptoj. Ĉambro almenaŭ 2'50 ptoj.

Hotel Comerç: Taga pensiono, 11 ptoj.

Fonda Univers: Taga pensiono, 11 ptoj.

Fonda del Centre: Taga pensiono, 11 ptoj.

Fonda d'Europa: Taga pensiono, 10 ptoj.

Oficiala Festeno: 12 ptoj.

Necesas antaŭa enskribiĝo por la festeno.

Kongresaj sciigoj

VOJAĜO. — Ni rekomendas al ĉiuj uzi la oficialan vagonaron, kiu forveturos el Barcelona je la 8⁰⁴.

KONGRESA INSIGNO. — Per la nuna numero ni dissendas ĝin. Oni ĝin surportu dum la Kongreso!

GRUPAJ STANDARDOJ. — La O. K. insiste petas al la Grupoj ke ili kunportu siajn standardojn. Tiuj de la urbaj societoj venos akcepti ilin ĉe la stacidomo, de kie oni demonstracie iros al la Urbdomo. Muzikistaro akompanos la karavanon.

SALUTADO DE DELEGITOJ. — Kiel kutime, delegito de ĉiu esperanta societo salutos la Kongreson dum la Malferma Kunsido, tuj post la parolado de la Prezidanto.

AKCEPTEJO. — Ĝi estos instalata ĉe «Orfeó Manresa», en ĉambro apuda al la Ekspozicio. Tie la Kongresanoj povos peti ĉiajn informojn, enskribi sin por la Festeno kaj Ekskursoj, aĉeti librojn, k. t. p.

KONGRESA LIBRO. — Ĝi estos donacata de la Manresaj organizantoj al ĉiu Federaciano ĉeestanta la Kongreson. Oni prezentu tiucele la enmetitan membrokarton.

La kongreslibro enhavas priskribon de Manresa, multajn gravuraĵojn kaj ĉiuspecajn detalojn pri la Kongreso kaj ekskursoj.

ESPERANTAJ EKZAMENOJ. — Por faciligi ilian aranĝon, la ekzamenotoj anoncu sin antaŭ la kongreso. Oni devos pagi la kutiman sumon por la diplomoj de «Kapableco» kaj «Profesoreco».

LABORA KUNSIDO. — Ĝi okazos laŭ la jena tagordo: Sekretaria Raporto; Aprobo de la bilanco ĝis 28^a de Februaro; Diskuto de prezentitaj proponoj; Eventualaj petoj kaj proponoj, se tempo sufiĉos. Elektro de nova Komitato de K. E. F. kaj de venonta Kongresurbo.

EKSPOZICIO. — Oni bonvolu sendi al la O. K. kiel eble plej grandan kvanton da materialo, ĉar ĝi estos ekspoziciata en vasta halo. Danke oni akceptos ĉiuspecajn esperantaĵojn.

FLORAJ LUDOJ. — Ili okazos en la vasta Teatro Konservatorio, kiu havas tri etaĝojn.

Por la Kongresanoj estos rezervata prefera loko en la parteroj.

OFICIALA FESTENO. — Kiu deziras ĉeesti la Festenon, tiuj devas enskribi sin per la ĉi-kune sendata enskribilo, antaŭ la 28^a de Marto. La kos-

ton (12 ptojn.) oni devos pagi ĉe la Akceptejo la unuan tagon de la Kongreso.

EKSKURSOJ. — La oficiala ekskurso estos tiu al la monto de salo kaj kastelo el Cardona; por partopreni ĝin estas ankaŭ necesa la enskribiĝo antaŭ la 28^a de Marto. Oni devos pagi 16'50 ptojn. por la specialaj aŭtomobiloj, matenmanĝo (bulko kun kolbaseto dum la veturado) kaj bonega tagmanĝo ĉe hotelo en Cardona.


Ankaŭ estos aranĝataj, sed ne tiom detale, ekskursoj al la monaĥejo Sant Benet de Bages kaj al la fama monto Montserrat. Interesatoj petu informojn pri tio ĉe la Akceptejo.

Pri la itineraloj de la tri ekskursoj, vidu la Kongresan Libron.

FESTOJ DEDIĈATAJ AL LA KONGRESANOJ. — Kelkaj festoj, kiel piedpilka ludo, balo, teatraj prezentadoj, k. t. p., estos dediĉataj al la Kongresanoj; unuj senpage, aliaj ne.

POŝTKARTOJ. — Estas eldonitaj du serioj da poŝtkartoj kun vidaĵoj de Manresa kaj esperanta teksto. Aĉetu ilin!

MANRESAJ ĴURNALOJ. — La Manresaj ĵurnaloj «Pàtria» kaj «El Pla de Bages», kiuj de longe publikigas regulajn informojn pri la esperanta movado kaj lasttempe eĉ aperigis gravajn artikolojn de S-roj Iñigo Pla, Felip Pujadas, Josep Albagés kaj aliaj, preparas eksterordinaran numeron dediĉatan al la Kongreso, aperontan dum la Kongresaj tagoj.




LA PROKSIMA NUMERO

dediĉata al la raporto pri Kongreso kaj Internaciaj Floraj Ludoj, kun

SUPLEMENTO KUN BILDOJ

estos 32-paĝa (dumonata) kaj aperos kiel eble plej baldaŭ, dum la Maja monato.



BILANCO DE K. E. F. DE LA 1^a DE OKTOBRO 1921
ĜIS LA 28^a DE FEBRUARO 1923

E N S P E Z O J	<u>Pesetoj</u>
En kaso je la 1 ^a de Oktobro 1921	383'30
Anoncoj aperintaj sur «K. E.»	152'52
Ekzamena matrikulo.	5'—
Vendado ponumere de «K. E.»	61'50
Donacoj por propagando	122'80
Vendado de Katalunaj ŝlosiloj	90'—
Enspezitaj kotizajoj	2263'70

3078'80

E L S P E Z O J	<u>Pesetoj</u>
Presado de ŝlosiloj kaj ĝeneralaj presaĵoj	379'—
Presado de «Kataluna Esperantisto»	2296'50
Ĝeneralaj elspezoj	354'55

3030'05

R E S U M O	<u>Pesetoj</u>
Enspezoj	3078'80
Elspezoj	3030'05
Restas en kaso.	48'75

En realeco, estas deficito, ĉar ni ŝuldas kelkajn fakturojn al la presisto S-ro Vinyals.

Tamen, se ĉiuj federacianoj estus pagintaj la kotizajon 1922, tia deficito malaperus. Pri tio oni klarigos dum la Kongreso.

Barcelona, 28 Februaro 1923

La Prezidanto : JOAN AMADES

La Administristo : PERE NAVAS

La Kasisto : JOAN CASTELLS

Soneto

Al la Reĝino de niaj Floraj Ludoj

Kia ĝojo por mi, kia honoro,
se mi povus per voĉo melodia
kanti la ĉarmon de l' Reĝino nia,
de nia festo poezia gloro!

Kia ĝojo por mi, se pro l' fervoro
kaj naiveco de la kanto mia,
memoro restus je l' Reĝin' gracia
por ĉiam en la fund' de ĉiu koro!

Kia ĝojo por mi, se harmonia
la mia kant', en tiu bela horo,
aŭdigus sin kun ritmo kaj sonoro,
kiel plektita de inspiro dia!

Mi ĝin oferus al beleco Ŝia,
kvazaŭ ĝi estus la Natura Floro.

JAUME GRAU CASAS

SUPLEMENTO AL N-RO 27 DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

X^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Manresa : 1-2-3 Aprilo 1923



Urbdomo.



Domo de Bonfarado kaj Placo Cots.



Panorama v



Placo Clavé.



de Manresa.



Katedralo : Interno.



Preĝejo de Sankta Ignacio.

IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj Verdikto

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta Amon. — Premio al la verko n-ro 19, Devizo: **Muta Larmo**. *I^a Subpremio* — n-ro 46, devizo: «Larmoj». *II^a Subpremio* — n-ro 4, devizo: «Dolĉa rigardo ravis min...» *Citinda* — n-ro 47, devizo: «Petrarka». *Citinda* — n-ro 66, devizo: «Per verda stelo al bono kaj belo». *Citinda*: — n-ro 15, devizo: «Miniatur». —
- II. — Originala ama verko en prozo. — Premio al la verko n-ro 77, devizo: **Eterna Kanto**. *I^a Subpremio* — n-ro 70, devizo: «Fremdulino Asja». *II^a subpremio* — n-ro 74, devizo: «Kion la amo alportos al vi?» *Citinda*: n-ro 56, devizo: «Sopiro».

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de la versaĵo: «Cabelleres vellutades». Ne konkursita.
- II. — Traduko de la prozaĵo: «L'Amor a l'Ofici». — Premio al la verko n-ro 90, Devizo: **Bernard Palissy**. *I^a Subpremio* — n-ro 32, devizo: «Laŭ mia scio».

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de la Ekscelenca Urbeŝtaro de Manresa: Premio al la verko n-ro 85, devizo: **Frukto de la milito estas sufero**. *I^a Subpremio* — n-ro 59, devizo: «Milito fruktas nur larmojn». *II^a Subpremio* — n-ro 57, devizo: «Post velko de la somero».
- II. — De la «Mankomuneco de Katalunujo»: Premio al la verko n-ro 65, devizo: **Ram. Lullano**. *I^a Subpremio* — n-ro 82, devizo: «Stranga renkonto tra la holanda ebenaĵo». *II^a Subpremio* — n-ro 18, devizo: «Vaneco».
- III. — De la Parlamenta Deputito S-ro Josep Creixell. — Premio al la verko n-ro 6, devizo: **Ĉio estas necesa kio okazas**. *I^a Subpremio* — n-ro 28, devizo: «Baskolando». *II^a Subpremio* — n-ro 78, devizo: «Supren!»
- IV. — De la Deputitoj S-roj Valls, Borràs kaj Minoves. — Premio al la verko n-ro 49, devizo: **Amo ne konas barojn**. *I^a Subpremio*. — Al la verko n-ro 13, devizo: «Litera-turo». *II^a Subpremio* — n-ro 54, devizo: «Montanya miracle».

- V. — De la Grupo «Bela Espero». — Premio al la verko n-ro 33, devizo: **Kanto de l' trobador'**. *I^a Subpremio* — n-ro 30, devizo: «La vivo». *II^a Subpremio* — n-ro 76, devizo: «Amo romantika».
- VI. — De «Amikoj de la Popola Kulturo». — Premio al la verko n-ro 23, devizo: **Faciam eos in gentem unam**. *Subpremio* — n-ro 71, devizo: «Naturamanto».
- VII. — De la Gazetara Asocio de Manresa. — Premio al la verko n-ro 84, devizo: **For la batalilojn!** *I^a Subpremio* — n-ro 12, devizo: «Fiat justitia». *II^a Subpremio* — n-ro 29, devizo: «Ridi estas pli bone ol plori».
- VIII. — De la «Centre de Dependents del Comerç i de la Indústria». — Premio al la verko n-ro 24, devizo: **Peripetum mobili**. *Subpremio* — n-ro 88, devizo: «Se junan burĝonon deŝiras vento, la koron ekpremas dolora sento».
- IX. — De la «Pomells de Joventut». — Premio al la verko n-ro 41, devizo: **Verda Pluganto**. *I^a Subpremio* — n-ro 73, devizo: «Katalunujo nia patrujo». *II^a Subpremio* — n-ro 69, devizo: «Amo venkas ĉion». *Citinda* — n-ro 51, devizo: «Neniu tago sen Esperanto».
- X. — De la «Manresa Orfeono». — Premio al la verko n-ro 42, devizo: **La poésie voyez vous, c'est bien. Mais la musique, c'est mieux**.
- XI. — De la Bazaro Jorba. — Premio al la verko n-ro 60, devizo: **Ne mortos jam nia bravega anaro**. *Subpremio* — n-ro 27, devizo: «Baskolando». *Citinda* — n-ro 79, devizo: «Cum gaudio et amenitate».
- XII. — De la «Ekskursia Societo». — Premio al la verko n-ro 35, devizo: **Floramiko mi ne povas ne flori**. *I^a Subpremio* — n-ro 50, devizo: «Amu la naturon». *II^a Subpremio* — n-ro 17, devizo: «Homo estu homo».
- XIII. — De «Laborista Ateneo». — Premio al la verko n-ro 91, devizo: **Tago ŝtelire forpasis**. *I^a Subpremio* — n-ro 20, devizo: «La patra amo estas blinda». *II^a Subpremio* — n-ro 43, devizo: «Sigillum veri simplex».
- XIV. — De «Montepio Artesà». — Premio al la verko n-ro 21, devizo: **Ni ĉiuj estas homoj**. *I^a Subpremio* — n-ro 55, devizo: «Preĝo al la ĉipresoj». *II^a Subpremio* — n-ro 68, devizo: «Roziĝo».
- XV. — De «Terkulturista Ĉambro de l' Bages». — Premio al la verko n-ro 67, devizo: **Orion**. *Subpremio* — n-ro 25, devizo: «Baskolando». *Citinda* — n-ro 22, Devizo: «Semado kaj rikoltado neniam ĉesos».
- XVI. — De «Enciklopedia Popola Ateneo». — Premio al la verko n-ro 72, devizo: **Per scienco al scio**. *Subpremio* — n-ro 40, devizo: «Laboro kaj ne malesperu».
- XVII. — De «Nova Sento». — Premio al la verko n-ro 48, devizo: **Sonu la voko tra mondo**. *Subpremio* al n-ro 7, devizo: «Al la verda stelo eterna fidelo».

- XVIII. — De «Barcelona Stelo». — Premio al la verko n-ro 45, devizo: **Ŝalmisto**. *Subpremio* — n-ro 44, devizo: «Beethoven».
- XIX. — De «Kataluna Esperantisto». — Premio al la verko n-ro 26, devizo: **Baskolando**.

Laŭ la regulo II de la Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj, la verkoj premiitaj fariĝas propraĵo de la Konservantaro, kiu zorgos pri ilia publikigo.

Permeson por reprodukto oni petu de la Redaktoro de *Kataluna Esperantisto*.

Marto 1923. — E. GROSJEAN-MAUPIN, *prezidanto*; Josep ALBAGÈS; Louise BRIGGS; Delfi DALMAU; Artur DOMÈNECH; Marian SOLÀ, *sekretario*.



Lastmomentaj sciigoj

La Sekretario de la Juĝantaro de la IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj informas nin, ke la Natura Floro estas aljuĝita al la facila poeto kaj talenta esperantisto Sinjoro Julio Baghy, el Budapest (Hungarujo), kiu bonvolis transcedi al la Organiza Komitato de la Kongreso sian rajton elekti Reĝinon de la Festo.

Estas elektita kiel Reĝino de la Floraj Ludoj, la ĉarma Fraŭlino Paquita Cots Fortuny, el Manresa, nevino de la tiea urbkonsilanto S-ro Orrit.

Ni kore gratulas la laŭreatan poeton Julio Baghy, kaj ni prezentas niajn riverencojn al la Reĝino Paquita Cots Fortuny.

Bibliografio

ESPERANTO-LEHRBUCH FÜR SCHUL—, KURSUS—UND SELBSTUNTERRICHT, K. Bruggemann. Eldonis: Esperanto-Verlag Friedrich Ader, Dresden-A. 27. 1922.

Libro 148-paĝa, enhavanta 45 lecionojn pri Esperanto en germana lingvo, la Fundamenton kaj Vortarojn Esperantan-Germanan kaj Germanan-Esperantan.

KREMACIO KONTRAU ENTERIGADO. D-ro Hugo Erichsen. Parolado farita en la kremaciejo de Indianapolis, je la 27^a de Septembro 1913, kaj en la Instituto de Carnegie, Pittsburgh, je la 13^a de Decembro 1913. Trad. Tobias Sigel. Libro eldonita de la Kremacia Asocio de Ameriko, 519, Union Central Bldg., Cincinnati, Ohio.

DUA KURSA LEGOLIBRO, kompilita de W. M. Page, F. B. E. A. Eldonis: Brita Esperantista Asocio, 17, Hart Street, W. C. 1, London, 1922.

Same bona kiel la unua legolibro, kun amaso da spritaj rakontoj. 24-paĝa broŝuro.

DIE BISHERIGEN ERFOLGE DER WELTHILFSSPRACHE ESPERANTO AUF DER GANZEN WELT, de Dr. H. Proelss kaj Hanns Sappl. Eldonis: Paulus-Verlag, Graz, 1922.

Libro 108-paĝa pri la esperantista movado kaj organizo en diversaj landoj. El ĝi oni povas eltiri tre valorajn sciigojn por la propagando.

HERMANO KAJ DOROTEO, Goethe, trad. de Benno Küster. Volumo I de la kolekto «Internacia Mondliteraturo» eldonata de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1922.

Dua esperanta eldono de la fama eposo idilia de Goethe, lerte tradukita de S-ro Küster, kun antaŭparolo de D-ro Dietterle. Tiu ĉi unua volumo de la kolekto «Internacia Mondliteraturo», kiel ĉiuj ceteraj (recenzotaj en venontaj numeroj), estas milde presita kaj prezentita kun tre plaĉa eksterajo. Por rimarkigi la valoron de ĉi tiu traduko, nur ni kopios kelkajn vortojn de D-ro Dietterle en sia antaŭparolo: «Tradukante la germanan eposon, Küster — kun sendube laŭdinda gŭsto — ne imitis la heksametran version de Goethe, kiu — laŭ maniero taŭga por la germana, sed ne por la esperanta poezio — almiksas kvazaŭ-spondeojn kaj-troĥeojn al la daktiloj Küster uzis nur daktilojn. — Mi ĉi tie ne volas paroli pri la fakto, ke en Esperanto (ankaŭ ne en la germana lingvo) ne ekzistas «daktiloj» en la senso de la greka kaj latina lingvoj, ĉar nia lingvo havas nek longedaŭrajn nek mallongedaŭrajn silabojn. Tamen ĝi havas akcentatajn kaj ne akcentatajn silabojn kaj krom tio aliajn kun ŝvebanta akcento. Do, oni en Esperanto povas imiti la formojn de la antikvaj, klasikaj versoj.

Küster konsekvence kaj senerare formis pure daktilajn heksametrojn, procedo des pli admirinda, ĉar la manko de unusilabaj vortoj (krom la personaj pronomoj, kelkaj konjunkcioj, prepozicioj, interjekcioj kaj adverboj) treege malfaciligas la esperantigon de la heksametra formo».



Lingvaj Respondoj

laŭ la vulgara scio kaj saĝo de Iu Ajn

Li kaj ili anstataŭ tiu kaj tiuj

En unu el la lastaj respondoj, ni vidis ke kelkaj samideanoj emas uzi *ties* (t. e.: *de tiu*) anstataŭ *lia*, *ŝia* aŭ *ĝia* (t. e.: *de li*, *de ŝi* aŭ *de ĝi*).

Aliaj esperantistoj, kontraŭe, emas uzi *li* aŭ *ili* anstataŭ *tiu* aŭ *tiuj*.

Ambaŭ emojn ni opinias eraraj. Oni devas uzi ĉiuokaze la oportunan pronomon, evitante la sisteman preferon de *li* super *tiu* aŭ de *tiu* super *li*.

Ni juĝas nekorektaj la jenajn frazojn: 1. «Unu sola homo kapablas propagandi Esperanton sukcesege: *Li* estas *Mil!*» (N-ro 1 de «*Esperanto Spritulo*). 2. «*La libro* estas tre utila al *ili*, kiuj deziras...» (Frazoj similaj aperis sur iu Esperanto-Katalogo»).

En la unua okazo, oni devus diri: «Unu sola homo kapablas propagandi Esperanton sukcesege: *Tiu* estas *Mil!*» En la dua frazo, simile ankaŭ oni devus diri: «*La libro* estos tre utila al *tiuj*, kiuj deziras...»

Havigi anstataŭ akiri

Ni estas legintaj ie:

«... libro, kiun ĉiu esperantisto devas havigi». Tio ĉi estas nekorekta. Oni devas diri: «kiun ĉiu esperantisto devas *akiri*», aŭ «*havigi al si*». *Aĉeti*, *akiri* estas sinonimaj kun *havigi al si*, sed tute ne kun «havigi».

Ricevitaj proponoj

diskutotaj ĉe la Kongreso

Unue ni presas la nunan regularon de K. E. F. Poste la projekton de reformoj, kiu rezultis el diversaj kunsidoj de la Konsulta Komitato, konsistanta el la Prezidantoj de la aliĝintaj Grupoj.

REGLAMENT DE LA FEDERACIÓ CATALANA D'ESPERANTISTES

Article primer. — Queda constituída amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segón. — L'objecte de la «F. C. d'E.» es l'unio de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V. Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin els esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

Art. tercer. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu.

Art. quart. — La «F. C. d'E.» constarà únicament de membres individuals, que contribuïran al seu sosteniment amb la quota mínima de CINQ pessetes anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grup podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que'ls membres individuals i llurs membres podran pagar les quotes per mensualitats. Per a aquest fi els Presidents s'entendran amb el Caixer-administrador directament.

Els Presidents dels grups adherits formaran un Consell Consultiu de la «Federació», al qual podrà dirigir-se el President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en què ho cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació», sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en ço que fóra de desitjar per a la millor marxa de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

Art. cinquè. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vice-President, Caixer-administrador de la revista, Vice-caixer-administrador, Secretari i Vice-Secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista. El càrrec de Caixer-administrador serà permanent. El que'l desempenyi continuarà en el càrrec fins ordre de la Junta que farà ratificar pel pròxim Congrés.

Art. sisè. — Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son càrrec: recollir les quotes dels federats, fer les comunicacions necessàries per als efectes de l'article segón i altres assumptes del règim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre'l Comitè Directiu i els seus representats.

Els delegats podran retenir-se, si ho creuen convenient, en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

Art. setè. — El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys una vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, prèvia ordre del dia, se donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà el lloc on hagi de celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, se nomenaran els individus que hagin de formar el Comitè per al següent exercici, i es discutiran les proposicions que hagin sigut presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i incloses en l'ordre del dia.

Art. vuitè. — El Comitè estarà facultat per crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les juntes de les quals seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

Art. novè. — Tots els acords de les Assemblees i Congressos seran presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

Art. desè. — Les esmenes que vulguin fer-se en aquest reglament hauran de presentar-se en temps convenient per ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podran ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. onzè. — La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la Catalana en les Assemblees.

Art. dotzè. — En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.» els fons existents, o que resultin de la liquidació, passaran a la «Centra Oficijoj», domiciliada a París, per a la propagació de l'Esperanto.

Art. transitori. — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Barcelona, carrer del Carme, 30, pral.

PROJECTE DE REFORMES AL REGLAMENT

Article primer. — Sense modificació.

Art. segon. — L'objecte de la «K. E. F.» és l'unió de tots els esperantistes residents a Catalunya o bé en terres de llengua catalana que no tinguin Federació, per a la propaganda i divulgació de l'Esperanto i per a donar compliment a tots els acords i consells que afectin els esperantistes en general, provinents dels Congressos Universals o dels nuclis directors de l'idioma del Dr. Zamenhof.

Art. tercer. — Canviar els mots «gratis als federats» amb aquests: «reductada en Esperanto i excepcionalment en l'idioma que l'oportunitat aconselli».

Afegir: El preu d'abonament a la revista serà estipulat pel Comitè Directiu, tenint en compte de fer pagar un 20 % més als abonats que no siguin federats.

Art. quart. — La «K. E. F.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de l'entitat a la qual pertanyen i els altres amb caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «K. E. F.» contribuiran al seu sosteniment amb la quota trimestral, pagada per endavant, de 0'25 pessetes mínim per cada un dels socis que els integrin, i els individuals amb una quota mínima de 1 pta. l'any, pagada també per endavant:

Art. cinquè. — La «K. E. F.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable per meitat cada any, compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Vice-caixer, Bibliotecari, Administrador, primer Vocal i segon Vocal.

Integrarà aquest Comitè un o més socis de cada Centre, agrupació, etc. federats, com a propis representants o delegats, i en una tercera part serà integrat per individus no associats com a representants dels federats isolats.

Els càrrecs indicats en primer lloc s'entenen desempenyats pels organismes als quals pertanyen els delegats i per tant els organismes propietaris dels càrrecs podran, sempre que ho creguin convenient, canviar llurs delegats.

Altre criteri que hi ha sobre aquests últims punts:

Els membres associats i els individuals elegiran proporcionalment els membres del Comitè Directiu.

Les entitats adherides a la «K. E. F.» designaran els membres de llur si que hagin de figurar en la Directiva, podent-los substituir solament en cas de dimissió.

Art. sisè. — Sense modificació.

Art. setè. — Afegir-hi: Pels debats dels assumptes pertanyents a les assemblees, es nomenarà la taula de discussió en el moment de la constitució de les mateixes.

Art. vuitè. — Sense modificació.

Art. novè. — Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu a les assemblees anyals, però sols podrà votar llur delegat, qui tindrà tants vots com agrupats tingui l'entitat per ell representada, i els federats isolats tindran veu i vot.

Art. desè. — Sense modificació.

Art. onzè. — Canviar els mots «la catalana» per «excepcionalment les que es tingui per convenient».

Art. dotzè. — Aquesta Federació podrà actuar mentres compti amb quatre col·lectivitats organitzades i 30 membres isolats. En cas de dissolució, previ acord de la mateixa, l'actiu que existeixi serà entregat a les institucions oficials de l'Esperanto.

Art. transitori. Igual.

«Ĉar la kvinpeseta jarkotizo apenaŭ sufiĉas por la vivo de la Federacio kaj ĝia gazeto, kaj kun la celo ke estu pli da mono destinota al la ĝenerala propagando, ni proponas ke de nun la kotizo estu kvin pesetoj por ĉiu duonjaro».

Joan Amades, Joan Castells, Jaume Grau, Romà Guardiet, Jaume Pruna, Ramón Soler.

Clau Esperanto

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeditada per la F. C. d'E.

Conté la gramàtica i vocabulari, amb text de propaganda a la coberta, relatiu als darrers progressos de la llengua internacional.

Preu: 10 cèntims

100 exemplars: 6 ptes.

Literatura Mondo

Monata gazeto, ilustrita, grand-formata, almenaŭ 20-paĝa.

Interesa enhavo kaj bonega stilo. Originalaj esperantaj verkoj kaj tradukoj el ĉiuj lingvoj.

JARABONO : 12 PESETOJ

K. E. F. akceptas abonojn

Andrássy-ut, 81.

BUDAPEST

Th. Cart

Kolekto de la Akademio

VORTARO

de la oficialaj radikoj

DE ESPERANTO

kun Antaŭparolo, la Fundamento kaj listo de la ĉefaj landnomoj

PREZO : 1 franko

Ĉiu esperantisto aĉetu ĝin!

Esperantista Centra Librejo

51, RUE DE CLICHY

PARIS

CURS PRÀCTIC DE LA LLENGUA

ESPERANTO

PER FREDERIC PUJULÀ I VALLÈS,

amb les regles gramaticals, exercicis en Esperanto i en Català, i vocabulari Català - Esperanto.

SEGONA EDICIÓ

PREU: 0'75 PTES.

Federació Catalana d'Esperantistes

CARME, 30 - BARCELONA



23 GRUPS ADHERITS I 500 MEMBRES INDIVIDUALS

Aquesta entitat, fundada poc després del V Congrés Esperantista Universal a Barcelona, en 1909, amb l'objecte (Art. 2.^{on} dels Estatuts) *d'unir tots els esperantistes de terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto*,

CELEBRA anyalment, amb motiu de la seva reunió general, brillants Congressos Esperantistes, portant-ne ja 9 de realitzats a Sabadell, Tarragona, Terrassa, Olot, Sant Feliu de Guíxols, Vilanova i Geltrú, Reus, Manlleu i Girona, i en preparació el desè a Manresa.

ORGANITZA els Jocs Florals Internacionals que són celebrats simultàniament amb els nostres Congressos, contribuint així a l'enriquiment de la literatura esperantista.

PUBLICA com a orgue federatiu la revista mensual «Kataluna Esperantisto», gratis per als adherits, en la qual apareixen interessants informacions sobre el moviment esperantista mundial, ultra excel·lents traduccions de literatura catalana i treballs premiats en els esmentats «Jocs Florals Esperantistes».

EDITA, a mesura de les seves possibilitats, opuscles de propaganda i ensenyament de la llengua internacional.

COL·LABORA a la celebració d'actes de propaganda, com conferències, obertura de cursos, exposicions, visites, etc.

ATORGA títols de Professor d'Esperanto, segons condicions estatuïdes en el II Congrés a Tarragona, i d'acord amb els membres catalans del «Lingva Komitato».

CUIDA, en general, de coordinar els esforços dels adeptes de l'Esperanto a Catalunya, i

REPRESENTA la nostra nació davant la Organització Esperantista i en els Congressos Esperantistes Universals.

ADHERIU-VOS-HI!

QUOTA ANYAL: 5 PTES.

KATALUNA ESPERANTISTO

(L'ESPERANTISTA CATALÀ)

MONATA GAZETO, ORGANO DE LA



DUA EPOKO - JARO III^a : APRILO-MAJO 1923

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉ (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (i), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba

LA

article determinatiu

el, els

la, les

J

(sona j)

forma el plural

faktoj, manoj

okuloj, animoj

IN

sufixe per a formar el femeni

sinjorino, regino

katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto

urbo

komerco

(comerç)

A

terminació adjectiu

blanka

antikva

komerca

(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni

labori

komerçi

(comerciar)

E

terminació adverbial

klare

konstante

komerce

(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

mode condicional

U

mode imperatiu o subjunctiu

Mi skribas

skribis

skribos

skribus

skribu

Jo escrie

escrigii

escriurè

escriuria

escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti* i les formes de participi *ant, int, ont* (actiu: present, passat i futur) i *at, it, ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta, jo estic esribint. La letero estis skribata*, la lletra fou escrita.

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En Esperanto, tota paraula que reb l'acció d'un verb (complement directe) va seguida de la lletra **N**.

Li vidas min. Ell em veu.

Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escrib la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius s'expressa per mitjà de les preposicions *al, de, kun, per, sur, super, sub, en, ekster, tra, trans, antaŭ, post, inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

X^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Manresa : 1-2-3 Aprilo 1923



ALFACILA tasko estas redakti raporton pri io tiel hela, kiel la longa kaj emociplena festaro de la Kongresoj de Katalunaj Esperantistoj, kun ilia ĉefa allogo: la ravanta festo de la Internaciaj Floraj Ludoj. Nunjare nia kongreso estis, ĉeestata de samideanoj katalunaj, hispanaj, francaj, anglaj kaj germanaj, fakte internacia. La bona akcepto de la urbo, la soleno kaj pompo de ĉiuj okazintaĵoj, la ĉiuflanke bona organizo, ĉio egaligis kaj eble superis la du antaŭe plej sukcesintajn Kongresojn: tiujn de Reus kaj Girona.

ASPEKTO DE LA URBO

Manresa feste ornamis sin por akcepti la Kongresanojn. Sur la strato Born, starigita de la Urbestro, estis triumfa arkaĵo kun kataluna surskribo: «Manresa al X^e Congrès de la Federació Catalana d'Esperantistes». Antaŭ la «Hotel S. Domingo» pendis

grandega flago esperantista kaj aliaj malpli grandaj pendis ankaŭ super kelkaj stratoj. Super la mezo de la strato, antaŭ la «Orfeó Manresa», vidigis du grandaj esperantaj surskriboj: «Akceptejo» kaj «Esperanta Ekspozicio». Je la fino de «Promenejo Pere III», sur la fasado de «Centre Autonomista de Dependents», brilis dum nokto luma kvinpinta verda stelo. La Bazono Jorba ornamis per tapiŝoj balkonojn kaj fenestrojn. Tuj post ilia alveno, estis elmetataj ĉe la centraj balkonoj de la Urbdomo la verdaj standardoj de niaj Grupoj. Multloke vidigis belaj murafiŝoj pri la Kongresaj festoj. Kaj ĉie konstante svarmis tra la urbo la kongresinsignoj de la multnombraj gesamideanoj.

LA MANRESA GAZETARO

Niaj kutimaj legantoj jam scias ke la Manresa gazetaro estas tre favora al Esperanto. Nova pruvo pri tio estas la fakto, ke la du ĵurnaloj «Patria» kaj «El Pla de Bages» dediĉis eksterordinaran numeron al la Kongreso.

Tiuj eksterordinaraj numeroj aperis unu tagon antaŭ la alveno de la esperantistoj, preparante tiel la enurbanojn al la bona akcepto kiun ili faris al ni. La numero de «Patria», redaktata katalune, hispane kaj esperante, enhavis varman «Saluton» de la Redakcio, biografion pri D-ro Zamenhof kun lia portreto, kelkajn portretojn i. a. de la Reĝino de la Floraj Ludoj kaj laŭreata poeto, propagandajn artikolojn, de Sinjoroj Josep Albagés, Delfi Dalmau, Estanislau Guilà, Marian Solà, F. Albanell, Pastro Josep Casanovas, Felip N. Pujadas kaj Jaume Grau Casas, kaj kongresajn sciigojn. La numero de «El Pla de Bages», redaktata nur katalune, ankaŭ publikigis Redakcian artikolon, kongresan programon kaj artikolojn de la Prezidanto de la Organiza Komitato S-ro Josep Albagés, pri la Kongreso, kaj de D-ro Bremón, pri Esperanto kaj la kataluna literaturo.

DIMANĈO, 1

ALVENO DE LA KONGRESANOJ

Je la 10^a matene, atendis la kongresanojn, ĉe la stacidomo, Lia Urbestra Moŝto S-ro Suaña, la Prezidanto de la Komerca

Ĉambro S-ro Fermi Roca, S-ro Fructuós Verneda, el la Lernejo de Artoj kaj Metioj, aliaj reprezentantoj de lokaj societoj kaj multnombraj gesamideanoj. Inter la atendantoj vidiĝis la standardoj de la societoj «Orfeo Manresa», «Pomells de Joventut», «Centre Excursionista Avant» kaj tiu de la loka grupo «Bela Espero». Kiam la oficiala vagonaro eniris la stacion, resonis brua aplaŭdado kaj muzikistaro ekludis la esperantan himnon. Estis emociaj momentoj tiuj de la elveturo de la Kongresanoj, dum la standardoj de niaj Grupoj respondis la salutojn de tiuj de la lokaj societoj Post prezentadoj kaj salutadoj, oni demonstracie iris al la Urbdomo, tra irante solene la stratojn Picas, P. Olm, Born, Muralla, Pilota, Sobrerroca kaj Plaça Major. Ĉe strato Born, jam en la mezo de la urbo, dum oni trairis sub la arko de triumfo, ornamita per la flagoj kataluna kaj esperanta, denove aŭdiĝis nia himno «La Espero».

AKCEPTO ĈE LA URBDOMO

En la historie fama salono de la Manresa Urbdomo, okazis kun plej granda soleneco la Akcepto de la Kongresanoj kaj Malferma Kunsido. Eksidis ĉe la prezida loko Sinjoro Urbestro, akompanata de multaj urbkonsilantoj kaj aliaj aŭtoritatuloj, reprezentantoj de societoj, la membroj de la Komitatoj de la Kongreso, de la Federacio, de la loka grupo «Bela Espero», kaj delegitoj de ĉiuj katalunaj Grupoj.

La Urbestro S-ro Suaña salutis la Kongresanojn per elokventaj vortoj, dankis la elekton de Manresa kiel kongresurbo, esprimis bondezirojn por la sukceso de la kongreso kaj proponis sian fervoran helpon al ĉiu esperanta entrepreno.

Respondis al Sinjoro Urbestro, nome de la esperantistoj, S-ro Jaume Grau, Redaktoro de *Kataluna Esperantisto*. Li dankis la bonegan akcepton de la urbo, feste ornaminta sin por la Kongreso, kaj laŭdis la intelektan vigelecon de la Manresanoj, kies urbo estas fama ne nur pro sia industriemo, sed ĉefe pro sia amo al la kulturaj aferoj. La nomo de Manresa de nun hele brilos en la kataluna esperantista movado, kaj la esperantistoj longe rememoros la aparte bonan akcepton de la urbo al la esperanta ideo.

Forta aplaŭdado sekvis la paroladojn de Sinjoro Urbestro kaj S-ro Grau.

MALFERMA KUNSIDO

S-ro Josep Albagés, Prezidanto de la O. K. de la Kongreso, legas leteron de Lia Moŝto Markizo de Carulla, Rektoro de la Barcelona Universitato kaj Prezidanto de la Honora Kongresa Komitato, sciigantan ke li ne povas ĉeesti kaj delegantan S-ron Albagés por la prezido de la Kongreso. Tiu ĉi lasta, meze de entuziasma ovacio, siavice proponas la kongresan Prezidon al Sinjoro Urbestro, kiu deklaras la Kongreson malfermita.

Forlasinte la katalunan lingvon por uzi Esperanton S-ro Albagés sin turnas al la kongresanaro ĝojante pri la sukceso atingata kaj rakontante pri la movado en sia urbo. Longaj aplaŭdoj sonas post la elokventaj vortoj de S-ro Albagés, ĉela organizinto de la kongreso.

Poste prenas la parolon la Prezidanto de la «Kataluna Esperantista Federacio», S-ro Joan Amades. Meze de profunda silento li komencas en Esperanto sian paroladon, kiu estas elokventa skizo pri la historio de la «Kataluna Esperantista Federacio». S-ro Amades rimarkigas ke nia Federacio povis travivi ĉiujn malfacilajn momentojn kaj malgraŭ ĉiuj malhelpoj sukcesis organizi jam la dekan el siaj kongresoj. Tio kuraĝigu nin al plua laborado por la bono de Esperanto en Katalunujo.

Aprobaj aplaŭdoj aŭdiĝas je la fino de la prezidanta parolado.

SALUTADO DE LA DELEGITOJ

Salutis la Kongreson per mallongaj paroladetoj, preskaŭ ĉiuj en Esperanto, la jenaj delegitoj:

S-ro Josep Canales, el «Nova Sento» (Barcelona); S-ro Jacinto Comella, nome de «Esperantista Amikeco» (Manlleu) kaj «Vika Esperantistaro (Vich); S-ro Felip N. Pujadas, el «Bela Espero» (Manresa); S-ro Josep Guixà, Prezidanto de «Barcelona Stelo» (Barcelona); F-ino Palmira Castellví, el «La Metiisto» (Barcelona); S-ro Eusebi Artigas, Prezidanto de Esperantista So-

cieto «Aplec» (Sabadell); S-ro Ramón Marsà, el la Grupo Esp. de «Fraternitat Republicana» (Terrassa); S-ro Joan Castells, el «Esperantaj Kantistoj» (Barcelona); S-ro Joan Riera, el «Studenta Juneco» (Girona); S-ro A. Oliart, el «Esperanta Junularo» (Terrassa); S-ro Sebastià Chaler, el «Lumon» (Terrassa); S-ro Ramón Soler, el «Ĉiam Antaŭen» (Barcelona); S-ro J. Alberich, el «Paco kaj Amo» (Barcelona); S-ro Romà Guardiet, el «Semo» (Enciklopedia Popola Ateneo, Barcelona); S-ro Pastro Josep Casanovas, nome de «Girona Espero» (Girona) kaj «Empordana Ebenajo» (Armentera); S-ro Pastro Josep Planas, el «Esperanta Nesto» (Ripollet); S-ro Francesc Sagrera, el Palafrugell; S-ro Pere Domènech, el Vilassar de Mar.

Aparte ni devas citi la paroladojn, ankaŭ salutantajn la Kongreson, faritajn de S-ro Doktoro Jacinto Bremón, Lingva-Komitatano, kiu rekomendis la plenan fidelecon al la Fundamento, rekomendo feliĉe nenecesa por la kataluna esperantistaro; de S-ro Arthur Dix, nome de tri germanaj junuloj loĝantaj en Terrassa; de S-ro Henri Isnard, el Marseille, kiu salutis nome de la Sudorienta Federacio de Francujo kaj dediĉis kelkajn afablajn vortojn al la katalunaj samideanoj.

Oftaj aplaŭdoj interrompis la parolantojn. Kiam iu, por danki la francan ĝentilecon de S-ro Isnard, ekkriis: «Vivu la Francaj samideanoj», alia responde diris: «Vivu la Germanaj esperantistoj», kaj tria finis per: «Vivu la Samideanoj tutmondaj», kronata de ĝenerala ovacio.

La Urbestro stariĝis, finante la kunsidon, kaj oni kantis la Esperon meze de granda entuziasmo kaj krioj «Vivu Manresa!».

Kiam la kongresanoj eliris el la Urbdomo, oni fotografis kaj filmis ilin.

VIZITO AL LA AKCEPTEJO

Elirante el la Malferma Kunsido, multaj el la Kongresanoj sin turnis al la Akceptejo, bone instalata ĉe «Orfeo Manresa», kie oni enskribis sin por la Oficiala Festeno kaj Ekskursoj kaj estis disdonata senpage la Kongresa Libro.

LA KONGRESA LIBRO

Tiu ĉi libro, tre luksa, 88 - paĝa, presita per du inkoj sur bona papero, estis donaco de la Organiza Komitato al la federaciaĵoj ĉeestantaj la kongreson. Ĝia enhavo estas: «La Espero», Portreto de D-ro Zamenhof, Honora Komitato, Organiza Komitato, Programo, Kongresaj Sciigoj, Protektantoj de la Kongreso, Manresa Grupo «Bela Espero», Priskribo de la kongresurbo kun gravuraĵoj, Ekskursoj al Cardona, Sant Benet de Bages kaj Montserrat, Direkta Komitato de K. E. F., Grupoj aliĝintaj, Konsulta Komitato, Redakcio de «Kataluna Esperantisto», Nomaro kaj adresaro de la membroj de K. E. F., Paĝoj por aŭtografoj, kaj anoncoj. La tuta teksto estas en Esperanto kaj la anoncoj en lingvoj kataluna, hispana kaj esperanta.

ESPERANTAJ EKZAMENOJ

Je la 4^a posttagmeze okazis la esperantaj ekzamenoj ĉe la Komerca Ĉambro. Konsistigis la tribunalon s-roj Joan Amades, Jacinto Bremón, kaj Delfi Dalmau. Post unuhora ekzamenado, oni aljuĝis la diplomon pri Kapableco al S-roj A. Llobet kaj J. Riera-devall.

LABORA KUNSIDO

Ĝi okazis, je la 5^a, ĉe la «Komerca Ĉambro», en vasta kaj luksa salono. Prezidis S-ro Joan Amades, akompanata de la ceteraj Komitatoj S-roj Romà Guardiet, Jaume Claramunt, Joan Castells, Pere Navas, Ramón Soler, Jaume Pruna kaj Jaume Grau. Ĉeestis preskaŭ ĉiuj Kongresanoj.

Tuj post la malfermo, la Sekretario S-ro Romà Guardiet, legis la jenan raporton:

«Gefederaciaĵoj:

Laŭ siaj fortoj klopodis nia Komitato, elektita dum la lasta Kongreso en Girona, ĝenerale vigligi la esperantistan movadon kaj speciale atenti pri la plifortigo de la Kataluna Federacio kaj plivastigo de ĝia agado. Kvankam ne ĉio dezirata estas atingita, tamen estas sufiĉe grava la efektivigita tasko, tiel el la vidpunkto de la propagando kiel el tiu de la organizo. Ni esperas, ke la epoko de postmilita restarigo de la esperanta enlanda organizo estas finita, kaj baldaŭ ni firme reprenos la antaŭeniradon.

Permesu al mi diri, tamen, ke nia lastjara laborado estus estinta multe pli fruktodona, se la malatento aŭ prokrasto de multaj samideanoj pagisian kotizon, ne estus pliakriginta la jam malfacilan financon situacion de nia organizajo. Al tiu problemo, ĝis nun ne solvita, ni estis devigataj turnian tutan atenton, kaj tia malfacilaĵo devigis nin forlasi kelkajn allogajn projektojn. Ni esperu ke tio dum la venonta jaro estos evitata.

Plenumante la decidojn de nia Naŭa Kongreso, ni gratulis la dek tri delegitojn favorajn al Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, esprimis dankon al la Vic-sekretario de la Ligo pro lia esperantemo, kaj proponis al la Ĝenerala Sekretario informi lin pri la stato de Esperantismo en nia lando.

Baldaŭ ni ricevis oficialan demandaron de la nomita Ligo koncerne Esperanton, kaj ni respondis al ĝi per longa kaj zorge redaktita dokumento.

Ricevinte inviton partopreni la gravan kaj tre sukcesintan Konferencon pri Instruado de Esperanto en Lernejo, okazintan en Ĝenevo de la dek-naŭa ĝis la dudek unua de Aprilo mil naŭcent dudek du, kaj en la neebleco sendi delegitaron, ni esprimis nian aliĝon al ĝi.

Ankaŭ nur skriban aliĝon ni povis doni al la Dek-Kvara Universala Kongreso en Helsinki, ĉar la sola kataluna samideano ĝin ĉeestinta forgesis antaŭsciigi nin pri sia intenco veturi Finnlandon, per tio malebligante ke ni nomu lin nia delegito.

De la organizantoj de la malsukcesinta Franca Kongreso en Béziers ni ricevis inviton ĉeesti, kaj tiucele ni entreprenis la organizon de kataluna karavano. Bedaŭrinde, kiam kvindeko da veturontoj estis enskribita, trafis nin la sciigo pri ne okazo de la Kongreso en Béziers.

Invititaj de Sinjoro Generalo Sebert, provizora Prezidanto de la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj, nomi delegiton de «Kataluna Esperantista Federacio» por tiu Reprezentantaro, ni respondis elektante tiucele nian Vic-prezidanton Sinjoron Joan Amades. Al la propono ke nia Federacio pagu jarkotizon, proporcie kun la nombro da federacianoj, por la subteno de la oficialaj Lingvaj kaj Organizaj institucioj, ni respondis akceptante ĝin principe, sed kun la rezervo ke ni submetos nian provizoran akcepton al la sankcio de la venonta Kongreso de K. E. F. Al tio ĉi rilatas propono baldaŭ prezentota al vi.

La Organiza Komitato de «Unua Kongreso de Iberia Esperantista Konfederacio», okazonta dum la proksima Pentekosto en Valencia, invitis nin partopreni en ĝi, kaj ni respondis proponante nian plenan helpon al tiu Kongreso kaj al la Iberia Konfederacio, el la vidpunkto de la propagando.

Al la Konferenco pri Esperanto en Komerco kaj Turismo, en la nunaj momentoj okazanta en Venezia, ni esperis povi sendi delegiton, sed pro fina neebleco ni sendis nur aliĝon. La nombro da vojaĝemaj aŭ vojaĝopovaj samideanoj inter ni estas ja malgranda!

Nia Federacio akceptis membrecon ĉe la Komitato de Tutmonda Monokolekto por Monumento al Doktoro Zamenhof, kaj laŭeble helpis tian laŭdindan entreprenon, mendante certan nombron da kuponkartoj. Ni dis-

sendis ilin al la Grupoj aliĝintaj kaj espereble baldaŭ ni devos peti novajn.

Rilate la propagandon pri nia lingvo, kun aparta ĝojo mi konstatas la neatenditan sukceson de Esperanta informejo instalita en la tria Barcelona Foiro de Specimenoj, okazinta de la dek-kvina ĝis la dudek-kvina de Marto mil naŭcent dudek du, kaj ankaŭ en la kvara Foiro, de la deksepa ĝis la dudek-oka de Marto mil naŭcent dudek tri. La Foiro ne nur uzis Esperanton en siaj korespondaĵoj, presajoj kaj afiŝoj, sed ankaŭ disponigis duoblan standon por la Esperanta Propagandejo instalita kaj zorgita de K. E. F., kun la helpo de la Barcelonaj Grupoj. Krom tio, la Foiro dufoje permesis solenan viziton de la esperantistoj, kiuj estis kore akceptataj de la Direktoro Sinjoro Barceló kaj de la Sekretario Sinjoro Pujulà, nia eminenta kaj neforgesebla pioniro. Estas nia devo danki Sinjoron Pujulà, pro lia certa influo en la esperantema agado de la Foira Direkcio.

Ankoraŭ dankon al li, pro lia donaco al la Federacio de multaj ekzempleroj de siaj verkoj, por vendado.

Krom multaj miloj da flugfolioj, K. E. F. eldonis triafoje grandan nombron da Katalunaj ŝlosiloj. Neeble estis entrepreni eldonadon de pli kompletaj lernolibroj, kiel ni deziris.

Reprezentanto de la Federacio estis sendata al multaj esperantaj kunvenoj, ekspozicioj, paroladoj, k. t. p., kies arangon ni ĉiam laŭeble helpis. Tiaj okazintaĵoj havis lokon en Barcelona, Sabadell, Terrassa, Manresa, Ripollet kaj Anglès.

Du novaj Grupoj esprimis sian aliĝon al K. E. F.: «La Metiisto» kaj «Ĉiam Antaŭen» el Barcelona. Multajn novajn Federacianojn ni varbis, sed pli multajn ni perdis pro ordinara ekŝiĝo aŭ pro ekŝiga decido de la Direkta Komitato, antaŭ nepago de jarkotizoj.

Kaj jen, antaŭ ol fini, permesu ke mi rimarkigu la valoron de la tri ĉefaj aferoj sukcese efektivigataj de nia Federacio, kiuj solaj devus kontentigi la plej postulemajn samideanojn, ĉefe se oni konsideras la neŝufiĉecon de la kvinpeseta jarkotizo kaj la ne ankoraŭ ŝufiĉe grandan nombron da Federacianoj. Mi aludas la arangon de niaj Katalunaj Kongresoj, la malfacilan kaj penplenan organizon de la Internaciaj Floraj Ludoj, la publikigon de nia gazeto «Kataluna Esperantisto». Ĉefe dank' al la laboremo de la Lokaj Komitatoj, la katalunaj samideanoj solaj en la mondo povas ĝui Kongresojn tiel brilajn kiel la nuna kaj tiu lasta en Girona, sen devo pagi ian kongreskotizon kaj ankoraŭ ricevante senpagan kongreslibron; oni povas partopreni sen ia elspezo la Internaciajn Florajn Ludajn, kiuj oferas ĉiujare pli valorajn premiojn; oni regule ricevas nian organon «Kataluna Esperantisto», kiu estas farata kun tuta amo kaj zorgo, en bonaj papero kaj presado; ĉio ĉi, dank' al plej malalta jarkotizo... kaj al netakseblaj klopodoj de kelkaj fervoregaj kaj meritplenaj samideanoj.

Tiuj ĉi sinceraj kaj varmaj vortoj nur celas instigi ĉiujn al pli aktiva helpo, al pli bonvola konsiderado, al pli ĝusta kaj justa kritikado. Mi ne

volis laŭdi nin mem; mi ne intencis diri ke nia Federacio faris ion eksterordinaran; mi volas diri ke la laboro de tiu ĉi Direkta Komitato dum dek-ok monatoj estis tre peza, kaj ni bezonas vian amikan manpremon».

ROMÁ GUARDIET

La Sekretaria Raporto estas aprokata per aplaŭdoj.

Sekve de tiu aprobo, la Kongreso ankaŭ aprobas la jenan proponon de la Komitato :

«La Kongreso sankcias la provizoran decidon de la D. K. pagi jaran kotizon al la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj, proporcie kun la nombro de niaj anoj».

La Komitato klarige respondas al kelkaj demandoj pri la propono.

Poste estas legataj kelkaj telegramoj kaj leteroj, kiuj aliĝas kaj salutas la Kongreson, de :

S-ro Frederic Pujulà i Vallès, el Venezia, partoprenanta la Esperantan Konferencon pri Komerco kaj Turismo, kun la reprezentanto de K. E. F.; S-ro Jordana de Pozas, el Valencia, Prezidanto de la tiea Federacio, kiu invitas nin al la venonta Valencia Kongreso; S-ro Enric Aguadé, el Reus; Grupo «Nova Semo», Reus; S-ro Costa, Santa Coloma de Farnés; Grupo «Esperanta Idealo», Santa Coloma de Farnés; S-ro Mañez, el Cheste; Grupo «Tarragono Esperanta» el Tarragona; Grupo «Empordana Ebenaĵo», el Armentera; S-ro Periquet, Militista Ĉefo de Manresa, kiu ne povas ĉeesti; S-ro Emilio Gastón, el Zaragoza; Pastro Antoni Ribas, el Vich; Fraŭlinoj Maymí kaj Colls, el Girona; Grupo «Esperantista Amikeco» el Manlleu; S-ro Julio Mangada, el Melilla; S-ro Conrad Domènech, el Girona.

Aparte citinda estas la poŝtkarto ricevita de S-ro Cart, la eminenta Prezidanto de la Akademio, kun koraj salutoj al la Kongreso kaj kuraĝiga «Vivu Esperantista Katalunuj!»

Oni petas de la angla samideanino F-ino Louise Briggs, el Leeds, kaj de S-ro Maynar, el Zaragoza, ĵus alvenintaj al la Kongreso, ke ili bonvolu honori nin per sia parolo.

La eminenta verkistino Louise Briggs, nunjare Juĝantino de la Floraj Ludoj, emociite stariĝas, meze de forta aplaŭdado, por saluti la Kongreson nome de la «Brita Esperantista Asocio». Ŝi

dankas ke oni honoris ŝin per ŝia posteno en la Floraj Ludoj, kaj laŭdas la literaturan konkurson kaj la bonegajn verkojn por ĝi ricevitaĵn. Ŝi diras, ke la premioj antaŭ jaroj atingitaj de ŝi en nia hela festo, multe kuraĝigis ŝin en ŝiaj literaturaj laboroj. Ŝi finas sian belan kaj mildan paroladon, dezirante ĉian sukceson al niaj Katalunaj Kongresoj kaj al la Floraj Ludoj. Ovacio aŭdiĝas por montri nian simpatian al la eminenta angla gastoj.

Aplaŭdo salutas ankaŭ S-ro Maynar, el Zaragoza, Prezidanto de la «Aragona Esperantista Federacio» kiam li ekstaras. Per varmaj vortoj li esprimas sian ĝojon ĉeesti la kongresojn de la Kataluna Federacio, kiuj ĉiujfoje atingas pli grandan sukceson. Li kore salutas nin kaj esprimas bondezirojn al nia laboro. Vigla aplaŭdado sonas post la vortoj de nia altestimata amiko S-ro Maynar.

S-ro Grau sciigas al la Kongresanoj, ke ĝuste en la hodiaŭa tago enŝipiĝas en Ameriko, por reveni Eŭropon, nia kara amiko kaj estimata Prezidinto S-ro Joan Gili Norta, kiu tiom distingigis en sia laboro por K. E. F. Li petas, ke oni dediĉu al samideano Gili Norta amikan rememoron per laŭta aplaŭdo. Ĉiu ĝoje plenumas la peton, turnante la rigardon al la ĉeestanta fratino de nia amiko Gili, la simpatia Fraŭlino Maria, kiu emocie salutas.

La Kasisto, S-ro Joan Castells, prenas la parolon por fari finanĉan raporton kaj legi la bilancon, kiu estas aprobata. La Kongreso aprobas voĉdonon de danko al la presisto S-ro Vinyals, por lia bonvolemo en momentoj de financa krizo. S-ro Castells energie atentigas la federacianojn, por ke la situacio de nia kaso estu ĉiam regula kaj bona.

Oni diskutas la prezentitan proponon pri reformo de la Federacia regularo, kaj ĝi ne estas aprobata.

La Kongreso decidas nur reformi la paragrafon pri la Komitatanoj, tiamaniere ke ili ĉiuj ĉesu unu jaron post ilia elekto.

Post kelkaj diskutoj, estas ne aprobata la propono plialtigi la jarkotizon ĝis 10 pesetoj; oni decidas ke ĝi estu 6-peseta, de la komenco de la jaro 1924.

Estas decidate danki la «Ateneu Enciclopèdic Popular», kiu malavare loĝigas la Federacion.

Fine la kongreso esprimas sian dankon al la Loka Organiza

Komitato por la bona aranĝo de la Kongreso, kaj speciale al ĝia Prezidanto nia karega amiko S-ro Josep Albagés.

Oni lasas por la Ferma Kunsido la elekton de nova Komitato kaj venonta Kongresurbo.

INAUGURA FESTO DE LA PROPAGANDA EKSPOZICIO

Je la 10^a vespere estis solene malfermata ĉe «Orfeo Manresa», en vasta salono apuda al la «Akceptejo», tre bone instalita Ekspozicio de esperantaĵoj. La altaj muroj estis bele ornamitaj kaj speciale altiris ĉies atenton du landkartoj: en unu estis montrataj ĉiuj urboj kie okazis universalaj kongresoj, en alia la dek urboj de niaj naciaj kongresoj katalunaj.

S-ro Albagés diris kelkajn vortojn malfermante la Ekspozicion al la publiko, kaj poste faris du elokventajn propagandajn paroladojn en kataluna lingvo S-roj Marian Solà kaj Delfi Dalmau.

Fraŭlino Palmira Castellví kantis per belega voĉo, kiu entuziasmigis kaj vekis bruajn aplaŭdojn, la jenajn kantojn: La Espero, Hejmo dolĉa nom' (angla), Hieraŭ min petis knabin' (aŭstra), Larmifloretoj (bohema), Jen lando kun arbar' (dana), Amespero (finlanda), Monto de Canigou (franca), Kanto al Marianeto (kataluna), Venecia gondolkanteto (itala) kaj La Vojo.

Fine, la germanaj samideanoj S-roj Dix, Seiffert kaj Schaaf ludis per gitaro kaj mandolino kaj kantis kelkajn aliajn pecojn germanajn kaj esperantajn.

Ĉiuj, esperantistoj kaj neesperantistoj, eliris tre kontentaj pri la ĉarma kaj plensukcesinta festo. La ekspozicio estis dum kelkaj tagoj tre vizitata.

LUNĈO KAJ BALO EN LA MANRESA KAZINO

Kvankam la Ekspozicia festo daŭris ĝis noktomezo, la plejmulto el la kongresanoj iris ĉeesti la balon dediĉitan al ili de la plej grava kaj riĉa societo de Manresa. Estis disdonitaj multaj invitiloj, bele presitaj, en kataluna lingvo kaj esperanto, kaj la grandega danssalono de la kazino, lumigita de kvin mil diverskoloraj elektraj lampoj, pleniĝis de la plej ĉarmaj Manresa-

ninoj, distingindaj sinjoroj kaj gajaj kaj dancemaj geesperantistoj.

Post ioma dancado, la kongresanoj estis regalataj per lunĉo, kiun al ili proponis la reprezentanto de la Kazino S-ro Casanovas. Al li danke respondis por la esperantistoj S-ro Grau. Ĉe la ĉampano, tostis por la Kazino, por Manresa, por Katalunujo, por Esperanto, por la Kongreso, por la Floraj Ludoj, por la ĉeestantaj belulinoj, S-ro Suaña, Urbestro; la franca samideano S-ro Isnard; la germana junulo bonhumora Dix; S-ro Solà, Sekretario de la Floraj Ludoj; S-ro Pujadas, Prezidanto de la Gazetara Asocio de Manresa; kaj ankoraŭ kelkaj aliaj. Laŭ insista peto, F-ino Castellví bonvolis denove aŭdigi al ni sian belan voĉon, kantante la katalunan «Cançó d'Abril».

Ĝis frumatene daŭris la dancado kaj ni forlasis la Kazinon, kun plej granda danko pro ĝia malavareco kaj gastigemo. Tiel finiĝis la unua tago de la kongreso, plena de emocioj kaj lacigoj, fizikaj kaj moralaj... kaj tio estis nur preparo por la dua tago, kun la Floraj Ludoj kaj la Festeno.

LUNDO, 2

ESPERANTA DISERVO

Je la 8^a matene en la Preĝejo de la Kavoj de Sankta Ignacio, tiel fama pro sia arto kaj riĉeco, okazis tre solene la Esperanta Diservo, kun ĉeesto de multnombraj Kongresanoj.

La eminenta samideano Pastro Josep Casanovas, Prezidanto de la Organiza Komitato de nia lasta Kongreso en Girona, faris la kutiman predikon en flua, bonega kaj milda Esperanto. Li elokvente glosis en sia prediko la tekston: «Mandatum novum do vobis: ut diligatis invicem sicut dilexi vos». Joan. XIII, 34. «Novan ordonon mi donas al vi: ke vi amu unu la alian». (Vortoj el la Evangelio de Sankta Johano, ĉapitro XIII^a, verseto 34^a). Ni konstatis, dum la prediko, ke multaj ĉeestantoj miris pri la beleco de Esperanto kaj komprenebleco de multaj vortoj por niaj enlandanoj. Kantis dum la diservo la altvalora «Manresa Orfeono».

IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

RUTIME ĝi estas la plej bela okazintaĵo kaj la plej sole-
na ornamo de niaj Kongresoj : malfacile estas doni
ideon kaj fari raporton pri la aspekto de la teatro kie
tiu nia brilanta Festo okazis. Tiu teatro estas la *Tea-*
tre Conservatori, la plej vasta kaj komforta salono el la Kongres-
urbo. La scenejo estis propre ornamita por la konvena okazigo
de la solenaĵo, kun alta kaj luksa trono por la Reĝino kaj aro de
brakseĝoj por la Fraŭlinoj de la Ama Kortego.

Je la komenca horo la tuta teatro estis plena de ĉeestantoj :
la parteroj estis rezervita por la esperantistoj kaj la ceterajn sid-
lokojn sur logioj kaj etaĝoj de la teatro plenigis granda amaso
da enurbanoj kontentaj honorigi nian movadon per sia ĉeesto al
la Festo de la Floraj Ludoj. Fotografistoj kun siaj aparatoj loki-
ĝis en siaj strategiaj postenoj por preni kliŝaĵojn de la okazon-
taĵoj.

Vere estis tre bela kaj kontentiga la aspekto de la granda sa-
lono, kie oni nur aŭdis la zumadon de intermiksitaj interparola-
doj. Subite la muzikistaro ekludas himnon kiam trairas meze de
la parteroj, sin direktante al la scenejo, la longa vico de Aŭtorita-
tuloj preziditaj de la Urbestro kaj la samideanoj kiuj konsisti-
gas la Juĝantaron de la Konkurso; sur la scenejo sidiĝas dekstre
Lia Urbestra Moŝto, la Urba Juĝisto, S-ro Re prezentanto de la
Militista Regimento, k. c., maldekstre la Juĝantaro de la Floraj
Ludoj, reprezentata de F-ino Louise Briggs, S-roj Josep Albagés,
Delfi Dalmau, Marian Solà kaj ankoraŭ kelkaj membroj de la
Konservantaro de la Floraj Ludoj.

Lia Urbestra Moŝto S-ro Ignasi Suaña diras en Esperanto la
frazon «Oni malfermas la Feston».

Fariĝas silento kaj tuj stariĝas la Sekretario de la Juĝantaro
kiu per klara kaj laŭta voĉo eklegas sian raporton :

«Gesinjoroj :

Kun vera ĝojo kaj kun profunda emocio, la animo kontenta kaj sam-
tempe tremanta, mi rompas la silenton por doni komencon al tiu nia bri-
lanta kaj riĉopromesa Festo de la Poezio. La festo kiun dum la tuta jaro ni

esperplene atendas, la festo por kies aranĝo la plej bonaj plumoj laboris dum monatoj, la Festo de la Beleco, jen ĝi estas tuj disvolviĝonta. Baldaŭ alpaŝos la poetoj kiuj per deklamado de siaj kristalaj kaj harmoniaj strofoj milde lulos niajn orelojn aŭskultantajn.

Dolĉa, bongusta frukto tiu kiun distilas la arbo de la Poezio! Benataj estu ĝiaj kulturantoj, kiuj proponas ĝin al ni malavare, kaj per siaj kantoj kiujn la espero heligas, igas nin ami la vivon kaj la mondon! Benataj estu tiuj, kiuj la disigitajn kaj malordigitajn lingverojn scias tiel akorde kunligi kaj ordigi ke ili sangiĝas en ravantan muzikaĵon! Benataj estu tiuj, kiuj per siaj poemoj, jen vidigas al ni la ĝojojn kaj triumfojn de la homa vivo, jen plorigas kaj kortuŝas nin per la hela priskribo de niaj malgajaj sentoj, jen vibrigas nian animon per la ektuŝo de ĉio nobla, bela kaj sankta!

Kiu malkonos vian altan potencon, Poezio? Kiu ne submetiĝos bonvole kaj sorĉite al via alta trono? Kiu animo restos surda al viaj vokoj tiel gentile kaj plaĉe faritaj? Kiun spiriton ne revigos viaj regulaj agordoj?

Per lingvo ritmita, per lingvo imagoplana kaj poezia, sin turnas la homoj al Dio, ĉar neniu alia formo de lingvo estas inda je Lia potenco!

Per lingvo kantanta, milde sonanta kaj karesema, la patrino lulas sian infaneton karan!

Per lingvo, kiun la ama pasio igas poezia, la amanto malfermas sian koron vunditan kaj diras sian konfesion al la amatino!

Per lingvo simpla kaj naiiva, kun ritmo hela kaj kortuŝanta, la nacioj elmontras sian puran animon, kaj sian kuraĝan ekfloron en la unuaj momentoj de sia ekzistado!

Per lingvo forta kaj esprimpotenca, kiun la patrujamo igas batala, la popoloj ekkantas kun siaj himnoj la fidelecon kaj eternan amon al sia patrolando!

Lingvon preskaŭ forlasitan, malnoviĝintan, preskaŭ mortintan jam, vi poetoj, vi kantistoj, per la sorĉo de viaj ritmoj, per la vibrado de viaj lirikordoj, kaj per la enblovo de via spirito, elprenis el la dormantaj cindroj, kaj revivigis ĝin pli juna, pli bela, pli sangoriĉa kaj pli vivipova ol antaŭe!

Nia kataluna lando, nia amata nacio, ŝuldas al vi nepridubeble la ekziston kaj konservon de sia propra lingvo, la lingvo de niaj prapatroj, la lingvo de niaj kronikistoj, la lingvo de niaj reĝoj, de niaj glorioj kaj triumfoj, nia plej kara heredaĵo!

Miraklon similan, mirindaĵon saman, ni postulas de vi, poetoj kaj artistoj; de vi, ni volas, ke en la korpon de nia kara lingvo internacia, ke en la korpon de nia estimata Esperanto, vi enblovu vian spiriton, soifantan de amo kaj beleco!

Ni volas ke per via talento kaj per via majstrecio, vi faru el ĝi, antaŭ la okuloj de la mondo, la plej disvastigitan, la plej senmortan, la plej ŝatatan lingvan kreaĵon.

Kaj tion vi povas fari!

Agrable kaj ĝojige estas sekvi ĉiujare la ĉiam progresantan kaj daŭran perfektigon de niaj esperantistaj verkistoj: plezure oni konstatas en ili ĉiam pli grandan antaŭeniron, pli vastan komprenon de la lingvo, pli facilan kaj artan ludon de ĝiaj elementoj, pli decidan majstrecon en la formo kaj pli aŭdacan kaj belsentigan spiriton.

La lingvo Esperanto en la manoj de siaj zorgoplenaj poetoj, iĝas ĉiam pli kaj pli mirinda, facila kaj fleksebla ilo, kiun ili scias uzi laŭ ĉiam pli perfekta maniero por la taŭga esprimo de siaj ideoj kaj sentoj. Kun ĝojo kaj kontenteco, kun iom da honesta fiereco ankoraŭ, kun fido al la estonto de nia grava movado, oni sekvas la konstantan progreson de niaj talentaj verkistoj. Dankon al ili!

Grandare ili partoprenis en tiu-ĉi jaro al la konkurso de niaj IX^{aj} Floraj Ludoj, sendante por ĝi siajn plej bonajn verkojn, la plej amatajn fruktojn de siaj intelektoj. Ne facila tasko estis por la Juĝantaro trastudi la tutan kolekton kaj fari elekton inter ili.

La unua honoro en niaj Floraj Ludoj celas ĉiam la poeton, kiu per sia poemo plej bele kaj sentige prikantas la plej noblan temon, tiun senton kiu estas la juvelo de la homa animo, tiun senton kiu beligas kaj diigas nian vivon mallongan, kiu regas ekskluzive en la homa koro kaj kiu fine donas sencion al nia surtera ekzistado: la amo.

Tempo estas jam voki la premiiton:

Gesinjoroj:

La feliĉa poeto kiu gajnis la unuan kaj plej honoran premion en tiu-ĉi solena Festo de la Floraj Ludoj, estas S-ro **Julio Baghy** el Buda-Pest (Hungarujo).

Ĉar li pro malproksimeco de sia lando, ne povis mem veni kaj kolekti viajn aplaŭdojn, li bonvolis elekti kiel sian reprezentanton: S-ro **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Devo estas de la poeto kiu ricevis la plej honoran premion elekti la reĝinon kiu devas prezidi nian Feston, kaj disdoni al la ceteraj kolegoj premiitoj la rekompencojn kiujn ili meritis per siaj respektivaj verkoj.

Ĝoju ni, Gesinjoroj, ke en tiu-ĉi okazo la poeto bonvolis honorigi nian katalunan landon, elektante por okupi tiun oficon enlandan fraŭlinon. Miaj vortoj laŭte sonoru kiam mi nomas la elektiton de la poeto:

Fraŭlino **Paquita Cots Fortuny** estas vokita por prezidi per sia beleco la Feston de niaj Floraj Ludoj. Ni salutu ŝin, Gesinjoroj, kiel ŝia alta posteno meritas, kaj brue aklamu ŝian eniradon, Gesamideanoj!

La reprezentanto de la premiita poeto suriras la scenejon kaj ricevas de manoj de la Urbestro belegan florbukedon kun silka rubando kaj tuj sekvita de la Aŭtoritatuloj kaj Juĝantoj malsupreniras por proponi al Ŝia Reĝina Moŝto la Prezidan lokon.

Post kelkaj momentoj la muzikistaro ekludas triumfan mar-

ŝon, la tuta ĉeestantaro stariĝas kaj oni aŭdas la bruon de unuanima aplaŭdado: tiel oni salutas la eniron de la Reĝino kaj de ŝiaj belaj kunulinoj de la Ama Kortego, kiuj brako ĉe brako de siaj akompanantoj iras unu post la alia sidiĝi sur la lokoj al ili speciale rezervitaj.

Admirinda estis la beleco de la Kortego de Amo kiun konsistigis F-inoj Lourdes Soler, Pepeta Oliveras, Lola Vall-Ilossera, Angelina Torres, Anita García, Carme Cecchini, Maria Batlle, Pilar Canudas, Adela Cañellas, Anita Amat kaj la infaninoj Maria Arola kaj Maria-Rosa Ferrer, al kiuj donis ankoraŭ pli da ĉarmo la luksaj vestoj per kiuj ili sin ornamis. Sed ĉiujn paligis sendube la allogo kaj gracieco de la Reĝino F-ino Paquita Cots, kiu estis la plej hela brilanto el tiu riĉa diademo. Kiam ili estis sidiĝintaj denove, ĉesis la aplaŭdoj kaj murmuroj de la ĉeestantoj kaj la Sekretario reprenas la legadon de sia raporto:

Reĝina Moŝto:

Reĝina Kortego:

Permesu, ke mi esprimu al Vi, kun la respekto ŝuldata al Via alta rango, la estimon kaj dankon de ĉiuj por via bonvoleco kaj favoro prezidi nian Feston. Mi volus en tiu-ĉi momento posedi la inspiron de poeto, majstri la lingvon kiel scias fari niaj verkistoj, por saĝuti vin kiel meritas via bonvolemo kaj la beleco de viaj ĉarmaj kunulinoj. Pardonu ke mi ne povas per mia malglata prozo esprimi la verajn sentojn de mia koro.

Ekscelencaj Sinjoroj:

Sinjorinoj:

Sinjoroj:

Samideanoj:

Mi kuraĝas aserti ke neniam ankoraŭ, niaj Internaciaj Florludoj, havis tiel grandan kaj brilan sukceson kiel la nunaj, egale en kvanto kaj kvalito. Naŭdek du verkoj estas entute ricevitaj, el kiuj eble la plejmulto estas verkoj legindaj kaj plej bonstilaj. Ĉefe ni devas ĝoĝi pro la granda abundo de originale verkitaĵoj kaj la belsoneco kaj enhavo de la poemoj prezentitaj al la konkurso; ili estas la plej valora riĉaĵo kaj la krono de la verkaro. Ni devas bedaŭri la mankon jam spertitan en antaŭaj konkursoj de bona tradukisto de la kataluna poeziaĵo; kompreneble ĝi ne estas facila tasko kaj farebla de ĉiu bonvola samideano; sed sendube ĉe la enlanda esperantistaro troviĝas talentuloj kapablaj transdoni en esperantaj rimoj la ĉarmojn de la poezia specimeno kataluna: de tiu-ĉi posteno kiun mi hodiaŭ

Suplemento al n-ro 28-29 de "Kataluna Esperantisto"

*X^a Kongreso de la
Kataluna Esperantista Federacio*

Manresa : 1-2-3 Aprilo 1923




FRAŬLINO PAQUITA COTS FORTUNY
Regino de la IX^ai Internaciaj Floraj Ludoj.



La Reĝino F-ino Paquita Cots, kun la Korteganinoj F-inoj Lourdes Soler, Pepeta Oliveras, Lola Vall-Ilossera, Angelina Torres, Anita Garcia, Carme Cecchini, Maria Battle, Pilar Canudas, Adela Cañellas, Anita Amat kaj la infaninoj Maria Arola kaj Maria-Rosa Ferrer.



S-ro Julio Baghy, aŭtoro de la versaĵo premiita per la Natura Floro.



Aspekto de la scenejo de «Teatre Conservatori», dum la Floraj Ludoj.



Organiza Komitato: S-ro Joan Oliveres, S-ro Francesc Pijoan, S-ro Alexandre Badia, S-ro Artur Torrents, S-ro Angel Llobet, S-ro Felip N. Pujadas, S-ino Emilia A. Ramon de Pujadas, S-ro Josep Albagés, F-ino Lourdes Soler.



Triumfa arkajo, ĉe strato Born, starigita de la Ur-
bestro honore al la esperantistoj.

nemeritite okupas, mi admonas ilin labori kaj partopreni en venontaj konkursoj. Saman admonon ni devas fari ĝenerale al ĉiuj katalunaj samideanoj: estas konstateble ke ju pli kreskas la eksterlanda partopreno des pli malgrandiĝas tiu de la enlanduloj; nia devo estas do, kuraĝigi niajn samlandulojn ke ili ne malantaŭeniru, ke ili laboru kaj klopodu majstriĝi en la kono de la internacia lingvo.

Tion dirinte ni transiru al la raporto de la verkoj prezentitaj kaj al la disdonado de la premioj al tiuj personoj kiuj per siaj valoraj verkoj meritis ilin.

ORDINARAJ TEMOJ

I. — Originala versaĵo kantanta Amon. —

Multaj estas la versaĵoj ricevitaj celantaj la unuan kaj plej honoran premion; krom tiuj ni enmetis kiel celantajn la saman ordinaran temon ĉiujn poeziaĵojn kiuj kantas la amon, kaj kiuj estas senditaj de siaj aŭtoroj por libervolaj temoj, ĉar ni konsideras ke ili rajte devas trovi tie-ĉi sian lokon.

El ĉiuj versaĵoj ricevitaj, tre bonaj la plejmulto, unu distingigis speciale inter ĉiuj, pro beleco, absoluta perfekteco de la formo, bona elekto de rimoj kaj pro la brilo kaj heleco de la penso kaj sentoj de l' enhavo. Vera juvelo ĝi estas de la esperanta literaturo: unu brilanto plia en la hela kaj riĉa diademo de nia inteligenta kaj arta poeto hungara, gloro de Esperantujo.

La verko kiu unuanime estas elektita kiel meritanta la plej honoran premion estas la verko n^o 19 kun devizo: *Muta Larmo*. Ĝia aŭtoro estas S-ro **Julio Baghy** el Buda-Pest (Hungarujo). Ĉar bedaŭrinde mankas al ni lia agrabla ĉeesto pro malproksimeco de sia patrolando, li bonvolis reprezentigi sin per la helpo de S-ro **Jaume Grau Casas** kiu estas preta deklami lian artaĵon.

Stariĝas nia Redaktoro kaj meze de plej respekta silento deklamas la versaĵon de S-ro Baghy:

Dolora deziro

Medita mi sidas ĉe forno malvarma...
 Jam longe la lignon cindrigis la flam'...
 En ĉambro sin ŝtelis la frosto malĉarma
 kaj treme sin frotas mano al man'...
 Nur pecon da ligno, nur pecon da karbo
 kaj havos denove vi fajron en forn'!
 Do faru! Ekbruu veado de l'arbo!
 La zumo krakanta vin lulu al dorm'!

Rigidaj la manoj por vigla ekmovo
 kaj ili inerte faletas sen far'...
 Revantaj okuloj kun laca ekstrovo
 nun miras fajron el sub la cindrar'...
 Malvarma kaj eta mortanta brileto,
 simila al mia pasanta vivsent',
 ho, mortu silente, ĉar vana la peto
 kaj vana la vivo, se mordas nin pent'!

Mi frostas... Malvarme, ho kiel malvarme!
 Soleco min premas kaj vindas mallum'...
 La ombroj de mebloj viciĝas nun svarme:
 amorfaj kadavroj, naskitaj de l' lum'...
 Nun ŝajnas, ke ili min tente allogas
 por klini la kapon al dormo sub ter'...
 Jes!... Verel... Mi kial feliĉon arogas,
 se lasis min for la vivĝoj' kaj esper'?!
 Ho! Kiel mi ŝatus kun lasta rebrilo
 de tiu fajrero fordormi sen voĉ'!
 Ho! Kiel mi ŝatus kun morta trankvilo
 forporti la ombron kun mi sen riproĉ'!
 Sufiĉas la vivo! Mi morton sopiras,
 trankvilon eternan por mia anim'...
 kaj tamen... fajron de l' koro mi miras...
 Ĝi sklave min ĉenas al vivo kun tim'...

Malvarma kaj eta mortanta brileto,
 vi palpebrumanta espero en sin',
 ho, mortu silente, ĉar vana la peto:
 la vivo ne havas indulgon ĉe l' fin'...
 Mi perdis ja ĉion: edzinon, filinon.
 Kaj ilin forprenis ne Morto, sed Viv'...
 Nun sola vaganta mi ploras ruĝon
 de l' hejma fajrejo kun mortosoif'...

Rigidaj la manoj por nova konstruo
 kaj mankas la forto por firma mason'.
 La koron okupis mortvoka enuo
 kaj preter mi pasas senhalte la bon'.
 Vivigas min unu: *dolora deziro*,
 je kiu sopiras ĉi laca anim',
 ke flustru filino kun kisa alspiro:
 «Patreto, vi kara, tre amas mi vin!»

Grandaj aplaŭdoj salutas la premiitan verkon kaj la bonan legadon de S-ro Grau. Kiam ili estas ĉesintaj la Sekretario daŭrigas sian raporton :

Ricevas la I^{an} Subpremion al la Natura Floro, la verko n^o 44, kun devizo *Larmoj*, ankaŭ tre bela kaj korekta versaĵo, kun granda inspiro, sed kiun bedaŭrinde iom makulas ne tre klara penso en la tria strofo. Ĝia aŭtoro estas S-ro Kolomano de Kalocsay, el Buda-Pest (Hungarujo).

II^{an} Subpremion ricevas la verko n^o 4, kun devizo *Dolĉa rigardo ravis min...* tre bone verkita versaĵo, en kiu la vortoj harmonie ludas, sed kies pensoj ne estas tiel originalaj kiel la antaŭaj. Ĝia aŭtoro estas S-ro Jaume Grau Casas, el Barcelona.

Citindaj estas ankoraŭ la sekvantaj verkoj: n^o 47, kun devizo *Petrarka*, tre bela soneto ĉizita de la delikataj manoj de D-ro Kolomano de Kalocsay el Buda-Pest (Hungarujo). La verko n^o 66, kun devizo *Per verda stelo al bono kaj belo*. Aŭtoro estas S-ro Wilhelm Daum el Gommersheim (Germanujo). La verko n^o 15, kun devizo *Miniatur*, ankaŭ tre beleta poeziaĵo kies aŭtoro estas S-ro Jaume Grau Casas el Barcelona.

II^a Ordinara Temo. Originala Ama verko en prozo.

Tiu-ĉi temo, en antaŭaj konkursoj ne tre abunde konkursita, estis kontraŭe en la nunaj Floraj Ludoj superŝutata de tre bonstilaj kaj interesantaj verkoj. Inter ili la unuan premion meritas sendiskute pro la boneco de la lingvo uzita de la aŭtoro kaj la delikateco kaj ĉarmo de la rakonto la verko n^o 77, kun devizo *Eterna Kanto*. Ĝia aŭtoro estas S-ro Teo Jung el Horrem bei Köln (Germanujo).

La I^{an} Subpremion ricevas la verko n^o 70, kun devizo *Fremdulino Asja* ankaŭ beleta rakonto kiun iom difektas nebulo de naiveco; estas ĝia aŭtoro S-ino N. Umanski el Genève (Svisujo).

II^{an} Subpremion ni donis al la verko n^o 74, kun devizo *Kion la amo alportos al vi*. Aŭtoro estas S-ro Hans Decker el Bergstein (Germanujo).

Citon meritas ankaŭ la verko n^o 56, kun devizo *Sopiro*; ĝia aŭtoro estas S-ro Jan Fethke el Bydgoszcz (Polujo).

Tradukitaj Tekstoj.

I — Traduko de la versaĵo *Cabelleres vellutades*.

Kiel dirite, tiu-ĉi temo estas nekonkursita.

II — Traduko de la prozaĵo *L'amor a l'ofici* de Eugeni d'Ors.

Bedaŭrinde nur tri provoj de traduko estas ricevitaj por tiu temo: ni juĝas ilin tre malmultaj, precipe se ni atentis la fakton ke la ebleco de provo de traduko estas tre disvastigita ĉe la katalunaj esperantistoj; ni devas do kuraĝigi ilin kaj rekomendi ke ĉiu laŭ sia povo en estontaj jaroj entreprenu tiun taskon. Malfacila estis la elektado inter du el la verkoj prezentitaj al la Konkurso; ĉar se unu el ili estas tre fidela al la originalo, bedaŭrinde entenas kelkajn malkorektaĵojn, kiuj, kvankam ne tre gravaj, tamen iom makuletas la tradukon, kaj la alia, kvankam pli korekta, estas

iom tro libera traduko, laŭ la opinio de la Juĝantaro. Neniu el la prezentitaj tradukoj, sekve, estas perfekta. Sed ĉar premiota estas la plej bona ni aljuĝis la premion al la verko n^o 90, kun devizo *Bernard Palissy* kies aŭtoro estas S-ro **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Subpremion ricevas la verko n-ro 32, kun devizo *Laŭ mia scio*. Aŭtoro S-ro **Isidre Torrents Prats** el Barcelona.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

I. Premio de la Ekscelenca Urbeŝtraro de Manresa-Temo laŭvola.

Tre ampleksa temo estas temo laŭvola: por ĝi oni sendis originalajn versaĵojn, rakontojn, sciencajn verkojn, por ĝi tradukojn de versaĵoj, prozaĵoj kaj cetere. El la tuta materialo celanta la temojn laŭvolajn, ni faris kolekton kaj dividis ĝin laŭ fakoj: el ĉiuj fakoj estis elektataj la plej bonaj verkoj kaj al ili oni disdonis la diversajn premiojn laŭ ilia respektiva merito.

Por la unua temo ricevis premion la verko n-ro 85, kun devizo *Frukto de la milito estas sufero*. Verko ampleksa, kvazaŭ romano, kiun oni legas kun plezuro kaj interesiĝo kaj kiu rakontas la aventurojn de hungaraj militkaptitoj en la arbaroj el Siberio; flua kaj bela estas la lingvo uzata de la aŭtoro, kvankam kelkaj esprimoj ne aprobindaj enŝoviĝis en ĝin. Ĝia aŭtoro estas D-ro **Tivadar Schwartz** el Buda-Pest (Hungarujo).

I^a Subpremio estas aljuĝita al la verko n-ro 59, kun devizo *Milito fruktas nur larmojn*, bela poeziaĵo, kiu bedaŭrinde estas iom makulita de ritmaj malharmoniaĵoj. Ĝia aŭtoro estas S-ro **Julio Baghy** el Buda-Pest (Hungarujo).

II^{an} Subpremion ricevas la verko n-ro 57, kun devizo *Post velko de l' somero* de la sama hungara aŭtoro.

II. De la Mankomuneco de Katalunujo.

La premion ricevas la verko n-ro 65, kun devizo *Ram. Lullano* kies aŭtoro estas D-ro **Raymond van Melckebecke**, Lingvo komitatano, el Anvers (Belgujo).

I^{an} Subpremion ni aljuĝas al la verko n-ro 82, kun devizo *Stranga renkonto tra la holanda ebenaĵo* delikata kaj bonstila traduko de S-ro **Luiggi Puppo** el Genova (Italujo).

II^{an} Subpremion oni donas al la verko n-ro 18, kun devizo *Vaneco*, bela poeziaĵo kiun bedaŭrinde iaj ritmaj pekoj iom malbonigas; aŭtoro estas S-ro **Julio Baghy** el Buda-Pest (Hungarujo).

III. De la Parlamenta Deputito S-ro Creixell.

La premion ricevas la verko n-ro 6 kun devizo *Ĉio estas necesa kio okazas*, dramo en kvin aktoj, bonstile verkita per korekta Esperanto, kaj kiu estas legata kun vera plezuro; ĝia aŭtoro estas S-ino **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

I^{an} Subpremion ricevas la verko n-ro 28, kun devizo *Baskolando*, iom naiva, kvankam bona rakonteto; ĝia aŭtoro estas S-ro **Jakobo Schmid** el Bern (Svisujo).

II^a Subpremio estas aljuĝita al la verko n-ro 78, kun devizo *Supren*, versaĵo kun bona lingvo, sed ne ritmita kaj kun malalta poezia sento; ĝia aŭtoro estas S-ro Teo Jung el Horrem (Germanujo).

IV. De la Deputitoj S-roj Valls, Borràs kaj Minoves.

La premion oni aljuĝas al la verko n-ro 49, kun devizo *Amo ne konas barojn* kies aŭtoro estas D-ro **Kolomano de Kalocsay**, el Buda-Pest (Hungarujo).

I^a Subpremio estas aljuĝita al la verko n-ro 13, kun devizo *Litera-turo* kies aŭtoro estas S-ro Ivan H. Krestanoff el Dresden (Germanujo). Bona literatura recenzo kaj pristudo de verkisto.

II^{an} Subpremion oni cedas al la verko n-ro 54, kun devizo *Montanya miracle*, kies aŭtoro estas S-ro Joan Font Giral el Girona.

V. De la Grupo «Bela Espero».

Premion ricevas la verko n-ro 33 kun devizo *Kanto de l' trobador'*, bela poeziaĵo kun riĉa disludo de ritmoj kaj rimoj; aŭtoro estas S-ro **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

I^a Subpremio estas cedata al la verko n-ro 30 kun devizo *La vivo*; ĝia aŭtoro estas S-ro Adalberto Bayer el Buda-Pest (Hungarujo).

II^a Subpremio estas aljuĝita al la verko n-ro 76, kun devizo *Amo romantika*, bela rakonto verkita laŭ tre korekta Esperanto. Ĝia aŭtoro estas S-ro Teo Jung el Horrem (Germanujo).

VI. De «Amikoj de la Popola Kulturo».

La premion ricevas la verko n-ro 23 kun devizo *Faciem eos in gentem unam*, tre lerta priskribo kies aŭtoro estas S-ino **Emma L. Osmond** el London (Anglujo).

Subpremion oni aljuĝas al la verko n-ro 71 kun devizo *Naturamanto*, kies aŭtoro estas S-ro Ivan H. Krestanoff el Dresden (Germanujo).

VII. De la «Gazetara Asocio de Manresa».

Premion ricevas la verko n-ro 84, kun devizo *For la batalilojn*, tre korekta kaj bonstila verko kies aŭtoro estas S-ro **Christian Thoma**, kiu respondas al la pseudonimo de Kristiano Mallerta el Köln-Kalk (Germanujo).

I^{an} Subpremion ricevas la verko n-ro 12, kun devizo *Fiat Justitia*, kies aŭtoro estas S-ino Emma L. Osmond el London (Anglujo).

II^{an} Subpremion ricevas la verko n-ro 29, kun devizo *Ridi estas pli bone ol plori*, amuza humoraĵo verkita de S-ro Roman Sakoviĉ el Viŝno (Polujo).

VIII. De la «Centre de Dependents del Comerç i de la Indústria».

La temo proponita de tiu ĉi societo estas malfeliĉe nekonkursita, sed la donacinta Societo afable akceptis cedi la premion por alia verko meritinda. Tiu estas la verko n-ro 24 kun devizo *Peripetum mobilis* tre agrabla kaj rimarkinde verkita priskribo de vojaĝo, verkita de S-ro **Ivan H. Krestanoff** el Dresden (Germanujo).

Subpremion ricevas la verko n-ro 88 kun devizo *Se junan burĝonon deŝiras vento, la koron ekpremas dolora sento*, kies aŭtoro estas S-ro Tiberio Morarin el Cluj (Rumanujo).

IX. De la «Pomells de Joventut».

La premio estas aljuĝata al la verko n-ro 41 kun devizo *Verda Pluganto*, tre belaj tradukitaj fragmentoj de la fama verko *Quo vadis*; aŭtoro estas S-ro **Jan Fethke** el Bydgoszcz (Polujo).

I^{an} Subpremion al la verko n-ro 73, kun devizo *Katalunujo nia patrujo*, kies aŭtoro estas S-ro Josep Maria Bas el Girona.

II^{an} Subpremion al la verko n-ro 69, kun devizo *Amo venkas ĉion*, kies aŭtoro estas S-ro Miquel Millà Ribera el Girona.

Citon meritas ankaŭ la verko n-ro 51, kun devizo *Neniu tago sen Esperanto*, kies aŭtoro estas S-ro Lehrer W. Hahn el Gohlis apud Dresden (Germanujo).

X. De la «Manresa Orfeono».

Premio estas aljuĝita al la verko n-ro 42, kun devizo *La poésie voyez vous, c'est bien. Mais la musique, c'est mieux*, tre bona kaj leginda laŭdo de la muziko. Aŭtoro estas S-ino **Emma L. Osmond** el London (Anglujo).

XI. De la «Bazaro Jorba».

Premio al la verko n-ro 60, kun devizo *Ne mortos jam nia bravega anaro*, tre interesa kaj publikiginda lingvistika studo pri Esperanto kaj la projekto de lingvo internacia «Interlingua» au latino simpligita de Prof. Peano. La aŭtoro traktas tiun-ĉi temon kun vera majstreco kaj kono. Ĝia aŭtoro estas D-ro **Bruno Migliorini** el Roma (Italujo).

Subpremion oni donas al la verko n-ro 27, kun devizo *Baskolando*, kies aŭtoro estas S-ro Jakobo Schmid el Bern (Svisujo).

Citon meritas certe la verko n-ro 79, kun devizo *Cum gaudio et amenitate*, mallonga sed korekta traduko verkita de S-ro Luiggi Puppò el Genova (Italujo).

XII. De la «Ekskursia Societo».

Premio al la verko n-ro 35, kun devizo *Floramiko, mi ne povas ne flortudi*, tre delikata kaj bone verkita priskribo pri la floraro de Pireneoj kaj Vogezoj. Aŭtoro de tiu verketo estas S-ro **Ed. Jung** el Strasbourg (Francujo).

I^{an} Subpremion ricevas la verko n-ro 50, kun devizo *Amu la naturon*, tre agrabla rakonto de S-ro König Lagos el Miskolcz (Hungarujo).

II^{an} Subpremion meritis la verko n-ro 17, kun devizo *Homo estu homo*, tre bona versaĵo de S-ro Julio Baghy el Buda-Pest (Hungarujo).

XIII. De «Laborista Ateneo».

Premio al la verko n-ro 91, kun devizo *Tagoj ŝtelire forpasis*, tre meritinda, laŭvorta, kaj inspiroplena traduko de kanto el la fama «Atlantida» el la glora kataluna poeto Verdaguer; aŭtoro de tiu traduko estas S-ro **Josep Grau Casas** el Barcelona.

I^{an} Subpremion ricevas la verko n-ro 20, kun devizo *La patra amo estas blinda*, agrabla rakonto verkita de la plumo de S-ro Julio Baghy el Buda-Pest (Hungarujo).

II^{an} Subpremion meritis la verko n-ro 43, kun devizo *Sigillum veri simplex*, bona traduko el artikolo, bedaŭrinde ne tre grava, el la fama filozofo

Balmes. Aŭtoroj estas S-roj Adolf Soldevila kaj Miquel Garriga el Terrassa.

XIV. De «Montepío Artesà».

Bedaŭrinde ankaŭ la temo proponita de tiu ĉi grava Societo restis nekonkursita; tamen ĝi bonvolis la premion donaci por alia verko meritinda, por kiu faro akceptu nian dankon la bonfara Societo. La premion oni aljuĝis al la verko n-ro 21, kun devizo *Ni ĉiuj estas homoj*, energia versaĵo distilita el la produktema plumo de S-ro **Julio Baghy** el Buda-Pest (Hungarujo).

Ian Subpremion ricevas la verko n-ro 55 kun devizo *Preĝo al la cipresoj*, mallonga sed sufiĉe bona traduko el la kataluna lingvo. Aŭtoro estas F-ino Dolors Maymí el Girona.

Iian Subpremion ricevas la verko n-ro 68, kun devizo *Rozujo*, alia traduko ankaŭ mallonga, sed bone verkita; aŭtoro estas ankaŭ F-ino Dolors Maymí el Girona.

XV. De «Terkulturista Ĉambro de Bages».

Premio al la verko n-ro 67, kun devizo *Orion*, aŭtoro estas S-ro **Jan Fethke** el Bydgoszcz (Polujo).

Subpremion meritis la verko n-ro 25, kun devizo *Baskolando*, bela rakonteto kies aŭtoro estas S-ro Jakobo Schmid el Bern (Svisujo).

Citon meritas ankaŭ la verko n-ro 22, kun devizo *Semado kaj rikoltado neniam ĉesos*, kies aŭtoro estas S-ino Emma L. Osmond el London (Anglujo).

XVI. De «Enciklopedia Popola Ateneo» el Barcelona.

La temo de tiu-ĉi Societo estas ankaŭ bedaŭrinde nekonkursita, sed la grava kaj ĉiam favora al Esperanto Barcelona societo bonvolis konservi sian premion por alia verko, kiu estas tiu kun la numero 72 devizita *Per Scienco al scio*, tre valora pristudo de malsano, pri kies entenata valoro, kompreneble, la Juĝantoj ne povas opini, sed ricevas la premion por sia lingva valoro, kaj kiel rekompenco por la helpo alportata de la aŭtoro al la starigo de la teknika vortaro. Aŭtoro de tiu scienca verko estas S-ro **Walter Lippmann** el Leipzig (Germanujo).

Subpremion ricevas la verko n-ro 40, kun devizo *Laboru kaj ne malesperu*, kies aŭtoro estas S-ro Adolf Hainschegg el Graz (Aŭstrujo).

XVII. De la esperantista grupo «Nova Sento».

Premio al la verko n-ro 48, kun devizo *Sonu la la voko tra mondo*, tre energia kaj potenca himno, perfekte taŭga por kantado; ĝia aŭtoro estas D-ro **Kolomano de Kalocsay** el Buda-Pest (Hungarujo).

Subpremion certe meritas la verko n-ro 7, kun devizo *Al la verda stelo, eterna fidelo* ankaŭ tre bona kaj kantebla himno ne tiel bela kiel la antaŭa; ĝia aŭtoro estas S-ro S. Frantz el Paris (Francujo).

XVIII. De la esperantista grupo «Barcelona Stelo».

Premio al la verko n-ro 45, kun devizo *Salmisto* tre facila kaj agrabla tradukaĵo, verkita de samideano D-ro **Kolomano de Kalocsay** el Buda-Pest (Hungarujo).

Subpremion meritas la verko 44, kun devizo *Beethoven* ankaŭ versa traduko de la fama hungara talenta verkisto.

XIX. De «Kataluna Esperantisto».

Premion ricevas la verko n-ro 26, kun devizo *Baskolando*, kiu tre bone disvolvas la temon proponitan. Ĝia aŭtoro estas S-ro **Jakobo Schmid** el Bern (Svisujo).

Jen, Gesinjoroj, jam finita la tasko de la Juĝantaro.

Per la rezultatoj, kies atestantoj vi estas en tiu-ĉi momento, facile oni povas konjekti kiom longa kaj peniga estis nia laboro, samtempe konstante kiom abunde kaj bone niaj esperantistaj verkistoj laboris.

Ili plej multe helpas al la riĉigado kaj prosperado de nia internacia lingvo, ankoraŭ juna; ili laboras por doni al ni la deziratan plezuron gustumi la bonegajn fruktojn de la literaturo; ili estas, per tio, la plej efikaj defendantoj de la ideo mem de internacia lingvo, ĉar ili vidigas kiel homoj el plej diversaj landoj, el malproksimaj teroj, same kunsentas kaj tion esprimas per helpo de nur unu lingvo, de la feliĉa elpensajo de Zamenhof, elpensajo kiun nur nekonanto povas mallaŭdi kaj malestimii. Ili estas la plej konvinkigaj pledantoj por la estonto de nia kara lingvo; per ilia tasko, ĝi ne estos nur komerca perilo, aŭ porvojaĝa manlibro, sed lingvo kompleta, laŭ la vasta signifo de la vorto.

Lingvo, kiu taŭgas por la perfekta esprimo de niaj pensoj, kiel ajn komplikaj kaj subtilaj ili estas, kaj egale same por la reliefigo de niaj sentoj; lingvo per kiu oni tuŝas la koron, per kiu oni ĉarmas la aŭdon, per kiu oni povas esprimi ĉiujn niajn animstatojn diversajn, lingvo kiu jen ĝojigas, jen plorigas nin laŭ la muziko kiun la poeto ludas.

Honoron kaj dankon al niaj verkistoj! Gratulon al la feliĉaj premiitoj kiuj de la ĝentilaj manoj de Ŝia Reĝina Moŝto, akceptis la premiojn kiujn ili meritis! Dankon meritas ankoraŭ tiuj samideanoj kiuj bonvolvis ion sendi por la konkurso, kaj kiuj kun granda bedaŭro nia, ne povis ricevi premion. La momenta malsukceso ne malkuraĝigu ilin, sed kontraŭe incitu ilin plue labori, ĉar nur post longa penado la rekompenco estas atingota.

Dankon ankoraŭ ni ŝuldas al nia estimata samideano Profesoro Emile Grosjean Maupin, kiu ne hezitis, kvankam surŝargita de aliaj esperantaj taskoj, aldoni ankoraŭ tiun de Prezidanto de la Juĝantaro; kaj precipe ankaŭ ni danku nian estimatan Kunjuĝanton F-ino Louise Briggs, kiu por korni nian landon kaj por ĉeesti nian Feston, prenis al si la ĝenon veturi al nia lando kaj veni inter nin. Al ambaŭ niaj amikoj kaj helpantoj mi volas publike esprimi la senton de dankemo kiun ni havas por ili.

Kaj, fine, nian dankon, nian plej koran dankon, al vi, gracia Reĝino de nia poezia Festo, kaj al viaj ĉarmaj akompanantinoj, kiuj tiel inde prezidas nin, kaj per via agrabla ĉeesto igis al ni pli sentebla la sorĉon de la poeziaĵoj. Eluzitaj jam de la poetoj en siaj poemoj la laŭdoj al la virino, kiun vi plej ĝentile kaj dece hodiaŭ reprezentas, miaj vortoj, ordigitaj laŭ mia modesta povo, estus tro palaj kaj ne indaj.

Permesu, gracia Reĝino, ke mi ŝparu ilin kaj metu nur al viaj piedoj la humilan ateston de nia ĉiama danko kaj admiro.

MARIAN SOLÀ

Ĝenerala ovacio premias la lerte plenumitan taskon de la Sekretario.

Ĉiuj laŭreatoj, kiuj troviĝis en la teatra salono, iris ricevi de manoj de Ŝia Reĝina Moŝto la atingitajn premiojn, kaj la aŭtoroj de versaĵoj legis ilin antaŭ la ĉeestantaro; krom tio, bonvolemaj samideanoj deklamis ankaŭ la versaĵojn de la eksterlandaj aŭtoroj kiuj ne ĉeestis la okazintaĵon; ĉiuj estis plene kaj longe aplaŭdataj. Kiam la aplaŭdoj silentiĝis ekstaris S-ro Delfi Dalmau, membro de la nuna Juĝantaro, kiu alpaŝis kaj legis la paroladon senditan de la Prezidanto:

«Estimata geaŭdantaro :

Mi salutas vin de malproksime, malĝoje bedaŭrante, ke la nunaj cir-konstancoj tiel malfaciligas la vojaĝojn kaj ke miaj okupoj ne permesas al mi ĝui vian koniĝon. Mi salutas la partoprenintojn de la konkurso kaj gratulas la feliĉajn premiitojn. Mi salutas aparte la fervorajn kaj sindonajn organizintojn de la Floraj Ludoj, kiuj ŝparis nek tempon nek penon por sukcesigi tiun ĉi belan kaj kuraĝigan feston. Mi salutas humile la Reĝinan Moŝton, kies ĉarma majesteco prezidas tiun ĉi kunvenon.

Se mi estus povinta ĉeesti mem la feston, certe nur ĝojaj entuziasmaj paroloj povus eliri el mia buŝo; sed, ho ve! mi ne povas stari inter vi, mi ne povas ĝui la helan lumon de la suda suno, kiu verŝas ĝojon, feliĉon kaj indulgemon en la koron: solece kaj soĝire mi sidas en mia skriboĉambro, dum ekstere la pluvo faladas, dum nigraj nuboj kaŝas la ĉielon kaj pezas super la trempita tero kvazaŭ plumba senelira kloŝo.

Malleviĝas nubo peza,
Frapas arbojn pluv' senĉesa,
Falas, falas nuba ploro,
Kaj mi revas kun doloro.

Vi do riproĉu la veteron kaj pardonu al mi, se, alparolonte vin mi elektis iom seriozan kaj severan temon, kies titolo povus esti: KONSILOJ AL LA KONKURANTOJ DE LA LITERATURAJ KONKURSOJ.

Tro ofte niaj simpatiindaj kaj fervoraj konkurantoj forgesas, ke, ne parolante pri la artaj kvalitoj, pri la imago, la inspiro, la talento, oni rajtas postuli de ĉiu ajn beletra kaj literatura verko formajn kaj lingvaj kvalitojn, kiujn ne bezonas ordinara konversacio.

La KOREKTECO kaj la KLARECO estas la ĉefaj el tiuj ĉi bazaj kvalitoj. Korekteco estas ankoraŭ pli necesa en lingvo internacia ol en lingvo

nacia. Efektive, pro la simileco de la kutimoj, de la moroj, de la spertoj, de la tradicioj, de la ĝenerala pensmaniero ĉe la uzantoj de iu ajn lingvo nacia, oni povas en tia lingvo verki nekorekte kaj tamen kompreneble kaj klare; sed la uzantoj de internacia lingvo, pro la diverseco de ilia kutima pensmaniero, povas esti kompreneblaj kaj klaraj NUR se ili akurate obeas la principojn de la vortaro kaj la regulojn de la gramatiko, se ili evitas la «solecismojn» aŭ pekojn kontraŭ gramatiko kaj la «barbarismojn» aŭ barbarlingvajn pekojn kontraŭ la vortaro, senkritikan enkondukon de neesperantaj radikoj, uzon de la jam ekzistantaj kaj uzataj Esperantaj vortoj en malĝusta senco.

Severa korekteco estas nepra kondiĉo de internacia interkompreno, sed tiun ĉi necesegan korektecon la Esperantistoj povas atingi NUR korektante sin mem per interna memvola disciplino kaj senlace diligenta kontrolo.

Mi dezirus atentigi vin hodiaŭ pri tio, ke la precipa kaŭzo de malkorektaĵoj ĉe la Esperantlingva verkado estas la kaŝita influo de la patra nacia lingvo kaj la senkonscia obeo al la ĉiutaga parolkutimo.

Ni observu kaj analizu tion, kio fariĝas en ni, kiam ni parolas aŭ skribas en nia hejma lingvo, ni dismetu kaj malmuntu la radojn de la meĥanismo de la lingva esprimado. Se ni konsideras unue la plej simplan okazon, tio estas la okazo, kiam ni bezonas esprimi nur malsubtilajn kaj ĉiutagajn ideojn, ni rimarkos, ke, en tia okazo, ni konstante, dum ni pensas, elparolas interne nian penson, tiamaniere, ke pensi kaj paroli estas tute la samo, konsistigas unu tuton, unu saman sendividan aferon simile, kiel krusto kaj molaĵo konsistigas la saman panon. Teorie, penso kaj parolo ĉiam distingiĝas, sed fakte, en la esplorata okazo, penso kaj parolo estas aŭ, pli ĝuste, fariĝis pro kutimiĝo, unu sama nedividebla ago: la parolo estas la enkorpiĝinta penso, kaj oni ne povas sen detruigi de la penso apartigi ĝin de sia esprimo. La esprimo ekaperas en nia interno ĝuste sammomente, kiam la esprimota penso ekleviĝas en nia spirito; ambaŭ ŝajnas eligi samtempe el la mallumaj profundaĵoj de la senkonscio.

Sed la afero ne estas sama, se ni bezonas esprimi ideojn malpli ordinarajn kaj malpli komunajn, aŭ pli malsimplajn kaj pli delikatajn. En tia okazo la esprimo ofte ne naskiĝas samtempe, kiel la ideo, kaj oni povas facile distingi la antaŭan ideon kaj la postan esprimon; eĉ kelkfoje ni devas dum iom da tempo peni por trovi la bezonatan vorton aŭ vortgrupon. Tiam nia spirito similas iun klienton, kiu serĉas en konfekcivendejo la veston, kiun li deziras, kaj ne trovas ĝin.

Ne senintence mi uzas tiun ĉi komparon. Efektive, kiam ni uzas kiel esprimilon iun ajn el la naciaj lingvoj, nia penso elektas kaj surmetas nur vestojn jam konfekciitajn kaj tute pretajn en la magazeno de la vestovendisto, aŭ, por paroli senmetafore, ni uzas, esprimonte nian penson, nur vortojn, vortgrupojn kaj frazojn jam antaŭe ekzistantajn en la lingvo, akceptitajn de la kutimo kaj permesatajn de la komuna uzado, kiu, laŭ la antikva proverbo, estas reĝo kaj leĝo super la lingvoj. Ni elektas inter la

uzataj, konitaj de ni esprimoj, sed ni ne bezonas krei novajn esprimrimedojn. La vestaĵaro, kiun ni disponas, estas tiel riĉa kaj multspeca, ke ni povas, almenaŭ ordinaraj kaj plej ofte, kontentigi je ĝi tia, kia ĝi ekzistas, kaj ke ni ne estas devigataj mendigi novan specialan veston laŭ nia mezuro kaj plaĉo. Paroli aŭ verki en iu ajn nacia lingvo estas do plej ofte nur memori kaj ripeti esprimojn jam multfoje aŭditajn aŭ legitajn aŭ uzitajn de ni mem.

Nun ni esploru, kio fariĝas, kiam ni parolas aŭ skribas ne nacilingve sed esperantlingve; kompreneble ni ekzamenos nur la okazon, kiam ni volas esprimi iom nevulgarajn, delikatajn, malsimplajn, artistajn pensojn.

Tiam la afero ŝanĝiĝas, ĉar la kondiĉoj de la Esperanta lingvo ne estas tute la samaj, kiel la kondiĉoj de la naciaj lingvoj. Tiuj ĉi lingvoj vivas jam de longa tempo, ili estas uzitaj kaj ĉizitaj de multaj diversaj spiritoj, ili estas dum multaj jaroj, eĉ jarcentoj, plinivigitaj, plifleksebligataj kaj ĉiumaniere pliperfektigitaj; ili posedas multspecan, malmankan, sufiĉegan esprimilaron. Male, la vivo de Esperanto ne estas ankoraŭ longa; kvazaŭ junulo, ĝi ne havis tempon por akiri multflankan sperton; ĝi ne renkontis ankoraŭ okazon por esprimi multajn ideojn kiuj tamen estas nek tre subtilaj nek tre neordinaraj. La mirinda riĉeco de Esperanto ne estas ankoraŭ efektiva realiginta riĉeco same kiel tiu de la naciaj lingvoj; ĝi estas nur kapableco, nur pura ebleco, nur esperata riĉeco, kvazaŭ la terkarbo, kiu kuŝas en ia apenaŭ ekspluatita minejo.

Aliflanke Esperanto ne estas, almenaŭ ĝenerale kaj ordinaraj, hejma lingvo, sed nur helpa lingvo; tio signifas, ke ĉiu, eĉ plej fervora Esperantisto, ne uzas konstante la Esperantan lingvon, sed uzas ĝin nur okaze, malofte intermite, iam kaj iam. Kompare je nia hejma lingvo, ni ĉiuj tre malmulte aŭdis kaj tre malmulte legis Esperantan lingvon; konsekvence ni ne povis kolekti tre vastan kaj plenan aron da esprimiloj. Multaj bonegaj esprimoj eble estas jam elfrovitaj kaj elpensitaj de iu Esperantista verkinto, sed, ĉar ni ne konas la verkon de tiu aŭtoro, ni devas, por esprimi la samajn ideojn, kiujn li bonege esprimis, elpensi kaj konstrui mem propran, eble malpli bonan esprimon, anstataŭ simple memori kaj senpene ripeti la jam uzitan, sed de ni nekonatan esprimon. Revenante al la antaŭa komparo, ni do povus diri: se ni volas vesti esperantlingve nian penson, ni ne trovas ĉe la vestovendisto tre riĉan aron da antaŭe konfekciitaj vestaĵoj. Plie, la komizo, tio signifas nian scion kaj konon pri la lingvo, ofte ne estas tre lerta por trovi en la kolekto la veston kiu konvenus al ni. Multfoje la ĝusta konvena vesto ekzistas en la magazeno, sed oni ne montras ĝin al ni. Ni do mendas speciale almezuritan veston. Sed, kelkfoje, la vestotranĉisto, tio signifas nian kutimiĝon kaj sperton pri la praktiko de la lingvo, estas tiom mallerta, kiom la komizo, tiamaniere, ke la vesto estas fuŝita kaj nia penso tre malbone vestita.

Tamen tiu farmaniero, mi volas diri: la farado de nova vesto, la elpenso kaj konstruo de nova esprimo, eble ne estas la plej ofte uzata de ni procedo.

Efektive, ankaŭ la psikologian kampon regas la leĝo de la pli malgranda peno, kiu estas la spirita transkribado de la leĝo pri inercio, reganta la materian mondon. Nia spirito estas nature malpenema; ĝi ĉiam inklina al la plej facila faro, al la faro jam farita kaj kutima; ĝi prefere iras la jam iritan vojon; ĝi plivolonte malsuprenlitas la jam malsuprenlilitan deklivon, same, kiel la pluvo laŭfluas la jam antaŭe sulkitan sulkon.

Nu, ĉar plej ofte la ideojn, kiujn ni deziras esprimi Esperantlingve, ni estas jam esprimintaj en nia hejma, kutima lingvo, tial, malgraŭ la ekstrema kaj nekredibla facileco de la Esperantlingva kreado kaj formado de esprimiloj, la antaŭekonita kaj antaŭepreta hejmlingva esprimo, liverita de nia memoro, ordinare prezentiĝas pli facile al nia spirito kaj pli baldaŭ antaŭenpuŝiĝas, ol la kreata esperantlingva esprimo, kaj ni simple poste, sed rapidege kaj unumomente, tradukas esperanten tiun nacilingvan esprimon.

Tiu ĉi malrekta vojo kaj pera farmaniero estas tiom pli komuna kaj ordinara, ĉar ĉiuj ideoj estas nature disflugigemaj kaj disfandiĝemaj kaj povas nur tre mallongatempe kaj malfacile konserviĝi kaj teniĝi, se ili ne estas subtenataj de iu signo aŭ esprimilo. Estas do tute kompreneble, ke nia spirito, se la esperantlingva esprimo de sia penso ne tuj prezentiĝas, devas, por ne perdi tiun forkureman penson, aliroki kaj alfirmigi ĝin al la unua preta signo, tio estas al iu kutima aŭ konita hejmlingva esprimo.

Mi memoras iun ŝercan diron, kiun iam miaj kamaradoj kaj mi, kiam ni estis studentoj en la Supera Normala Lernejo, plezure ripetis pri iu eminenta profesoro, Sro Henriko Weil. Sro Weil estis naskiĝinta Germano kaj naciangiĝinta Franco longe antaŭ la Delbrück'a leĝo; li instruis pri greka lingvo kaj literaturo kaj li sendispute estis unu el la dek aŭ eĉ eble nur kvin aŭ ses homoj, kiuj en tuŝa homaro konas funde la grekan lingvon. Li skribe verkis tre bone, tre klare kaj tre elegante en franca lingvo, sed buŝe kiam li improviziĝis, li parolis ja tre fluan kaj facilan sed iom malklaran, neordinaran, eĉ strangan francan lingvaĵon. Ni do kutimis diri: «La Maljunulo (tio estis la propra alnomo, kiun ni petole donis al Sro Weil), la Maljunulo pensas germane, tradukas greke kaj parolas france».

Tiu ŝerco taŭge reliefigas la rapidegecon de la interna traduka procedo, pri kiu mi parolas, kaj mi opinias, ke ni ĉiuj ofte faras la samon, kiel la priparolita sciencoplana profesoro, kaj en multaj okazoj nur kopias kaj laŭvorte tradukas hejmlingvan esprimon, firme tamen kaj sincere kredante, ke ni esprimas senpere kaj rekte nian penson en Esperanto. Ni tradukas laŭvorte, ĉar laŭvorta traduko estas multe pli facila kaj senpena ol laŭpensa traduko, kaj efektive tia laŭvorta traduko fariĝas tiel rapide kaj subite, ke ni apenaŭ konscias ĝin. Ni murmuras ja interne la nacilingvan esprimon, sed la esperantlingva laŭvorta traduko alkuras tiel facile kaj serveme, ĝi surkovras kaj supersonas tiel momente kaj subite la nacilingvan esprimon, ke nia konscio aŭdas nur la Esperantan postan voĉon kaj tute ne atentis la antaŭan mallaŭtan kaj unumomentan hejmlingvan murmureton.

Iu alia kaŭzo, pro kiu ni kutime ne rimarkas la nacilingvan perilon estas, ke tre ofte ni pensas iun parton de ia frazo Esperantlingve kaj alian parton de la sama frazo nacilingve. Observu atente, dum vi parolas kaj kredas pensi per Esperanto, kaj vi certe rimarkos, ke intermite kelkaj Esperantaj vortoj aŭ esprimoj, kiuj unuavide ŝajnas senpere kunligitaj kun via penso, kvazaŭ ĝia natura kaj propra vesto, estas nur anstataŭa kaj maltaŭga kovrilo. Sub la esperantlingva ekstera tego vi retrovos, se vi iom atentos, la patrolingvan esprimon, kiu enkorpigis vian naskiĝantan ideon tuj de ĝia apero, sed estis subite surkovrita kaj kaŝita de la Esperanta esprimo.

Kelkaj el vi certe aŭdis pri la ĉarmaj kaj admirindaj esperantlingvaj paroladetoj, per kiuj iam, en la Sorbonaj vendredaj kunvenoj, nia senkompara propagandisto, Carlo Bourlet, kies morto estas neriparebla perdo por nia afero, regalis la Parizan Esperantistaron. Neniu certe kapablus pli facile kaj pli flue, pli elegante kaj pli firme paroli en Esperanto ol li parolis. Bourlet estis plene konvinkita, ke, duu li parolas esperantlingve, li ankaŭ konstante pensas per Esperanto. Tamen pli ol unu fojon mi diris al li: «Ci kredas pensi rekte en Esperanto, sed ci, almenaŭ parte, eraras. Estas sendube ke, kiam ci parolas Esperante, ci ofte pensas rekte per Esperanto; tamen, parolante Esperante, kelkfoje, dum kelkaj apenaŭ rimarkeblaj momentetoj, ci fakte pensas france aŭ iafoje germane (ĉar Bourlet scipovis la germanan lingvon preskaŭ tiel bone, kiel la francan), kaj ci rapide, preskaŭ senkonscie tradukas Esperanten la francan aŭ germanan esprimon». Mi tion diris, ĉar mi estis rimarkinta, ke iam kaj iam Bourlet uzis esprimojn, kiuj estis funde kaj esence francaj aŭ germanaj, tute nekompreneblaj aŭ almenaŭ malfacile kompreneblaj por iu nefranclingva aŭ negermanlingva esperantisto, tiamaniere, ke, se nur oni sufiĉe atentis, oni tradistingis tra la esperantlingva vualo la malantaŭan francan aŭ germanan esprimon, kvazaŭ oni povas travidi tra delikata maldika tulo la suban dikan kaj fortikan ŝtofon, kiu konsistigas la veran veston.

Okazas do iom ofte, eĉ ĉe la plej lertaj kaj kleraj esperantistoj, ke ili fakte, almenaŭ parte kaj intermite, pensas pere de sia patra aŭ de ia alia kutima lingvo tiam, kiam ili kredas pensi rekte en Esperanto. Sed, ĉar tiu spirita faro estas tre rapida, ili ne rimarkas ĝin kaj ekvidas nur ĝian finan rezultaton. Tiu iluzio estas multe pli ofta kaj pli facila kun Esperanta lingvo ol kun iu ajn alia lingvo pro la ega facileco de Esperanto. La Esperantlingva esprimo, vokita de la nacilingva esprimo, aperas tiel subite, kvazaŭ obeema kaj lerta servisto, kaj survestas ĝin tiel rapide, ke ni havas apenaŭ tempon por ekvidi tiun ĉi suban esprimon kaj vidas nur la Esperantan surkovrilon.

Tiamaniere okazas, ke multaj esperantistaj verkantoj senintence fuŝas Esperanton, enkondukante en ĝin nacilingvajn vortojn aŭ esprimojn, kiuj estas kompreneblaj por iliaj samlingvanoj, sed tute ne estas Esperantlingve, tio estas internacie kompreneblaj. Ili al kutimiĝas uzadi erarajn, malkorek-

tajn kaj kontraŭlogikajn esprimojn, aŭ esprimojn laŭvorte sklaveme pruntitajn el ia nacia lingvo, kiuj havas en Esperanto signifon tute malsaman je tiu, kiun la verkanto intencas esprimi, aŭ kiuj eĉ estas Esperantlingve absolute sensencaj kaj senenhavaj, kvazaŭ trompa ĉifonfiguro, kiu ŝajnas kovri iun vivan korpon, sed enhavas nur venton kaj neniecon. Tion farante, tiuj verkantoj difektas kaj grave malutilas Esperanton, ĉar la Esperantistoj same, kiel ĉiuj homoj, estas imitemaj kaj inklinas ripeti sendistinge kaj senkritike tion, kion ili aŭdis aŭ legis, donante al malbonaj esprimoj tute egale, kiel al bonaj kaj taŭgaj, forton kaj daŭran vivpovon.

Mi ĵus legis en ia stenografia revuo: «Nur skribante malrapide kaj zorge oni povas plej baldaŭ akiri la kapablon por skribi rapide». Tiu ĉi konsilo estas aplikebla ne nur al stenografio, sed ankaŭ al ĉiu ajn lernado kaj precipe al la verkado. Lernanto havas neniun influon sur la lingvon, sed verkanto, publikiginte iun verkon, neeviteble influas siajn legantojn. Sekve li sur sin prenas gravan prirespondecon, kiu naskas severan devon: La nepra devo de ĉiu verkanto estas, ke li konvinkigu, ke oni ne povas scii tion, kion oni ne lernis, ke li do multe lernu, multe studu, multe penu por ĝuste kaj plene konigi la lingvon, kiun li uzas, ke li atente legu la aŭtoritatajn aŭtorojn kaj precipe Zamenhofon, ke li ofte petu konsilojn de kompetentaj personoj, ke li konstante, pacience kaj ripete konsultu la bonajn gramatikajn kaj vortarajn librojn, ĉar same, kiel oni ĉerpas akvon el la fonto, oni plej oportune ĉerpas sciigojn el la provizejoj, kie ili troviĝas, tio estas el la kompilaĵoj kiuj resumas kaj densigas multajn legaĵojn kaj spertaĵojn. Por rapide kaj senpene vojaĝi ni uzas fervejojn kaj aŭtomobilojn; sammaniere ni ne devas forgesi, ke ni disponas por lernado kaj verkado oportunajn tempoŝparigilojn, penevitigilojn kaj ankaŭ pekevitigilojn.

Ekzercigante je tradukado aŭ verkado, ni precipe gardu nin kontraŭ la senkonscia erara opinio, ke unu vorto el ia lingvo respondas ĝuste kaj plene al unu vorto el alia lingvo same, kiel la geometria figuro povas ĝuste surkovri alian samforman kaj sammezuran figuron. Tiajn ekzakte kaj plene interrespondajn vortojn oni certe povus citi tre malmultajn.

La antikva Dia parolo: «En doloro vi naskados», estas egale vera en la spiritaj kaj intelektaj, kiel en la korpaj kaj fiziologiaj aferoj. Tradukante ĝin moderne, mi diros simple: «Nenion valoran oni faras sen iom da peno; nur la penado meritas kaj produktas bonan frukton kaj indan rezultaton».

PROF. EMILE GROSJEAN-MAUPIN

Multaj aplaŭdoj kaj aprobaj voĉoj salutis la finon de la legado de la interesa kaj bela parolado de Prof. Grosjean-Maupin. Poste S-ro Dalmaŭ diris katalunlingve kelkajn elokventajn frazojn pri la Esperantistaj Floraj Ludoj, post kio la Urbestro prononcis la kutiman frazon «La Festo estas finita». Ekludis denove

la muzikistaro, sonis ree longa aplaŭdado, dum la Reĝino je l' brako de la reprezentanto de la ĉefa laŭreato, malsupreniris la estradon, sekvate de la Ama Kortego kiun akompanis la Aŭtoritataĵoj kaj distingindaj samideanoj.

Ekstere ili supreniris al la aŭtomobiloj kiuj vice atendis ilin, kaj ilin kondukis, post traveturado sur la promenejo de la urbo, al la hotelo kie okazis tuj poste la Oficiala Festeno.

OFICIALA FESTENO

Ĝi okazis en granda manĝoĉambro de la Hotelo S. Domingo, konvene kaj tre lukse ornamita. Sidis ĉe la prezida tablo la Reĝino F-ino Paquita Cots, akompanata de la Urbestro S-ro Suaña kaj la reprezentanto de la laŭreato poeto Julio Baghy, ĉiuj ĉarmaj Korteganinoj kaj S-ro Segrelles, Juĝisto, S-ro Albagés, prezidanto de la O. K., S-ro Amades, prezidanto de K. E. F., S-ro Pujadas, prezidanto de la Gazetara Asocio, kaj aliaj. Inter la 140 ĉeestantoj troviĝis multaj belaj esperantistinoj el Manresa Terrassa, Barcelona, Girona, Sabadell, kiuj ankaŭ ĉarmigis la festenon. La menuo estis, laŭ bele presita karto: Almanĝaĵoj, Ovoj Aŭroro, Bovidaĵo kun legomoj, Fiŝo kun saŭco, Rostita kokido, Glaciaĵo, Biskvitoj, Fruktoj laŭtempaj, Vinoj, Ĉampano, Kafo, Tabako. Ĉe la ĉampano, tostis plej entuziasme la Urbestro S-ro Suaña, S-ro Grau nome de S-ro Baghy, Juĝisto S-ro Segrelles, S-ro Albagés, S-ro Amades, S-ro Pujadas, F-ino Briggs, S-ro Maynar, S-ro Isnard, S-ro Solà, Pastro Casanovas, S-ro Chaler, kaj aliaj. La ĉarma Reĝino F-ino Cots diris ankaŭ dankan vorton. La raportanto rezignas raporti pri la abunda elokventeco elverŝita dum la gaja festeno. Ĝi estas vere nepriskribebla.

FERMA KUNSIDO

Je la 6^a vespere ĝi komenciĝis. Oni elektis por la Direkta Komitato S-rojn Amades (Prezidanto), Soler, Guardiet, Claramunt, Zanón, Rossell, Gili, Barber, Bolós, Montserrat kaj Grau. Oni proponis kelkajn urbojn por la venonta Kongreso, sed fine oni lasis la elekton al la Komitato. Dank' al la entuziasmo de S-ro Jacinto Comella, ni povas nun jam anonci ke nia venonta

Kongreso okazos en Vich, dum la unuaj tagoj de Junio 1924, kaj ĝi estos inda je tiu de Manresa. Lasta decido estis danki la urbon pro ĝia favora akcepto.

SARDANOJ KAJ POPOLAJ DANCOJ

Ĉe «Centre de Dependents», post la vespermanĝo, okazis festo dediĉata al la Kongresanoj, dum kiu la «Esbart Dançaire Manresà», dancis kelkajn popolajn baletojn. Ankaŭ oni dancis katalunajn «sardanojn»; unu el ili, «Bela Espero», speciale dediĉita de ĝia aŭtoro S-ro F. Joanola al la kongresanoj, havis grandan sukceson kaj meritis ĉies gratulojn.

M A R D O , 3

POSTKONGRESAJ EKSURSOJ

Tri ekskursoj okazis: al la monto de salo kaj kastelo el Cardona; al la fama monto Montserrat; al la romarta monaĥejo de Sant Benet de Bages. La plej ĉeestata estis tiu al Cardona, kie oni faris komunan tagmanĝon. Je la reveno en Manresa, la kongresanoj estis adiaŭtataj de la afablaj Manresanoj, kies servemon kaj malavarecon ni ĉiam rememoros.

Tiu ĉi rapide farita raporto estas nur skizo, pala pentraĵo pri la sukceso de nia X^a Kongreso. Cetere, ĝi estos kompletigata en nia proksima numero per la interesaj artikoloj: «Kio plej impresis min en Katalunujo?» de Louise Briggs, kaj «Impresoj de Kongreso» de Henri Isnard.

LA APERO DE LA NUNA NUMERO ESTAS PROKRASTITA PRO LA GRAVA BARCELONA STRIKO DE LA TRANSPORTOJ.

Clau Esperanto

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeditada per la F. C. d'E.

Conté la gramàtica i vocabulari, amb text de propaganda a la coberta, relatiu als darrers progressos de la llengua internacional.

Preu: 10 cèntims

100 exemplars: 6 ptes.

Literatura Mondo

Monata gazeto, ilustrita, grand-formata, almenaŭ 20-paĝa.

Interesa enhavo kaj bonega stilo. Originalaj esperantaj verkoj kaj tradukoj el ĉiuj lingvoj.

JARABONO : 12 PESETOJ

K. E. F. akceptas abonojn

Andrássy-ut, 81.

BUDAPEST

Th. Cart Kolekto de la Akademio

V O R T A R O

de la oficialaj radikoj

DE ESPERANTO

kun Antaŭparolo, la Fundamento kaj listo de la ĉefaj landnomoj

PREZO : 1 franko

Ĉiu esperantisto aĉetu ĝin!

Esperantista Centra Librejo

51, RUE DE CLICHY

P A R I S

CURS PRÀCTIC DE LA LLENGUA

ESPERANTO

PER FREDERIC PUJULÀ I VALLÈS,

amb les regles gramaticals, exercicis en Esperanto i en Català, i vocabulari Català - Esperanto.

SEGONA EDICIÓ

PREU: 0'75 PTES.

Federació Catalana d'Esperantistes

CARME, 30 - BARCELONA



23 GRUPS ADHERITS I 500 MEMBRES INDIVIDUALS

Aquesta entitat, fundada poc després del V Congrés Esperantista Universal a Barcelona, en 1909, amb l'objecte (Art. 2.^{on} dels Estatuts) *d'unir tots els esperantistes de terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto*,

CELEBRA anyalment, amb motiu de la seva reunió general, brillants Congressos Esperantistes, portant-ne ja 10 de realitzats a Sabadell, Tarragona, Terrassa, Olot, Sant Feliu de Guíxols, Vilanova i Geltrú, Reus, Manlleu, Girona i Manresa.

ORGANITZA els Jocs Florals Internacionals que són celebrats simultàniament amb els nostres Congressos, contribuint així a l'enriquiment de la literatura esperantista.

PUBLICA com a orgue federatiu la revista mensual «Kataluna[Esperantisto]», gratis per als adherits, en la qual apareixen interessants informacions sobre el moviment esperantista mundial, ultra excel·lents traduccions de literatura catalana i treballs premiats en els esmentats «Jocs Florals Esperantistes».

EDITA, a mesura de les seves possibilitats, opuscles de propaganda i ensenyament de la llengua internacional.

COL·LABORA a la celebració d'actes de propaganda, com conferències, obertura de cursos, exposicions, visites, etc.

ATORGA títols de Professor d'Esperanto, segons condicions estatuides en el II Congrés a Tarragona, i d'acord amb els membres catalans del «Lingva Komitato».

CUIDA, en general, de coordinar els esforços dels adeptes de l'Esperanto a Catalunya, i

REPRESENTA la nostra nació davant la Organització Esperantista i en els Congressos Esperantistes Universals.

ADHERIU-VOS-HI!

QUOTA ANYAL: 5 PTES.

KATALUNA ESPERANTISTO

(L'ESPERANTISTA CATALÀ)

MONATA GAZETO, ORGANO DE LA



DUA EPOKO - JARO III^a : JUNIO-JULIO 1923

[Handwritten signature]

ABONU LA REVUON

LITERATURA MONDO

kiu publikigas, inter aliaj, la literaturaĵojn premiitajn en la lastaj IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj.

La Komitato de la Floraj Ludoj permesis al «Literatura Mondo» la publikigon de tiaj verkoj, ĉar la amplekso de «Kataluna Esperantisto» ne sufiĉas por ke ni presu sur nia gazeto ĉiujn premiitaĵojn.

JARABONO: 12 PTOJ.

«LITERATURA MONDO»

ANDRÁSSY-UT. 81

BUDAPEST VI (HUNGARUJO)

EDITORIAL ATLANTE. — DIPUTACIÓ, 344. — BARCELONA

GRAMÁTICA ESPERANTO

PEL DR. J. BREMÓN MASGRAU

ACABA DE PUBLICAR-SE LA 3.^a EDICIÓ

Preu de la obra en tela 4 pessetes



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redaktoro : Jaume Grau Casas

Impresoj de Kongreso

M estas Esperantano de la jaro 1914, kiam unuafoje oni parolis al mi pri Esperanto, sed estis nur eble al mi lerni la lingvon en la jaro 1919, la unua post la terura mondmilito. De tiu dato, mi fariĝis Esperantisto. Mi bedaŭrinde ne povis ĝis nun ĉeesti internacian kongreson; tial, kun grandega plezuro mi akceptis la inviton partopreni la X^{an} kongreson de la Kataluna Esperantista Federacio okazonta en Manresa, inviton kiun ĝentile faris al mi esperanta korespondantino mia el Terrassa. Emociite, mi trafis la vagonaron kiu estis kondukanta min en Hispanujon. Certe mi ne dubis pri la mirinda taŭgeco de Esperanto kiel internacia lingvo, kaj ankaŭ mi estis certa pri bonega akcepto en la lando de la suno kaj de la floroj; tamen, la perspektivo trovi min en fremda lando, kie mi ne plu uzos mian gepatran lingvon, kaj tamen povonte interŝanĝi ideojn kaj pensojn, entenis por mi, fervora esperantisto, tiel netakseblan signifon, ke mi ne povis ŝirmi min kontraŭ stranga, sed tamen agrabla antaŭsentito.

Forirante el Marseille vendredon, la 30^{an} de Marto, je la 7^a kaj duono, la vagonaro, kiu forportas min, rapidegas. Je la 4^a matene, sabaton, la tunelo kiu disigas Francujon de Hispanujo estas transirita kaj mi estas en fremda lando. Port-Bou. Post la tedigaj formalajoj pri la pasporto, mi eniras en la vagonaron kiu kondukos min ĝis Barcelona. Tagiĝas; la lokomotivo siblas kaj la vagonaro ekmoviĝas, iom post iom plirapidigante sian iradmovon. Ĉe la vagona fenestro, mi rigardas la kampojn kaj domojn;

ĉio aspektas kiel en suda Francujo. En la kupeo aŭdiĝas novaj lingvoj, kiujn mi ne komprenas; tiuj estas la kataluna kaj la hispana lingvoj. Mi komprenas kelkajn vortojn de la unua, ĉar ĝi iomete similas la francan lingvon, kaj precipe la provençalan; sed mi ne tute povas kompreni la senco de la konversacioj. Jes, lingva diferenco estas la ĉefa diferenco inter la popoloj.

La vagonaro daŭrigas sian kuradon tra kampoj, transirante riveretojn, urbojn kaj vilaĝojn.

Barcelona. Mi elvagoniĝas; sur benko ĉe la trotuaro de la stacidomo sidas fraŭlino kaj viro, kiuj surportas la verdan stelon. Nenia dubo; tiuj estas Sinjoro Chaler, Delegito de U. E. A. en Terrassa kaj Prezidanto de la tiea grupo, kaj la Sekretariino de la sama grupo, la ĉarma Fraŭlino Soler, venintaj laŭ promeso, por min akcepti. Interkonatiĝo; Esperanto sonas, aŭdiĝas. Mi jam ne plu estas en fremda lando; mi estas en Esperantujo. Mi estas kvazaŭ hejme, neniel embarasata por interparoli kun miaj gekondukantoj. Post gastiga tagmanĝo en Hotelo en Barcelona, triope ni foriras al Terrassa per elektra vagonaro. Vojaĝo interesa, plaĉa, kvankam la aspekto de la lando tute estas simila je nia Provenço.

Terrassa. La urbon mi ne intencas priskribi. Ĉiam akompanata de miaj afablaj gekunuloj mi vizitas kelkajn esperantajn rondetojn kaj aliajn geesperantistojn. En Terrassa, oni tute sentas sin en Esperantujo, ĉiuj plej frate kaj kortuŝantmaniere akceptas min; ĉiuj bonkamarade klopodas por kontentigi la gastojn; oni sentas sin kun familianoj; ŝajnas ke esperanta blovo ĉiam trakuras la urbon, kiu certe estas unu el la plej esperantemaj en la tuta mondo. Multe floras nia movado en tiu paca urbo; honoron al la esperantistaj Geterrassanoj.

Oni vizitigas al mi kelkajn vidindaĵojn, uzinojn ktp. Post la vespermanĝo, Sinjoro Chaler persone kondukas min tra la tuta urbo por konigi al mi specialajn kutimojn de la lando, junulajn ĥorojn sur la stratoj, ktp.; ĉio plej altgrade interesas min; mi precipe rimarkas la perfektan harmonion de la kantistĥoroj. Je la dekunua, mi enlitiĝas, gastige kaj komferte loĝata en la «Hotel de España».

Dimanĉon matene, irado al stacidomo norda, por trafi vagonaron kiu kondukos nin en kongresurbon Manresa. Ĉe la stacidomo, amaso da gesamideanoj jam antaŭis nin; verdaj standardoj jam flirtas. Tie mi interkonatiĝas kun samideanoj, interalie kun tri Germanoj, loĝantaj en Terrassa duonjaron, kaj kiuj trovis laboron en tiu urbo, dank'al nia kara lingvo. Jes, Esperanto estas pli ol lingvo...

La vagonaro alvenas, jam portante samideanojn el Barcelona, Sabadell, Ripollet, ktp. Sufiĉe malfacile ni envagoniĝas kaj la vagonaro foriras plena. Dum la irado, aŭdiĝas esperantaj kantoj; ĝojo montriĝas sur ĉiuj vizaĝoj; gajeco estas en la aero. Post unu horo, kiu ŝajnas al mi daŭri nur kelkajn minutojn, ni alvenas Manresa'n.

Tuj ĉe la haltigo de la vagonaro, muzikistaro staranta sur la trotuaro de

la stacidomo, ludas la Esperon. Emociplena momento, kiu vere daŭros ĝis la fino de la kongreso, ĉar konstante mi ĝuos surprizon post surprizo.

Ni elvagoniĝas; atendada momento; tuj, mi havas la impreson ke la kongreso estas bone organizita.

Procesie antaŭata de la muzikistaro, komuna irado al la urbdomo, tra la ĉefaj stratoj de la urbo. Tiu solena irado de ĉiuj esperantistaj grupoj kun siaj flagoj flirtantaj je la vento, emocie impresas.

Akcepto en la Urbdomo kaj malferma kunsido de la kongreso. La plej granda ĉambro de la urbdomo, vastega konstruaĵo, estas plenplena. Tie oni petas min enskribiĝi por saluti la kongresantojn. Kiel mi faros? mi neniam parolis publike. La Prezidanto faras sian paroladon; tuj poste la Delegitoj de ĉiuj esperantaj asocioj salutas la kongreson; estas mia vico; ĉu mi estos kapabla paroli, almenaŭ diri kelkajn vortojn? Mi tremas; mi tamen estas aplaŭdata de la ĉeestantaro. Je la elirado de la urbdomo, okazas filmado.

Poste, vizito al la Akceptejo, kie oni disdonas senpage kongresan libron al ĉiu kongresano.

Dimanĉon posttagmeze, labora kunsido en la Komerca Ĉambro. Ĉi tie la diskutoj okazas esperante kaj katalune; la du lingvoj estas allasataj. Kvankam pro tio mi ne ĉiom komprenas, tamen mi sentas ke ĉiuj intencas akorde kaj agorde kunlabori. Multaj majstre scipovas Esperanton, nova pruvo ke Esperanto estas vivanta lingvo, per kiu oni povas elokvente paroli. Tie ĉi, mi havas la plezuron interkonatiĝi kun angla samideanino kiu ĵus alvenis por ĉeesti la kongreson.

Postvespermanĝe, inaŭguro de la propaganda ekspozicio ĉe Orfeo Manresa, kaj esperanta festo. Ĉi tie, ĉar en la ĉeestantaro estas multaj ne esperantistoj, la paroladoj estas en kataluna lingvo; la plimulto de la paroladantoj estas tiel elokventaj, elparolas tiel perfekte, kun flamo kiun sole povas doni la interna ideo de Esperanto, ke mi preskaŭ ĉion komprenas. Vere estas lertaj oratoroj inter niaj katalunaj samideanoj. Per belega voĉo, esperanta artistino el Barcelona ĉarmas la aŭdantaron, kantante la Esperon kaj la Vojon. Niaj germanaj samideanoj regalias nin per muzikkoncerto de mandolinoj kaj gitaro.

Poste, grandioza akcepto en la Manresa Kazino, kie okazas superbelega balo. Mi bedaŭrinde estas tro laca kaj ne povas ĝui ĉiujn amuzojn prizorgitajn de niaj Manresaj samideanoj.

Je la noktomezo, mi estas kore invitata malplenigi pokalon da ĉampano kun la ĉefaj urbadministrantoj. Mi devas tosti, alparoli la ĉeestantojn kaj danki ilin.

London matene, religia parto de la kongreso. En la preĝejo de la Kavo de Sankta Ignacio, mi ĉeestas solenan diservon, dum kiu la Pastro Casanovas el Girona elokvente predikas esperante. Majstre, li gloregas la internan ideon de Esperanto, montrante ke ĝi tute konformiĝas al la principoj de la religio de Jezuo Kristo.

Mi poste vizitas diversajn mirindaĵojn de la urbo: muzeojn, preĝejojn,

ktp. Manresa estas urbo tre antikva kaj entenas kuriozajn vidindaĵojn. Vere, la kongresorganizintoj antaŭpreparis ĉion por kiel eble plej bone utiligi la tempon.

Je la 11^a, festo de la Floraj Ludoj en la Teatro Konservatorio.

Mi certigas ke, kio plej profunde impresis min, tio estis tiu grandioza manifestado. Necesas esti en Esperantujo, por travivi tiajn ĝuegigajn momentojn. La vasta ĉambrego estas pleneĝa. La reĝino de la festo kaj ŝiaj sekvantinoj, ĉiuj blanke vestitaj, majeste eniras la ĉambregon kaj sidiĝas sur tronon je la mezo de la scenejo. La tuto aspektas mirige bele. La disdonado de la premioj kaj la ĝuiga legado de kelkaj premiitaj verkoj okazas meze de religia silento, nur interrompata de la viglaj aplaŭdoj de la ĉeestantaro. Je la fino de la ceremonio, la Espero, ludata de muzikistaro kaj ĥore kantata de ĉiuj esperantistaj ĉeestantoj, resonigas la arkaĵojn de la monumento. Grandioza kaj impresa manifestado. Tiel belegajn mi neniam kaj nenie ankoraŭ vidis.

Je la 13^a, Oficiala festeno en la Hotelo St. Domingo. Korega kunestado; tre bongustaj manĝaĵoj. Je la fino, ĉiuj partoprenantoj stariĝas, la Espero denove aŭdiĝas. Paroladas kelkaj esperantgrupestroj kaj aŭtoritatuloj; sinsekve, sonas *esperanta*, *kataluna* kaj *hispana* lingvoj. Multfoje, oni aludas pri mia ĉeesto en la kongreso, gratulante min pro mia alveno. Mi stariĝas por esprimi miavice mian ĝojon partopreni tiun sukcesantan kongreson, kaj danki ĉiujn kongresanojn.

Je la 17^a, ferma kunsido. Disiĝo, ĉar la plejmulto de la kongresanoj foriras per la vagonaro de la 18^a kaj duono. Ĉar mi restas en Manresa, mi havas postvespermanĝe plezuron ĉeesti specialajn katalunajn dancojn «Sardanoj kaj baletoj». Per tiuj simplaj amuzoj, mi multe lernis laŭ estetika kaj arta vidpunktoj, kaj ankaŭ pri la katalunaj kutimoj kaj moroj. Kia gaja kaj ĝajga atmosfero! La muzikarioj multe plaĉas al mi, kaj allogita, mi ne povas kontraŭstari je la deziro danci kaj mi dancas la «Sardanojn».

Mardon, matene, ekskurso al la monto el salo de Cardona. Tiun ekskurson mi partoprenas kun trideko da gesamideanoj. Promenado tre interesa kaj instrua. Tre pentrinda estas la salomonto, trafata de la sunradioj; ĝia aspekto estas mirinde bela, diverskolora. Tute familie okazas tiu ekskurso, kiu plej multe interesas min.

Resume. Grandega sukceso por Esperanto. Ĉion pripensis la organizintoj por la plej agrabla tempopasigo de la vizitantoj. Ĉio de ili estis bone prizorgita. Estu al ili dank sento por ĉio farita por Esperanto kaj por esperantistoj. Oni kelkafoje diris, ke por fariĝi vera esperantisto estas necese ke oni ĉeestu internacian kongreson. Tiu ĉi kongreso estis tia, ĉar ĉeestis reprezentantoj de 5 diferencaj nacioj. Tie blovis frateca vento, regis harmonio, vivis nova sento. Mi sentis, ke ĉiuj estas pioniroj de granda ideo, konservas la veran spiriton de la Majstro.

Katalunaj gesamideanoj, vi scias esperanton propagandi en via lando. Kun kia vera emocio, la ĉeestantaro, esperantista aŭ ne, atente rigardis la

disvolviĝon de tiu superbelega esperanta manifestado; ĝi estis perfektorda kaj konforma al la fiksita programo. La impresado estis plene fika kaj kortrafa.

Per via sukcesinta kongreso, vi prezentis al la mondo bildon de nova homaro, kia ni revas ĝin; homaro en kiu la diversgentaj homoj interrilatas, interdiskutas, interkonsentas per uzo de komuna lingvo, homaro en kiu regas toleremo, bonvolemo, paco. Vi semis en Manresa semojn kiuj baldaŭ fariĝos fruktplenaj arboj. Ĉiuj popoloj sekvu la vojon signitan de vi, kaj nia sankta afero baldaŭ venkos.

Gloron kaj honoron al vi. Trovu en miaj linioj sinceran dankon por via helpemo kaj samideaneco. Ĉie, enviinda lando, mi povis konstati la afablecon, la servemon, la zorgemon de la geesperantistoj. Mi ne povas paroli pri ĉiu aparte, ĉar vi estas tro multnombraj. Do, tutkorajn dankojn kaj sincerajn gratulojn al ĉiuj. Mi forportis el via kara lando neforgeseblajn memorajojn.

Ĝis la plezuro revidi vin kiel eble plej multnombre kaj kiel eble plej baldaŭ en Francujo.


HENRI ISNARD

Vicdelegito de U. E. A. en Marseille



EN LA PROKSIMA NUMERO APEROS

RAPORTO PRI LA
NŪRNBERGA KONGRESO
K A J
ALVOKO AL LA
X^a FESTO DE LA
INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



Kio plej impresis min en Katalunujo?

TAM reveninte al mia patrolando, mi povas laŭ taŭga perspektivo ririgardi mian viziton kaj konsideri la supran demandon. Jen la respondo: Ne la ravaj dekoracioj per kiuj la Manresanoj ornamis sian urbon por festi la okazon; ne la perfekta organizo de la kongresaj aferoj; ne la digna pompo kaj ceremonio de la Floraj Ludoj; ne la gajeco de komuna festeno kaj ĉarmaj sardanoj; ne la grandioza spektaklo de Montserrat nek la mistera soleneco de la tiea sanktejo; ne la blueco de ĉielo kaj maro nek la belegaj floroj kaj kreskaĵoj de la montflankoj; ne la (por mi) strangaj domoj, moroj, vestoj; ne la sperteco de la Esperantistoj, eĉ ne la torenta parolflueco de S-ro Amades. Vere mirindaj estis ĉiuj ĉi tiuj, sed super ĉio impresis min la afableco kaj gastigemo de la samideanoj. De la momento kiam en Flassà stacio mi unuafoje ekvidis mian malnovan amikon S-ron Sagera; kiam en Barcelona renkontis min la servema S-ro Solà; kiam bonvenigis min en Manresa aro da bonkoraj samideanoj; en hotelo, teatro, kaj preĝejo; dum ekskurso al Montserrat sub gvido de la ĉarma F-ino Maymí; en la vendejo de Terrassa, kie mi kaj mia pajla ĉapelo estis la celo de multaj miraj (mi preskaŭ diris «admiraj») rigardoj; en la liceo de S-ro Dalmau, kie mi konstatis ke la knabinoj kun la malsimilaj nomoj estas alirilite tre similaj al miaj propraj lernantinoj, kaj unu el ili, la 14-jara F-ino Concepció Algueró, gvidis min al la vidindaĵoj de Barcelona, kaj lerte interpretis por mi en la butikoj; dum la ekrigardo en la privatan hejmvivadon de S-ro Ventura de Terrassa kaj S-ro Sagera en Palafrugell, kies afablaj ne-esperantistaj edzinoj bonvenigis kaj regalis min per la plej antikva el internaciaj lingvoj, tiu de ridetoj kaj gestoj; ĉe la lumturo kaj monaĥejo de Palafrugell, kie antaŭ la statuo de Sankta Sebastiano mi konstatis per ĵeto de monero ke mi edziniĝos antaŭ la jarfino — kaj tuj poste eksedziniĝos!; en korkfabrikejo kaj ĝardeno kun orangarbo; ĝis kiam, superŝutite je donacoj, mi forlasis belan Katalunujon: — ĉie, ĉiam, kaj de ĉiuj mi ricevis la plej bonkorajn afablaĵojn. Dankon, koregan dankon, al vi ĉiuj, amindaj geamikoj, kaj kiam vi viaŭvice vizitos Anglujon, nepre venu al Leeds, al mia kara, fulga, nuba, griza Leeds, por ke vi eksciuj ke ankaŭ ĉi tie, spite ĉiuj malsimilecoj de religio, moroj, kaj pensmaniero, troviĝas ĉe la Esperantistaro similaj varmaj koroj kaj gastamaj spiritoj.

LOUISE BRIGGS

Kanto de l' Trobador'

Kantu nun trobador'! Eksonoru la lir'!
 Rakontadu l' inspir' pri la sentoj de l' kor'.
 Delikata sopir' kun pasia fervor'
 dolĉe diru pri l' glor' de la Ama dezir'.
 Ho dezir' de la kor'! Ho sonor' de la lir'!
 Kantu nun trobador' kun fervor' kaj inspir'.

Se kun dolĉa plezur' nutras amon esper',
 de la lir' tra l' aer' vibras klara murmur'.
 Estas milda sufer' kaj turmenta plezur'
 kateniĝi ĉe l' mur' de la Ama karcer'.
 ĴKiel paca terur' estas ĝoja sufer',
 sen liber', kun plezur', ĉe la mur' de karcer'!

Se ne lumas esper' pri la Amo-trezor',
 ne plu vibras sonor' de la lir' tra l' aer',
 ĉio estas dolor', ĉio estas sufer',
 kaj fariĝas karcer' tuta ter' por la kor'.
 Eĉ ne estas liber' en libera lazur',
 kun la kor' sen esper' kaj sen ama plezur'!

Eksonoru la lir' kun inspir', trobador',
 kaj pri sentoj de l' kor' rakontadu l' inspir'!
 Delikata sopir' kun pasia fervor'
 dolĉe diras pri l' glor' de la Ama dezir'.
 Ho sonor' de la lir'! Ho dezir' de la kor'!
 Kun fervor' kaj inspir' kantu nun, trobador'!

JAUME GRAU CASAS

Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj

Valencia : 17 - 20 Majo 1923



BRILAN sukceson atingis tiu-ĉi Kongreso, dank' al la fervoregaj klopodoj de la Valenciaj samideanoj.

Aliĝis al ĝi 135 geesperantistoj el diversaj lokoj de la Iberia duoninsulo kaj la jenaj korporacioj: Urbeŝtaro de San Sebastián; Urbeŝtaro de Palma de Mallorca; Specimena Foiro de Valencia; Grupo Esperantista de Madrid; Barcelona Esperanta Societo; Federacio «Zamenhof»; Grupo Esperantista de Bilbao; Sevilla Esperantista Grupo; Grupo de Baracaldo; Esperantista Klubo «Palma»; Grupo de Liria; Grupo de Chiva; Esperanta Societo «Aplec» de Sabadell; Andalucía Esperanta Federacio; Zaragoza Provinca Deputacio; Grupo «Frateco» de Zaragoza; Komerca Ĉambro de Valencia; Kataluna Esperantista Federacio.

La 17^{an} de Majo, je la deka matene, okazis la akcepto de la Kongresanoj en la Grupo Valencia.

MALFERMA KUNSIDO. — Je la kvara posttagmeze, okazis la solena Malferma Kunsido ĉe la Paraninfo de la Universitato. Ĉeestis korporacie la Urbeŝtaro kaj komence de la kunsido la Urba Muzikistaro ludis la Marŝon de Tanhauser. Okupis la prezidan estradon la Urbeŝtaro S-ro Artal kaj kelkaj Urbkonsilantoj; S-ro Calixto Hernández, Kanoniko, reprezentanta la Arĥiepiskopon; S-ro Carlos Riba, direktoro de la Instituto de Idiomoj; S-ro Profesoro Enrique de Benito; S-ro Juan Campos, delegito de la Medicina Fakultato; S-ro Maiques, prezidanto de la Komerca Ĉambro; S-ro Grollo, el la Specimena Foiro; S-ro García Guijarro, Deputito; S-roj Pastroj Hernández, Monrabal, Martín, Fabregat kaj Zaragoza; F-ino Angelina Camier, Normala Instruistino; S-ino Natividad Dominguez, Direktorino de «Lerneja Grupo Cervantes»; kaj kelkaj esperantistoj.

La Kongresa Prezidanto, S-ro Profesoro Luis Jordana de Pozas, deklaris la Kongreson malfermita per mallonga paroladeto. La Sekretario, S-ro Andrés Piñó, legis sian raporton pri la preparo kaj disvolviĝo de la «Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj».

Poste salutis la Kongreson la reprezentantoj de Federacioj kaj Societoj esperantistaj: S-ro Benigno de Luna, el la Federacio «Zamenhof»; S-ro Manuel Maynar, el la Aragona Federacio; S-ro Isidro Díaz, el la Andalucía Federacio; S-ro Joan Gili Norta, el nia «Kataluna Esperantista Federacio».

Ankaŭ parolis S-roj Capllinre, Llorens, Máñez, Planells kaj aliaj, reprezentante esperantajn Grupojn apartenantajn al la Federacio de la Valencia regiono.

Gravan, interesan paroladon faris la eminenta ĥina samideano S-ro

Profesoro Won Kenn, kiu meritis bruajn aplaŭdojn de la aŭskultantaro. S-ro Maynar tradukis, por la neesperantistoj, la ĉefajn partojn de la bela parolado de S-ro Kent. Estas nenecese diri, kiom interesplene oni aŭskultis Esperanton de la lipoj de ĥina samideano. Certe ĉiuj ĉeestantoj konvinkigis pri la taŭgeco de nia internacia lingvo.

Sinjoro Urbestro fine parolis bonvenante la eksterurbajn esperantistojn kaj dezirante al Esperanto sukceson, kaj la Urba Muzikistaro ekludis la Esperon, kiu estis kantata de la kongresanoj kun granda entuziasmo.

UNUA LABORA KUNSIDO. — La 18^{an} je la deka matene, ĉe la «Scienca Ateneo», okazis la Unua Labora Kunsido.

Dum ĝi oni pritraktis la konvenecon de Iberia organizaĵo esperantista, kaj estis diskutataj proponoj de S-roj Julio Mangada kaj Roberto Maraury. La Kongreso decidis, ke oni atentu pri kelkaj partoj de la propono de S-ro Mangada, kiam oni definitive starigos la Iberian Esperantistan Konfederacion. Oni komisiis al S-ro Maraury la efektivigon de lia propono verki «sciencstilan» raporton por propagando de Esperanto inter la sciencistoj.

VIZITO AL LA SPECIMENA FOIRO. — Je la kvara posttagmeze, la Kongresanoj vizitis la Valencian Foiiron de Specimenoj, kie troviĝas, simile kiel en tiu de Barcelona, esperantista stando kun ekspozicio kaj propagandejo. La esperantistoj estis kore akceptataj de la Direkcio, kiu en kondukis Esperanton en la foirajn aferojn.

EN LA ĜARDENOJ «LOS VIVEROS.» — Elirante el la Foirejo, oni direktis sin al tiuj belegaj ĝardenoj, kiuj pravigas la alnomon «urbo de la floroj» donitan al Valencio. Dum ripozado en belega kaj kaŝita angulo, kelkaj poeziamaj samideanoj deklamis sonorajn versaĵojn kaj samideano Won Kenn, petite de ĉiuj, ankaŭ diris — pli bone: kantis — poeziaĵojn en ĥina lingvo.

ĈE LA SOCIETO «RAT PENAT». — Poste ni estis kondukataj al la fama Valenciana societo, kies sidejon kaj vidindaĵojn ni admiris. Oni ankaŭ improvizis ĉi tie alian intiman vesperfeston, kaj oni kantis la Valencian himnon, en Esperanto, tradukitan de kataluna esperantisto honore al la Valencianoj. Mirige sonis kun la belega muziko de la Valenciana himno la esperantaj vortoj:

«... kaj etendas ĉie kampoj Valencianj
tapiŝon el rozoj, nardoj kaj dianoj.
Montras riĉan trezoron
la oranĝarboj de l' riverbordo,
pendas sub la arkaĵoj
de l' belaj palmoj daktiloj oraj...»

DUA LABORA KUNSIDO. — Ĝi okazis, kiel la unua, ĉe «Scienca Ateneo», la 19^{an} matene.

Estis diskutata kaj aprobata, nur kun malgrandaj ŝanĝoj, la projekto de regularo por la starigota «Iberia Esperantista Konfederacio», kiun prezentis S-roj Manuel Maynar kaj Emilio Gaston, komisiitaj antaŭ du jaroj en la Kunveno de Zaragoza, por redakti tiun regularon.

Laŭ ĝia 1^a regulo, la fondota «Iberia Esperantista Konfederacio» celas starigi oficialigon de Esperanto en Iberio. La Federacioj kiuj konsistigos la Konfederacion, havos plenan liberecon en sia propra teritorio. Esperanto estas la sola lingvo uzota de la Konfederacio en siaj internaj rilatoj.

Diskutis kaj aprobis tiun regularon, reprezentante la Katalunan Federacion, S-roj Joan Gili Norta kaj Jaume Grau Casas.

La O. K. de la Valencia Kongreso zorgos pri la starigo de la Konfederacio.

FESTENO. — S-ro Andrés Piñó, animo de la Kongreso kaj pioniro de Esperanto en Valencio, bonvolis regali per komuna tagmanĝo kun li ĉiujn reprezentantojn de Federacioj kaj ĉefaj societoj. Ni denove dankas S-ron Piñó pro tiu kaj multaj aliaj afablaĵoj. La kunmanĝantoj, invititaj de S-ro Piñó, estis: S-ro Kenn; S-ro Luna, el Madrid; S-ro Maynar, el Zaragoza; S-ro Díaz, el Sevilla; S-ro Mármo, el Sevilla; S-ro Barceló, el Palma de Mallorca; S-ro Gili, el Barcelona; S-ro Grau, el Barcelona. Dum la festeno oni interŝanĝis impresojn pri nia movado.

FERMA KUNSIDO. — Dum ĝi oni aprobis la tekston de kelkaj rezolucioj, estis klarigataj kelkaj demandoj kaj estis rekomendata plena fideleco al la fundamento de Esperanto kaj obeemo al la saĝaj konsiloj de niaj Lingvaj Institutioj.

Oni legis kelkajn leterojn de samideanoj el Portugalujo, esprimantajn aliĝon al la Kongreso kaj al la Iberia Konfederacio.

La kongresanaro montris ĝojan aprobon al la ideo, proponita de la samideanoj el Bilbao, kiuj ne povis veni Valencion, okazigi tie la venontan Iberian Esperantistan Kongreson.

Ni, katalunoj, faris inviton al ĉiuj ĉeesti nian XI^{an} Kongreson okazontan en Vich dum Junio 1924. Nia amiko S-ro Barceló el Palma de Mallorca, la simpatiaj samideanoj el Andalucio S-roj Díaz kaj Mármo, kaj kelkaj aliaj ankoraŭ, promesis veturi Katalunujon por ĉeesti nian Kongreson.

LUNĈO DEDIĈATA DE LA URBESTRARO AL LA ESPERANTISTOJ. — En la belega «Palaco de la Ekspozicio», je la 6^a vespere, okazis tiu honora lunĉo. Reprezentanto de la Urbestro proponis ĝin al la Kongresanoj. Respondis al li, esprimante dankon, S-ro Maynar, en hispana lingvo, S-ro Grau, en kataluna, kaj S-ro Kenn, en esperanta. Kelkaj aliaj samideanoj kaj ne samideanoj ankaŭ parolis kaj tostis por Esperanto kaj por Valencio. Dum la gaja lunĉo la Muzikistaro aŭdigis la Esperon, la Valencian himnon, Katalunan sardanon «La Santa Espina» kaj la Aragonan dancon «la Jota». La ĉeesto de multaj kaj multe belaj Valencianinoj pligrabligis ankoraŭ nian restadon ĉe la «Ekspozicia Palaco» dum tiu por ni

memorinda lunĉo. Dankon al la malavara kaj gastama Urbeŝtaro de Valencio!

ESPERANTA DISERVO. — La 20^{an}, matene, okazis Esperanta Diservo en la Preĝejo de la Piaj Lernejoj. Predikis en la internacia lingvo Pastro Antoni Guinart, el Castelló de la Plana, unu el la plej malnovaj esperantistoj. Li esprimis sin per tute korekta lingvo, kvankam de antaŭ multaj jaroj ne plu okupiĝis pri Esperanto.

MALKOVRO DE MARMORA TABULO. — Kun granda soleno estis malkovrata marmora tabulo, ĉe la Piaj Lernejoj, kun la jena surskribo: «Al la Piaj Lernejoj — lulilo de Esperanto en Valencio en 1902 — la Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj — Majo 1923». Poste oni faris fotografajn de la kongresanoj, en vasta korto de la Lernejoj.

KONGRESINSIGNO, APARTE MENCIIINDA. — La Kongresinsigno donacita al ni de la Valenciaj amikoj estas sendube unu el la plej belaj. Arĝenta medalo, sur kiu en reliefo vidiĝas la Diino Iberia, la Elŝ'a Venuso, plej delikata kaj ĝusta simbolo de Iberio... Esperanta surskribo kaj verda rubando kompletigas ĝian signifon.

RESUMO. — Dum la kongrestagoj ni vizitis tre valoran Paleontologian Muzeon kaj alian Muzeon pri Pentraĵoj, la Katedralon, la «Lonja», la Turojn de Serranos, kaj aliajn vidindaĵojn. Ni havis okazon amikiĝi kun amaso da simpatiaj kaj entuziasmaj samideanoj el Cheŝte, gvidataj de S-ro Máñez; kun multnombraj lertaj kaj malnovaj esperantistoj el la Valencia ĉefurbo; kun afablaj fraŭlinoj milde kaj melodie parolantaj Esperanton; ni ĝojis revidi malnovajn amikojn kaj akiri novajn; ni ĝuis la afablecon kaj bonkorecon de tiom da samideanoj, ke estas neeble esprimi nian dankon al ili unuope. Ni salutas ilin ĉiujn, salutante nian karan, estimatan, neforgeseblan amikon Piñó...

J. G. C.



Nekrologo

Ni sciĝis pri la morto de la samideanoj Geroni Boris, el Girona, kaj Jaume Vilaseca, el Barcelona.

La unua estis malnova esperantisto, dum multaj jaroj kasisto de «Ĝerona Espero» kaj organizanto de nia IX^a Kongreso; la dua, travivinta kelkajn jarojn en Ameriko, estis inteligenta direktoro de «Argentina Esperantisto» kaj antaŭ nelonge Komitatano de K. E. F.

Ni esprimas al la familioj de ambaŭ mortintoj nian sinceran kondolencon. Ili pace ripozu!

Lingvaj Respondoj

laŭ la vulgara scio kaj saĝo de Iu Ajn

ERARA KOMPREENO PRI OT

Kelkaj esperantistoj donas al la frazo «Jen libro legota» ian sencon de «Jen libro por legi (destinita al legado)». Tio ĉi estas eraro.

«Jen libro legota» signifas «Jen libro kiu estos legata», ĉar

legata	egalvaloras	kiu estas legata
legita	»	kiu estis legata
legota	»	kiu estos legata

Tial, se mi diras «Jen libro legota», mi ne diras ke ĝi *estas destinita al legado*, sed mi asertas ke ĝi *estos legata* (ĉar mi kredas ĝin tre bona kaj konsekvence mi supozas ke oni legos ĝin).

«La legota libro» signifas «La libro kiu estos legata», sed ne «La libro destinita al legado» (kiu eble NE estos legata).

OT KAJ LA NOVA FORMO END

La defendantoj de la formo *end* (*laudenda, kredenda, legenda*), kiun mi konsideras absolute nenecesa kaj eĉ malutila, opinias, ke, ĉar

legOTA signifas kiu ESTOS legata
ili bone agas dirante

legENDA en la senco de kiu DEVAS ESTI legata.
Do la afero estas nur pri ESTOS aŭ DEVAS ESTI.

Mi kredas, ke, propre kaj ĝuste parolante, oni ne povas diri pri io, ke ĝi DEVAS ESTI legata, sed nur oni povas diri, ke ĝi MERITAS ESTI aŭ INDAS ESTI legata. Do ni simple diru, ke ĝi estas LEGINDA.

Nenio (libro, ĵurnalo, artikolo) DEVAS esti legata, sed en la okazo ke iu interesege verko DEVAS (HAVAS LA DEVON) esti legata, kaj ĝi neniel povas eviti al si la plenumadon de tiu devo, tiam ĝi nepre estas LE-GOTA!!!

Ne iu libro DEVAS esti legata de la esperantistoj, sed la esperantistoj DEVAS legi tiun libron. Do la ideo pri DEVO (kiun la uzantoj de *end* volas precizigi kaj distingi de tiu pri ESTONTECO) pli ĝuste koncernas la aktivan formon ol la pasivan.

Ni uzu nur la konsilindajn OT kaj IND, kaj ni lasu al la partianoj de la formo «legenda», la pligrandigon de ĝia legenda (!) famo.

Bibliografio

UNIVERSALA LEGOLIBRO, Wilhelm Fricke. Modelaj tradukaĵoj el la tutmonda literaturo kaj originalaĵoj Esperantaj. Eldonis: Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel, Berlin 1922.

Libro 176-paĝa, kun 36 legaĵoj el la germana literaturo, 30 el la literaturo tutmonda, kaj 24 originalaĵoj. Ĝi enhavas multajn versaĵojn. La stilo estas tre bona kaj ĝenerale estas tre interesaj la elektitaj legaĵoj. Teksto presita per grandaj kaj klaraj literoj.

ELEKTITAJ HUMORAJ RAKONTOJ. Represitaj el «The British Esperantist» kaj «The Esperanto Monthly». Eldonis: Brita Esp. Asocio, 17, Hart Street, London W. C. 1. 1922.

Broŝuro 24-paĝa, enhavanta 9 humorajn rakontojn, kiuj estas tre bonstilaj kaj taŭgaj por ekzercado.

KOREKTO DE LA ERARAJ TRADUKOJ EN «UNIVERSALA VORTARO» (ANGLA PARTO). Th. Cart, kun aprobo de la Lingva Komitato. «Kolekto de la Akademio». Eldonis: B. E. A., London.

UNUA LEGOLIBRETO, K. Bruggemann. (Rakontoj, fabeloj kaj popollegendoj). Universala Biblioteko, n-ro 1. Esperanto-Verlag Friedrich Ader, Dresden-A. 27, 1922.

64-paĝa libreto, kiu enhavas 19 interesajn legaĵojn en prozo.

DUA LEGOLIBRETO, K. Bruggemann. (El literaturo, arto kaj scienco). N-ro 2 de la Universala Biblioteko. Eldonis: F. Ader, Dresden, 1922.

Legolibro simila al la antaŭa, enhavanta 16 rakontojn.

ESPERANTO FOR ALL. Propaganda broŝuro 36-paĝa, en angla lingvo, eldonita de la Brita Esp. Asocio.

Ĝi enhavas, krom propagandaj artikoloj, la Esperantan gramatikon kaj ekzercaron.

DAS DEUTSCHE LIED IN ESPERANTO. Germanaj kantoj esperantigitaj, kompilitaj de Friedrich Pillath. Eldonis: Ellersiek & Borel, Berlin, 1922.

Dua kompletigita eldono, kiu montras la sukceson de tiu kantaro. Nur estas presita la teksto, sed ne la muziko de la kantoj.

Enlanda Kroniko

BARCELONA

— En la Foiro de Specimenoj, okazinta dum Marto, estis instalata, same kiel en pasintaj jaroj, esperanta propagandejo. La Direkcio de la Foiro disponigis por K. E. F. duoblan standon, kiu pleniĝis de libroj, murafiŝoj katalogoj, poŝtkartoj k. t. p. Estis disdonataj pli ol 4.000 propagandiloj kaj vendataj multaj libroj.

— La 25^{an} de Marto, ĉirkaŭ 200 gesamideanoj el Barcelona kaj Sabadell vizitis la Foiiron de Specimenoj, laŭ speciala permeso. Ili estis akceptataj de la Foiira Direktoro S-ro Barceló kaj Sekretario S-ro Pujulà. En la salono dediĉata al la industrioj pri la Libro, antaŭ granda popolamaso, kaj kun ĉeesto de S-ro Carvajal, delegito de la Komerca Ĉambro de Madrid, kaj de aliaj konataj komercistoj kaj industriistoj, ĉaroladis en Esperanto la Sekretario de la Foiro S-ro Pujulà, kiu diris ke malgraŭ lia apartiĝo de la aktiva esperanta movado, li ĉiam havas la saman entuziasmon por Esperanto, kiel dum tiuj tempoj kiam li estis Prezidanto de la V^a Universala Kongreso. Poste parolis S-ro Jaume Grau Casas, katalune pri la uzado de Esperanto ĉe la internaciaj Foiroj, kaj en Esperanto por danki al S-ro Pujulà, en la nomo de la kataluna samideanaro, lian neelĉerpeblan fervoron kaj laboremon. La flueco de ambaŭ parolantoj mirigis la aŭskultantaron, kiu restis konvinkita pri la utileco de Esperanto kiel internacia lingvo.

— Ĉe «Ateneu Empordanès», la 27^{an} de Marto, paroladis S-ro Delfi Dalmau pri «la sensencaĵoj kiujn skribas la nekonantoj de Esperanto», responde al artikolo aperinta sur la Barcelona ĵurnalo «La Vanguardia». S-ro Dalmau elokvente parolis dum pli ol unu horo antaŭ distinginda publiko, vidigante el ĉiuj vidpunktoj la avantaĝojn de Esperanto. Merititaj aplaŭdoj kronis lian disertacion.

— Ĉe «Enciklopedia Popola Ateneo» komenciĝis la 4^{an} de Aprilo nova kurso, gvidata de S-ro Delfi Dalmau.

— La societo «Nova Sento» ankaŭ malfermis kursojn, la 9^{an} de Aprilo, gvidatajn de S-roj Jaume Grau kaj J. Zanón.

— En la grupo «Barcelona Stelo», la 21^{an} de Aprilo, okazis lunĉo dediĉata al S-ro Joan Gili Norta, eks-prezidanto de K. E. F., por festi lian revenon de Ameriko. Estis legataj kelkaj poeziaĵoj kaj la ĉarma grupanino F-ino Paquita Martí ludis pianе kelkajn pecojn. La honorito S-ro Gili diris je la fino dankajn vortojn, responde al la tosto de multaj liaj amikoj bonvenantaj lin. Ni deziras, ke nia kara amiko Gili longe restu inter ni, antaŭ la denova vojaĝo kiun li estas entreprenonta.

— Kursoj de Esperanto ankaŭ okazas ĉe «Barcelona Stelo», «Paco kaj Amo» kaj «Barcelona Esperanta Societo».

— La 27^{an} de Majo, en la sidejo de K. E. F., paroladis pri «La moderna Ĥinujo» S-ro Won Kenn, ĥina samideano ĉeestinta la Kongreson de Iberiaj Esperantistoj en Valencio. La katalunoj kiuj partoprenis tiun Kongreson, tuj amikiĝis kun la simpatia ĥino kaj eminenta samideano S-ro Won Kenn, kaj baldaŭ atingis de lia afableco ke li venu Barcelonon. Lia parolado multe interesis la Barcelonan esperantistaron, kiu tuta kunvenis en la granda salono. Poste, S-ro Kenn bonvolis, laŭ insista peto, deklami versaĵojn kaj prozaĵojn ĥinajn, kiuj, eĉ ne komprenitaj, estis pro la bela sonoreco multe aplaŭdataj.

S-ro Kenn vizitis la urbojn Barcelona, Terrassa kaj Sabadell, kie li lasis multajn amikojn.

— Ankaŭ vizitis nin aliaj eksterlandaj samideanoj: la eminenta verkisto S-ro Geo Gordon, el Aŭstralio, tradukinto de kelkaj anglaj prozaĵoj; kaj la samideanoj Nederlandaj S-ro Wouter Lutkie, katolika pastro, kaj S-ro Doktoro Emile Verviers.

Ni esperas, ke al ili ĉiuj estis plaĉa la restado en nia bela Barcelona urbo, malgraŭ ĝia malbonfamo pro la akraj socialaj malkvietaĵoj.

SABADELL

— La 25^{an} de Marto okazis propaganda kunveno, ĉe Esperanta Grupo «Aplec», dum kiu paroladis S-ro Eusebi Artigas, Prezidanto; S-ro Conrad Domènech, el Girona; S-ro Marian Solà, el Terrassa; kaj S-ro Jaume Grau Casas, el Barcelona.

— Komenciĝis du novaj kursoj, unu el ili speciala por fraŭlinoj.

VICH

— S-ro Jacinto Comella restarigis la Grupon «Vika Esperantistaro» kaj gvidas kurson tre ĉeestatan.

— Ĉe la Laborista Societo, la 3^{an} de Junio, faris propagandan paroladon S-ro Jaume Grau Casas, pri la temo: «L'Esperanto, factor de cultura». Sekve de tiu parolado, komenciĝis kurso de Esperanto.

— S-roj Gili, Zanón kaj Grau, el la Komitato de K. E. F. faris viziton al la urbo por pritrakti kun la lokaj samideanoj la okazigon de la venonta Kongreso. La unuaj laboroj tiucele plene sukcesis. S-ro Comella atingis de eminentaj personoj kaj societoj jam kelkajn premiojn por la proksima festo de la Floraj Ludoj.

Als amics de "Kataluna Esperantisto"

Hom recordarà que fou rebutjada per 3 vots de majoria, en el darrer Congrés a Manresa, la proposta d'augmentar a 10 pessetes la quota anyal, presentada pels «samideanoj» que d'una manera més activa ens ocupem de la direcció de la «Federació Catalana d'Esperantistes».

Malgrat el refús dels federats a prestar aquelles col·laboracions que nosaltres jutgem necessàries a la bona marxa de la Federació, la majoria dels firmants de la proposició acceptàrem de seguir encara un any més amb els nostres càrrecs, fent un no petit sacrifici, amb l'esperança que d'una manera o altra ens seria possible de resoldre la qüestió econòmica que plantegen el sosteniment de la nostra revista i la celebració dels nostres brillants Congressos i Jocs Florals Internacionals.

En el número darrer, repartirem una fulla exposant la situació i demanant ajuda a tots, bé per mitjà de donatius, bé per l'augment voluntari de la quota. Ens cal constatar que la nostra crida ha estat ben poc eficaç.

Renovem el prec avui, esperant encara que serà escoltat d'aquells que veurien amb sentiment la mort de «KATALUNA ESPERANTISTO», reconegut per tothom òrgan indispensable, llaç d'unió de tots els federats, instrument de preparació dels Congressos i mitjà de publicació de la majoria d'obres premiades en els Jocs Florals.

Si a la fi no trobem la cooperació necessària (devem eixugar un dèficit produït principalment per l'impossibilitat de cobrar nombroses cotitzacions) dubtem molt de poder seguir publicant amb regularitat «KATALUNA ESPERANTISTO» i declinem des d'ara la responsabilitat de la seva total desaparició, en el cas més dissortat.

L'evitar-ho és a la mà dels esperantistes de Catalunya, dels adherits a la Federació i dels amics de la nostra revista.

Els pocs qui constantment intervenim en aquests afers no podem ja fer més, ni donar més.

LA REDACCIÓ



VERKOJ DE PUJULÀ

AĈETEBLAJ ĈE K. E. F.

Vocabulari
Català-Esperanto



PREZO: 3 PTOJ.

Vortaro
Esperanto-Kataluna



PREZO: 3 PTOJ.

La Grafo
erarinta

Ĉarma originala rakonto. Volumeto tre lukse presita, kun desegnaĵoj de Torné Esquius.



PREZO: 0'50 PTOJ.

Naivulo -
Karabandolo la
plugisto -
Fiskaptisto
kaj Rigardanto

Originalaj rakontoj, kun desegnaĵoj de Torné Esquius. Lukse presita volumeto.



PREZO: 0'50 PTOJ.

AL LA GRUPOJ NI FARAS 25 % DA RABATO

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉ (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (i), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(soná J)

forma el plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufixe per a formar el femeni

sinjorino, reĝino
katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerç)

A

terminació adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

terminació adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

mode condicional

U

mode imperatiu o subjunctiu

Mi	skribas	skribis	skribos	skribus	skribu
Jo	escrie	escrigui	escriuré	escriuria	escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti* i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita.

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En Esperanto, tota paraula que reb l'acció d'un verb (complement directe) va seguida de la lletra **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escrie la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius s'expressa per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.

KATALUNA ESPERANTISTO

(L'ESPERANTISTA CATALÀ)

MONATA GAZETO, ORGANO DE LA



DUA EPOKO - JARO III^a : AUGUSTO-SEPTEMBRO 1923

Literatura Mondo

Monata gazeto, ilustrita, grandformata, almenaŭ 20-paĝa.

Interesa enhavo kaj bonega stilo. Originalaj esperantaj verkoj kaj tradukoj el ĉiuj lingvoj.

JARABONO: 12 PESĖTOJ

K. E. F. akceptas abonojn

Andrássy-ut, 81.

BUDAPEST

Esperanto Triumfonta

Ĉiusemajna gazeto,
kun bonega informado pri nia movado en la tuta mondo

PREZO: 0'30 PTOJ. NUMERO

HORREM BEI KOLN
(Germanujo)

CURS PRÀCTIC DE LA LLENGUA

ESPERANTO

PER FREDERIC PUJULÀ I VALLÉS,

amb les regles gramaticals,
exercicis en Esperanto i en

Català, i vocabulari
Català - Esperanto.

SEGONA EDICIÓ

PREU: 0'75 PTES.

Gramática Esperanto

— PEL —

DR. J. BREMÓN MASGRAU

3.^a EDICIÓ

PREU DE LA OBRA EN TELA:

4 PESSETES



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

XV^a Universala Kongreso de Esperanto

Nürnberg 2 - 8 Aŭgusto 1923

RUN kelkaj amikoj samurbanoj mi havis la grandan plezuron veturi al tiu gravega kaj sukcesa kunveno de Esperantistoj. Post kelkaj tagoj de restado en Parizo, kie ni ankaŭ vizitis kunvenon de samideanoj prezidatan de S-ro Le Cornec, ni veturis la lastan tagon de julio tra Basel al Nürnberg, kie ni alvenis la 1^{an} de Aŭgusto vespere: proksime de la stacidomo troviĝis la Akceptejo, kie oni donis al ni ĉiujn kongresajn dokumentojn kaj la nomon de la hotelo en kiu ni estas loĝigotaj. Tie ni sciigis pri la granda nombro de kongresanoj — 5.000 aliĝoj kolektiĝis entute, el 41 diversaj landoj kaj 3200 persone partoprenis la Kongreson. Bedaŭrinde pro la malfavoraj politikaj cirkonstancoj, lastahore pli akriĝintaj ankoraŭ, la francaj kaj belgaj esperantistoj nepre devis rezigni sian partoprenon, kaj mi estas tute certa ke niaj germanaj amikoj estas la unuaj kiuj bedaŭras tiun gravan mankon.

La Kongresejo troviĝis en la granda kaj vasta domo de la «Kulturunuiga Societo»; bela kaj ĝojiga vidaĵo estis certe la granda kaj intensa svarmo de la kongresanaro kiu neniam ĉesis tie de mateno ĝis vespero; ĉiu deziro de la kongresanoj povis esti tuj plenumata, ĉar tie troviĝis poŝtoficejo, telegrafejo, monŝanĝejo, legejo, sekretario, butikoj por vendado de libroj, ĝicetoj por la spektakloj, redakcejoj de Esp. Triumfonta, kiu aperis ĉiutage kaj vendiĝis po 10.000 markoj la numero, ankaŭ tiu de «Literatura Mondo»,

salonoj sufiĉe grandaj por la fakaj kunvenoj, restoracio, kafejo, ĝardenoj, kaj fine la granda festsalono, kapabla enteni pli ol kvar mil personojn.

La duan de Aŭgusto, matene je la 11^a, la granda salono de la kongresejo estis tute plena de la kongresanaro atendanta la plej belan solenajon de la kongreso, t. e. la Malferma Kunsido. Apenaŭ ni sukcesis trafi seĝojn: la estrado estis bele ornamita kun la necesaj alegoriaĵoj: en ĝi troviĝis la aŭtoritatuloj, la ĉefa stabo de esperantismo kaj la reprezentantoj de registaroj kaj delegitoj de internaciaj societoj aliĝintaj al nia festo; en flankaj logioj sidis ankaŭ S-ino Zamenhof akompanata de diversaj aliaj sinjorinoj. Kun la laŭtaj sonoj de l'orgeno kiu ludis nian himnon starigis la tuta ĉeestantaro kaj emociis ĝin kantadis; tuj poste parolis S-ro Von Frenkell, prezidinto de la lasta kongreso en Helsinko, deklaris la nunan malfermita kaj proponis la estraron por la venontaj kunsidoj. Profesoro D-ro Dietterle el Leipzig, elektita kiel prezidanto de la XV^a, faris sian tre interesan paroladon, salutis la aŭtoritatojn de la germana respubliko kiu tiel multe helpis per sia apogo al la Kongreso, rememorigis pri niaj mortintaj kunatantoj kaj salutis kaj dankis por ŝia ĉeesto S-inon Zamenhof; aŭdinte ŝian nomon kaj ŝin vidinte, fortega kaj longa ovacio ŝin salutis entuziasme. S-ro Ŝtatssekretario Von Schulz, starigis kaj en la nomo de la Prezidanto de la Germana Respubliko S-ro Ebert, alta protektanto de nia Kongreso, kaj de la Ministerio por la Interno li diris sian saluton al la kunveno, kaj faris tre agrablan por ni paroladon; tiu estis tuj tradukita al Esperanto kaj ĝi aperis stenografiita en Esp. Triumfonta en kies paĝoj vi sendube ĝin jam legis. En Esperanto faris sian paroladon la Urbestro de Nürnberg D-ro Luppe; post li salutis la kongreson la prezidanto de la L. K. K. D-ro Ledermann, kaj tuj venis la bonega parolado de S-ro Privat el Genevo kiu kolektis longan kaj aproban aplaudadon de la ĉeestantaro. Ankoraŭ salutis la kunvenon la oficialaj reprezentantoj de la registaroj aliĝintaj kaj la delegitoj de Internaciaj Societoj. Vere solena kaj impona manifestacio estis la Malferma Kunsido de nia ĉefa esperanta festo.

Posttagmeze en apuda konstruaĵo speciale al tio destinata, okazis la multnombraj fakkunvenoj, pri kiuj kompreneble mi ne raportos ĉar mi havas nur unu korpon kaj ne povis esti ĉie samtempe: tial mi diru ke mi nur ĉeestis tiun de Internacia Scienca Asocio, kiu plej multe interesis min; la kunsido estis tute okupita de organiza laboro, rekomendoj kaj kritikoj pri la gazeto, kaj diskuto pri teknika vortaro.

Vespere en la granda kaj bela urba teatro okazis la prezentado de la konata muzikdramo de Wagner «La Majstrokantistoj de Nürnberg»: la loko ne sufiĉis por ĉiuj kongresanoj; laŭ diro de la feliĉuloj kiuj povis ĉeesti, la ludado estis tre ĝusta kaj arta. Ni kaj multaj aliaj, kompreneble, kiuj restis sen bileto por la opero, tamen sufiĉe bone amuziĝis en la kongresejo, kie la redakcio de «Literatura Mondo» regalis nin per Kabareda Vespere. Niaj hungaraj samideanoj F-inoj Péchan, Noiret kaj S-roj Baghy, Kalocsay, Sarossy, Hevesi k. c. tre ĉarme kaj arte ludis la teatraĵojn, kantojn, dekla-

mojn, k. c. Tre amuziga estis la ŝerca dialogo de Karinthy «Du Psikiatroj»; entute bela vespero.

La 3.^{an} de Aŭgusto matene okazis la I^a laborkunsido, en kiu salutis la kongreson la naciaj delegitoj, kaj estis komencita la diskutado pri la raporto de U. E. A. Tagmeze antaŭ la monumento de la fama pentristo kaj gravuristo Alberto Dürer, naskiĝinta en la urbo, kolektiĝis la tuta kongresanaro kaj post diversaj paroladoj laŭdantaj lian valoran kaj tutmonde konatan verkaron, la Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato en ĉies nomo demetis honoran surskribaĵon ĉe la bazo de la monumento.

Posttagmeze okazis diversaj fakaj kunvenoj kiujn mi ne ĉeestis. Kun kelkaj eksterlandaj gesamideanoj ni iom ekskursis tra la belaj kaj pentrin-daj stratoj de la urbo; ni laŭiris la muregojn kiuj kun siaj fosaĵoj tute ĉirkaŭas kaj fermas la malnovan Nürnberg, ni vizitis la katedralon de Sankta Laŭrenco, la Urbdomon, la Kastelon, la malnovan domon de Dürer, kiu konservas ankoraŭ tute saman aspekton kiel dum la XV^a jarcento kiam la fama pentristo okupis ĝiajn ĉambrojn; la urbo zorgas pri la konservado de la domo kaj tie aranĝis interesan kolekton de liaj verkoj per kio fariĝas la vizito ankoraŭ pli agrabla.

Vespere en la salono de la Kongresejo, ni havis tre belan kaj aŭdindan Madrigal-Koncerton; urba kant-societo regalis nin per siaj kantoj, ĉiuj en Esperanto; fervoraj aplaŭdoj premiis kiel dece ilian taskon. Samtempe okazis en Katarina Preĝejo la Blindula Koncerto kiun partoprenis ankaŭ granda nombro de kongresanoj; interese estos ankaŭ raporti pri la granda nombro de blindaj esperantistoj kiuj kolektiĝis en Nürnberg kaj havis tie siajn kunvenojn. Ankaŭ samtempe okazis en aliaj salonoj de la kongresejo paroladoj pri Sporto, S-ro Ojander (Helsinki) kaj pri Australio S-ro Drummond (Melbourne).

Sabaton, la 4^{an} matene okazis la diversaj diservoj kun esperanta prediko; en la Madona Preĝejo por katolikoj, en Sebald Katedralo por protestantoj kaj en la Sinagogo por hebreoj. Posttagmeze la kuracistoj kolektiĝintaj en la kongreso faris ekskurson al la Universitato en Erlangen por tie viziti la plej modernajn eltrovojn en la fako de Roentgen-radioj.

Vespere en la Kongresejo okazis grava Instrument-Koncerto, kiun ludis urba orkestro; la muzikaĵoj, verkoj de Mozart, Weber, Beethoven kaj Wagner havis la plej grandan sukceson. Ankoraŭ en la sama tempo okazis parolado de S-ro Böning (Stuttgart) pri la Bahaista Movado.

Dimanĉon la 5^{an}, matene je la sesa la Nürnberga stacidomo estas tute almitita de la kongresanoj; nur esperanton oni aŭdas sur la peronoj. La tago estas dediĉota al ekskurso al la bela somerrestadejo Rothenburg. Tio ĉi estas vilaĝo kun 9.000 loĝantoj, kuŝanta je proksimume tri horoj da veturado el Nürnberg; ĝi estas tre antikva imperiestra vilaĝo, kiu plene konservas ankoraŭ en la stilo de siaj domoj kaj konstruaĵoj la karakteron de la mezepokaj tempoj. Du longaj specialaj vagonaroj estis pretaj por la transportado de la kongresanaro; en Rothenburg ni alvenis je la naŭa kaj duono,

En la granda placo antaŭ la bela Urbdomo akceptis nin per bonvenanta parolado la Urbestro al kiu respondis D-ro Ledermann; tuj poste en la salono de la Urbdomo tiucele aranĝita okazis la fama prezentado de la «Majstro-Trinko», tradicia epizodo el la Tridekjara Militado, okazinta en la sama domo kie nun la loĝantaro ludas ĝin ĉiujare en la pentekostaj tagoj; honore al la kongresanaro en tiu tago ili ludis la faman epizodon du fojojn, matene kaj posttagmeze por ke al ĉiu estu ebla vidi ĝin. Kvankam la verko estis ludata en germana lingvo, tamen la ludo estis sufiĉe komprenebla kaj precipe la ludantoj aspektis vere kiel profesiaj aktoroj: neforgesebla estos por mi la bela spektaklo kiun mi ĝuis kaj pri kiu mi rajtas diri ke ĝi estis la plej interesa kaj vizitinda kongresa spektaklo. Posttagmeze kelkaj paroj de vilaĝanoj kun malnovaj kostumoj montris al ni kelkajn specimenojn de naciaj dancoj. Post promonado tra la antikva vilaĝo kaj tra la pentrindaj ĉirkaŭaĵoj oni reveturis al Nürnberg kie ni alvenis je la noktomezo.

London, la 6^{an} matene, II^a Laborkunsido, en kiu estis elektitaj la personoj kiuj konsistigos de nun la Centran Komitaton de la Esperanto-Movado: S-roj Privat, Page, Warden, Dietterle, Hromada kaj Kenn, estas elektitaj por la diversaj postenoj; sekvas diskutoj pri la organizo de U. E. A. kaj pri la raporto de la provizora Centra Komitato kiu funkciis ĝis la kongresaj tagoj. Tagmeze 1.500 gekongresanoj kuniĝis por la oficiala festeno kiu okazis en la granda salono kaj estis prezidata de S-ino Zamenhof kaj la estraro de la Kongreso. La manĝo estis tre simpla pro la malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj de la lando, tamen granda entuziasmo regis en ĉiuj tabloj, internacia babilado gajigis la korojn, kaj je la fino ni aŭdis la kutimajn kaj eble eĉ iomete tro abundajn tostojn.

Vespere en la Urba Teatro okazis la prezentado de la drama verko de Lessing «Natan la Saĝulo» tradukita de S-ro Karl Minor. La aspekto de la teatro estis vere belega: sufiĉos diri ke ankaŭ ne ĉiuj kongresanoj trovis lokon. La ludado kaj enscenejigo de la verko estas efektive laŭdinda kaj la prononcado de la aktoroj perfekta, tiel ke la spektatoroj atente povis ĝui la belajojn de la verko. Bedaŭrinde la verko estas pli tauga por intima legado ol por prezentado en teatro kie oni amas pli da movado kaj da rapida dialogo; almenaŭ tiu estas mia persona gusto kaj prefero, sed ankaŭ de aliaj mi aŭdis saman opinion; kompreneble oni devas ankaŭ atenti al tio ke ĝi ne estas verko moderna, kaj sekve verkita laŭ tute aliaj reguloj ol nunaj. La aktoroj, tamen, vidis sian bonegan taskon rekompencata per longa, ĉiam renovigita, aplaŭdado.

Mardon, la 7^{an} matene, III^a Laborkunsido, en kiu plej grava decido estas la elektado de komercaj delegitoj de U. E. A. S-ro Privat raportis pri la Venezia Konferenco kaj ĝiaj efikoj, oni esprimis la deziron ke tiuj ĉi specialigitaj konferencoj estu daŭrigataj; oni legis la malfavoran al Esperanto rezolucion de la Intelekta Komisiono de la Ligo de Nacioj kaj oni decidis ne plu fari iun paŝon en la Ligo ĝis kiam la registaro en Francujo ne montrus sin tiel malfavora al la akcepto de Esperanto.

Je la dekdua S-ro Drezen, prezidanto de la Tutruslanda Soveta Unuiĝo, faris tre interesan privatan paroladon pri la stato de la ekonomio en Ruslando; tiu ĉi parolado vekis tre grandan intereson kaj multaj kongresanoj plenigis la salonon en kiu ĝi okazis. Vere S-ro Drezen montris sin lerta parolanto kaj ankoraŭ pli bona polemikisto kiam li respondis al la multaj demandoj al li faritaj de la ĉeestantoj. Al mi persone plaĉis ke la esperantistoj ne timas paroli pri aktualajoj kaj ke oni aŭdas paroladojn ne plu pri grizaj, senenhavaj temoj, sed pri viglaj kaj vivinteresaj demandoj.

Vespere oni havis la tradician kostumbalon: multe da paroj dancis kaj dancadis ĝis noktomezo; kelkaj ankaŭ vestigis per siaj pitoreskaj naciaj kostumoj kiuj per siaj elvidiĝaj koloroj agrable nuancis la salonon. Rimarkinde estas ke en Germanujo ĉiuj amuzajoj komenciĝas tre frue en la vespero, plej ofte je la sepa kaj duono kaj finiĝas en la sama horo en kiu ĉe ni oni komencas la amuzadon. Tio ĉi kaŭzis ke ni ĉiam malfruis precipe vespere.

Merkredon, la 8^{an} matene okazis la Ferma Kunsido: multe da deziresprimoj estis voĉdonitaj pri kiuj raporti estus al mi tro malfacile; oni pridiskutis longe la proponojn por okazigo de la venonta kongreso. Proponoj venis tiucele el Bruselo, Vieno kaj Sofio; el Milano por la 1925^a jaro. Pro neebleco de interkonsento oni lasis la zorgon fari elekton al la Centra Komitato kiu post unu monato konigos sian decidon. La plej favora opinio montriĝis tamen por Sofio. Sekvis la dankaj paroloj por la Loka Komitato kiu tiel bone aranĝis la kongreson kaj per nova kunkantado de «La Espero» finiĝis la bela kaj granda XV^a Kongreso.

MARIAN SOLA



La Direkta Komitato de K. E. F.

La nova Direkta Komitato de «Kataluna Esperantista Federacio» konsistas nun, ĉar ne ĉiuj elektitoj en nia lasta Kongreso akceptis la postenon, el la jenaj samideanoj: Prezidanto: S-ro Joan Amades; Vicprezidanto: S-ro Ramon Soler; Sekretario: S-ro Romà Guardiet; Vicsekretario: S-ro Jaume Claramunt; Kasisto: S-ro Eduard Capdevila; Administristo: S-ro F. Rossell; Voĉdonantoj: S-ro Joan Castells, S-ro Antoni Durà, S-ro Joan Gili, S-ro Jaume Grau, S-ro Conrad Domènech, S-ro R. Montserrat.

Belulino Iluzio

De trapasanta belulin'
 en mia kor' la bildo restis.
 Ŝi dum momento ravis min
 kaj ho malĝoj'! tuj reforestis.

Sed dum moment' en mia kor'
 naskiĝis ĝojo kaj admiro.
 Pri ŝi vivadas rememor'!
 Pro ŝi turmentas min sopiro!

Dolĉa rigardo ravis min,
 gracia gesto,
 kaj pli ol tiu de reĝin'
 hela majesto.

Ŝiaj okuloj — fajra ard' —
 malgraŭ nigrec' montriĝis lumaj.
 Ŝia vizag', ŝia rigard',
 je am-odor' estis parfumaj.

Ŝi pasis for kvazaŭ vizi'
 ekforprenante mian volon.
 Pro mia ĵusa ampasi'
 mi falis tuj en senkonsolon!

Dolĉa rigardo ravis min,
 gracia gesto,
 kaj pli ol tiu de reĝin'
 hela majesto.

Belmova paŝ' — milda promen' —
 donis al ŝi palman gracion,
 noblecon havis la mien',
 la tuta korpo harmonion.

Ŝia belec' en malproksim'
 iom post iom malaperis,
 kaj mia korpo kaj anim'
 pro amaj vundoj eksuferis.

Dolĉa rigardo ravis min,
 gracia gesto,
 kaj pli ol tiu de reĝin'
 hela majesto.

Radia ĉarmo kaj majest'
 estis por mi feliĉ-promeso,
 kaj la graci' de ŝia gest'
 ŝajnis al mi milda kareso.

Sed vel la kara belulin'
 restis por ĉiam — fantazio!
 La cel' de mia korinklin'
 konstante estis — l'Iluzio!

En persekut' de l'Iluzi'
 mia junec' kaj viv' elfluis,
 kaj de l' nektar' de l' Ampasi'
 eĉ unu guton mi ne ĝuis.

Do ĉar la revo iĝis jam
 mia dolor' kaj mia forto,
 ke l' Iluzio pri la Am'
 min akompanu ĝis la Morto!

Dolĉa rigardo ravis min,
 gracia gesto,
 kaj pli ol tiu de reĝin'
 hela majesto!

JAUME GRAU CASAS

Alvoko al la Xaj Internaciaj Floraj Ludoj

Al la esperantistaj verkistoj:
La Komitato de la Xaj Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni en la jenaj konkursoj.

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. — Originala *Ama* verko en prozo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de unu el la jenaj versaĵoj:

VISIONS DE CATEDRALS

URBI ET ORBI

I

SANT PERE DE ROMA

Puja el romeu per l'ampla escalinata,
passa el llindar que és terme de sa via,
i en veure aquell gran temple, s'extasia
i caient de genolls, en plor esclata.

Sia vingut del Nord, de platja ingrata,
o dels soleis benignes del Migdia,
aquí troba sa llar, i la alegria
en sa mirada atònita es retrata.

Més que del or i jaspi la riquesa,
més que del lloc la colossal grandesa,
sent de sa Fe el bategar pregon;

i orant de Pere i Pau davant la tomba
li apar que per la cúpola s'esbomba
el *Credo* salvador per tot el món.

II

EL «DUOMO» DE MILÁN

Com si en rúfola nit s'hagués despresa
una allau del Montblanc que amb boja fúria
saltant i rebotent en la planúria,
informe clapissar, quedés extesa;

del geni dels llombards fou digna empresa
el fer d'un munt de roca una boscúria
de pinàculs florits on la cantúria
dels ocells refilets amb suau dolcesa.

Si el sol entre els trepats hi juguineja,
la lluna amorosida s'hi rabeja
dins la selva de marbre cisellat;

mentre d'angels i sants magna corona
fa d'escambell sublim a la Madona
que des del cim abrigo la ciutat.

Retorn

Les fades de la alpina cordillera
si en nits de clar-de-lluna van dançant,
potser guaiten geloses la encisera
blanca tofa del «Duomo» de Milán.

III

«NOTRE DAME» DE PARIS

Pel Sena corren aigües llotoses,
els anys s'empenyen en curs fatal,
races i gèneres passen frissoses,
sols resta immòbil la Catedral.

Turbes frenètiques de mans sagnoses
ha vist entrar-ne per son portal;
i en grans diades, noces fastuoses
han fet del temple tron imperial.

De ses bessones torres, sapades,
que la flanquegen, les veus sagrades
encara alegren els cors creients;

i si del púlpit vibrant ressona
veu apostòlica que al hom sermona,
la veu francesa de aquella trona
es veu que escolten totes les gents.

IV

LA CATEDRAL DE BURGOS

Creixia fort el regne de Castella
dels cristians a la empenta victoriosa;
i com Ara Votiva esplendorosa
s'alçava d'eixa Seu la meravella.

Convertit el pedreny en randa bella
i el dur granit en floracions de rosa,
s'enfila amunt la filigrana airosa
signant el vol de la nació novella.

Avui que de tants sigles la besada
la burgalesa Seu ha consagrada
com del art ogival excels primor,

admirat de la pètria orfebreria
diu l'espanyol: «A fe se'l mereixia
un tal sepulcre el Cid Campeador».

V

LA SEU DE TARRAGONA

Per muradals ciclòpics estotjada
com joia de cristiana arquitectura,
la Seu de Santa Tecla, dalt l'altura,
mostra sa noble faç pel sol colrada.

De pau i serenor mística estada
si a meditar un català s'hi atura,
de la robusta arcada en la nervura
la fibra de sa raça hi veu marcada.

Quan puja l'Arquebisbe a l'ara santa
 sap que trepitja amb sa beneita planta
 desferres del que fou temple augustal;

i així ostentant la secular corona,
 del nostre mar emmirallant-se en l'ona,
 és encar Tarragona la Imperial.

JAUME COLLELL

II. Traduko de la prozaĵo «El gorc blanc», de Martí Genís i Aguilar. (El-dono de «Biblioteca d'Autors Vigatans»).

La du eminentaj aŭtoroj, ambaŭ loĝantaj en la kongresurbo Vich, afable donis la permeson por tradukado de iliaj verkoj.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de la Ekscelenca Urbeŝtaro de Vich: 300 pesetoj. Temoj: Originala verko.
- II. — Premio de Lia Moŝto D-ro Francisco Muñoz, Episkopo de Vich: 100 pesetoj. Temoj: «La Katolikismo kaj la Paco».
- III. — Premio de Lia Moŝto S-ro Albert Rusiñol, Parlamenta deputito de Vich: Artobjekto. Temoj: Laŭvola.
- IV. — Premio de la «Terkulturista Ĉambro Ausetana»: 50 pesetoj. Temoj: Laŭvola.
- V. — Premio de la «Terkulturista Sindikato» de Vich: 50 pesetoj. Temoj: Laŭvola.
- VI. — Premio de la «Vika Industria Societo»: 50 pesetoj. Temoj: Laŭvola.
- VII. — Premio de la «Katolika Junularo»: 50 pesetoj. Temoj: Traduko de versaĵo aŭ prozaĵo de la fama poeto kataluna Verdaguer.
- VIII. — Premio de la Grupo «Vika Esperantistaro»: 100 pesetoj. Temoj: Originala teatraĵo aŭ novelo.
- IX. — Premio de la «Kanariistoj de Vich»: Bela ekzemplero de la famaj Vikaj kanarioj en latuna kaĝo. Temoj: «La amo al la birdoj».
- X. — Premio de la komerca firmo «Vda. de J. Sendra»: Tipa kolbaso de la speciala ellaborado kiu famigis la urbon Vich. Temoj: «Bonhumora versaĵo». (La donacanta firmo oferis sendi en konvena pakajo tiun «premion» al iu ajn lando).
- XI. — Premio de «Vika Kazino»: 50 ptoj. Temoj: Laŭvola.
- XII. — Premio de «Kataluna Esperantisto»: Dumviva abono al la gazeto. Temoj: «Pri la esperanta versfarado».
- XIII. — Premio de «Ateneu Enciclopèdic Popular»: 25 ptoj. Temoj: Laŭvola.
- XIV. — Premio de la Grupo «Barcelona Stelo»: Tri lukse bnditaj volumoj

enhavantaj la faman tradukaĵon de Kabe «La Faraono». Temo: Rakonto pri «Kio plej impresis min dum mia vivo».

Aliaj eksterordinaraj premioj espereble estos proponataj. Ni anoncos ilin en proksima numero de «Kataluna Esperantisto».

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

Th. CART, *prezidanto*. — Julio BAGHY. — Jacinto BREMÓN. — Jacinto COMELLA. — Estanislau PELLICER. — Jaume GRAU CASAS, *sekretario*.

Barcelona, Septembro 1923.

NOTOJ

I. — La aŭtoroj de la kvar premiitaj Ordinaraĵ Temoj (*Originalaj Tekstoj I, II; Tradukitaj Tekstoj I, II*) ricevos lukse binditan ekzempleron de la verko «Amfitriono» de la senmorta Molière, majstre tradukita de Sinjoro E. Legrand.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraĵ premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo.

III. — La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en plene *Fundamenta Esperanto* kaj ne ankoraŭ eldonitaj nek anoncigitaj.

IV. — La Festo de la X^a Internaciaj Floraj Ludoj okazos en Vich, dum la XI^a Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio», en Junio 1924.

V. — Sur la manuskriptoj — kiuj devas esti ricevitaj antaŭ la 15^a de Aprilo 1924 de la Sekretario de la Floraj Ludoj (S-ro Jaume Grau Casas, Claris, 72, Barcelona) — oni devas skribi devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI. — Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj. Oni konservu kopion de la manuskriptoj.

VII. — La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu el la konkursoj.

VIII. — La komitato publikigos la verdikton per «Kataluna Esperantisto» kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi.

IX. — La premiitaj verkoj fariĝos propraĵo dum unu jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «Kataluna Esperantisto» aŭ «Literatura Mondo». Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.

X. — Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion, ĉar ne estas iuj efektivaj premioj krom tiuj difinitaj en la nuna Alvoko.

Bibliografio

L'ESPERANTO COMME LANGUE AUXILIAIRE INTERNATIONALE — ESPERANTO AS AN INTERNATIONAL AUXILIARY LANGUAGE. Ligo de Nacioj. Raporto de la Ĝenerala Sekretario al la tria Kunveno, Septembro 1922.

Interesa dokumento, tre valora kiel propagandilo, kiun oni devus aĉeti kaj sendi al ĉiuj Bibliotekoj, Asocioj, Gazetoj, k. t. p. Ĝi enhavas amason da informoj donitaj de la Naciaj Societoj pri la lastaj progresoj de Esperanto en ĉiuj kampoj. Aĉetebla ĉe «Universala Esperanto-Asocio».

CONFÉRENCE INTERNATIONALE SUR L'ENSEIGNEMENT DE L'ESPERANTO DANS LES ECOLES, GENÈVE, APRIL 1922. Institut J.-J. Rousseau (Ecole des sciences de l'éducation).

Raporto en franca lingvo pri la Konferenco sukcese okazinta dum la lasta jaro. Bonega propagandilo. Prezo: 50 svisaj centimoj. Aĉetebla ĉe U. E. A.

INTERNACIA KONFERENCO PRI LA INSTRUO DE ESPERANTO EN LERNEJOJ. Resuma raporto en Esperanto, simila al la antaŭa. Prezo: 50 svisaj centimoj.

ATTI DELLA CONFERENZA INTERNAZIONALE PER LA LINGUA COMUNE DEL COMMERCIO E DEL TURISMO, VENEZIA, APRIL 1923. Itala Komerca Ĉambro por Svisujo.

Broŝuro en itala lingvo pri la laste okazinta Konferenco pri Esperanto en Komerco. Aĉetebla ĉe A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo). Prezo: 2 liroj.

COMMERCIAL CONFERENCE AT VENICE, APRIL 1923. REPORT OF THE DELEGATE OF THE LONDON CHAMBER OF COMMERCE.

Propaganda broŝuro pri la Komerca Konferenco, aĉetebla ĉe la «Brita Esp. Asocio», 17, Hart Street, London W. C. 1.

L'ESPERANTO ET LA LUTTE DES LANGUES, de Leon Agourtine. Eldono de la «Société des Amis de l'Esperanto».

Tre interesa propagandilo havebla ĉe la Centra Oficejo Esperantista, 51, rue de Clichy, Paris. Prezo: Fr. 0'50.



Senfadena parolado pri kaj en Esperanto

Por la unua fojo en la historio de la esperanta movado, estas farita parolado en Esperanto adresita al samideanoj en ĉiuj partoj de Eŭropo. Tiu kiu havas tiun honoron, estas S-ro John Merchant, Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio. S-ro Merchant parolis ĉe la Londona Brodkasta Stacio, je Sabato, 20^a Oktobro; lia temo estis: «Esperanto: the Only Cure for a Tongue-Tied World» (Esperanto: la Sola Kuracilo por Lango-ligita Mondo).

Kiel la titolo montras, lia parolado estis sufiĉe humora, kaj ŝerca, pro tio, ke la parolado okazis je Sabato vespere, kiam oni kutime ludas dancmuzikon. Kvankam la pli granda parto de lia parolado estis en la Angla lingvo, S-ro Merchant, tamen, parolis iomete en la kara lingvo, kaj ni havas plezuron presi ĉi kune liajn esperantajn parolojn, jene:

«Miaj karaj samideanoj,

En la nomo de la tuta Brita Esperantistaro, mi salutas vin tutkore hodiaŭ, kaj esperas, ke miaj vortoj, dissendataj je la nuna momento por la unua fojo el Anglujo per la senfadena telefono, atingos viajn orelojn klare, kaj plenigos viajn korojn per ĝojo.

Mi esperas, ke la rezultato de la eksperimento estos tiel granda, ke la sendado de novaĵoj en nia kara lingvo, fariĝos ĉiutaga afero.

Por helpi tion, bonvolu sendi al la oficejo de la Brita Esperantista Asocio, poŝtkarton por ke ni povu prezenti al la Senfadena Telefona Kompanio, bonan ateston ke Esperanto estas vivanta kaj potenca lingvo, kaj tute taŭgas por la disvastigo de gravaj novaĵoj tra la tuta mondo.

Mi salutas la gesamideanojn en ĉiuj regionoj de la mondo, kaj al la Britaj geamikoj, kiuj faris specialajn aranĝojn, mi sendas miajn tutkorajn bondezirojn, kaj esperas, ke mi sukcesis kontentigi ilin per mia unua parolado per la senfadenaj ondoj.

Mi salutas la gesamideanojn, kiuj kunvenas hodiaŭ en Bern, kaj esperas, ke la aranĝoj de ili faritaj por min aŭdi, bone sukcesos.

Nia movado senĉese pligrandigas rilate fortecon, influcon kaj entuziasmon, kaj se ni nur daŭrigos niajn klopodojn vigle, pacience kaj kurage, post nelonga tempo, mi estas certa, ke ni atingos nian celon en Gloro.

La tempo je mia dispono jam forflugis. Tial, mi devas saluti vin per la vortoj. Bonan nokton, karaj geamikoj. Ĉis la revido».

Tuj post la parolado, S-ro H. A. Epton, la aranĝinto, ricevis poŝtkartojn kaj leterojn ne nur el ĉiuj partoj de Britujo, sed ankaŭ el aliaj landoj, ekz. Francujo, Holando, Svisujo, Danmarko, k. t. p. Ĉiu diris, ke ili aŭdis la paroladon tre klare, kaj ke la esperantaj vortoj estis tute kompreneblaj.

Ni esperas, ke ĉiuj personoj, kiuj aŭdis la paroladon, speciale tiuj kiuj loĝas ekster Britujo, *TUJ* skribu rekte al la British Broadcasting Company, 2 Savoy Hill, Strand, London, W. C. 2., kaj petu ke ili aranĝu pluajn esperantajn paroladojn. Se multaj personoj tiel skribos, tio plej certe influos la Kompanion. Oni skribu nacilingve kaj Esperante.

Enlanda Kroniko

BARCELONA. — En la «Escola del Treball», teknika lernejo por laboristoj oficiale subtenata de la «Mankomuneco de Katalunujo», la 5^{an} de septembro, S-ro Jaume Grau faris paroladon: «Esperanto, internacia helpa lingvo», antaŭ pli ol 100 ĉeestantoj. La parolado estis aŭskultata kun granda intereso kaj eble oni malfermos en tiu lernejo kurson de Esperanto.

— La 15^{an} de septembro, en la sidejo de «Kataluna Esperantista Federacio», S-ro Marian Solà paroladis raportante pri la sukceso de la lasta Universala Kongreso de Esperanto en Nurnberg. Ĉeestis multaj samideanoj, inter ili reprezentantoj de ĉiuj Barcelonaj Grupoj, kaj granda publiko.

— Funkcias en Barcelona kelkaj Esperantaj kursoj, kiuj estas gvidataj de la jenaj sindonaj samideanoj: «Barcelona Esperanta Societo», S-ro Pastro Planell; «Paco kaj Amo», S-ro Roig; «Nova Sento», S-ro Artur Domènech; «Barcelona Stelo», S-ro Antoni Durà; «Enciklopedia Popola Ateneo», S-ro Borrell. Ankaŭ estas instruata Esperanto ĉe la «Liceo» de S-ro Dalmau kaj ĉe la «Salesianaj Lernejoj».

— Sur la ĵurnalo «La Publicitat» aperis artikolo enhavanta la katalunan tradukon de du notoj el la «Parolejo» de «Esperanto Triumfonta», verkita de S-ro Degenkamp (Nederlando) kaj S-ro Kratochvila (Slovakujo), responde al sensencaj vortoj de iu svisa sinjoro pri la katalunoj kaj ilia lingvo. Oni atentigis, je la fino de la artikolo, pri tio ke la esperantistoj multe helpas al la konigo de la kataluna popolo, pere de esperantaj tradukoj el la kataluna literaturo.

— La societo «Paco kaj Amo» malfermis esperantajn kursojn por komencantoj, progresintoj kaj pri lingvistiko. En la inaŭguro profesoro Delfi Dalmau tre trafe paroladis pri la esperanta gramatiko kompare al aliaj lingvoj, kaj pri la interna ideo de Esperanto. En la granda nombro da ĉeestantoj oni rimarkis ĉe la neesperantistoj grandan aprobon al tiu parolado.

Parfoprenis en niaj vendredaj rondoj gesinjoroj Zapater kiuj per parolado rimarkigis al ni la utilon de Esperanto. Sekve, post la parolado de niaj karaj vizitintoj, nia samideano kaj kunsocietano S. Alberich tradukis la sencon de la dirita parolado, tial ke inter la ĉeestantoj estis kelkaj kiuj nuntempe lernas Esperanton. Fine oni disvendis portretojn de nia majstro kies profito estas dediĉita al Esperanta Ligilo. Entute, estis semajno plena je vigleco kiu certe taŭgos por akiri novajn adeptojn al nia esperanta afero. — D.

La nuna numero estas submetita al la milita cenzuro.

Ni esprimas nian dankon al la bona samideano S-ro Luis Santamarina, polica oficisto, kiu afable helpis nin en tiu ĉi afero.

Nia Dekunua Kongreso en Vich

Malgraŭ ĉiuspecaj malhelpoj, ni povas jam certigi ke la XI^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio okazos kun la kutima soleneco en la urbo Vich, dum Junio 1924.

Per la nombro kaj valoro de la premioj atingitaj el la Vik'aj publikaj korporacioj kaj societoj, por la Floraj Ludoj, oni povas konstati kiom favora estas al Esperanto la tradiciema urbo Vich.

La tieaj samideanoj, gvidataj de nia entuziasma amiko S-ro Jacinto Comella, certe klopodos ke la kongreso okazonta en ilia urbo estu tiel hela kiel la antaŭaj.

Niaj legantoj scias per kiom da surprizoj regalis la kongresanojn niaj Manresaj amikoj en la lasta Kongreso. En Vich oni intencas superi ĉion viditan, rilate al bona organizo, festoj kaj soleneco. Ĉar la venontaj Floraj Ludoj estos la X^aj, oni ankaŭ intencas festi tiun Jubileon per specialaj aranĝoj.

Propagandu inter viaj amikoj, malnovaj esperantistoj, por ke la proksima kongreso kataluna estu la plej ĉeestata!

Eksterlandaj samideanoj venu admiri la belecon de nia Festo de la Floraj Ludoj!

Ili ĉiuj restos plene kontentaj pri ĉio, kion jam nun preparas niaj agemaj kaj fervoraj amikoj el Vich.



Por "Kataluna Esperantisto"


Ni ricevis la jenajn mondonacojn por forigi la ekzistantan deficiton: S-ro J. Bofill (Palma de Mallorca), 50 ptoj.; S-ro Valentí Alavedra (Terrassa), 50 ptoj.; F-ino Palmira Castellví (Barcelona), 10 ptoj.; S-ro Pastro Josep Casanovas (Girona), 5 ptoj.; S-ro Josep Ventura (Terrassa), 5 ptoj.; S-ro R. G. (Barcelona), 75 ptoj.; S-ro Joan Ratés (Rubi), 14 ptoj.

Nian koran dankon al la malavaraj donacintoj!

VERKOJ DE PUJULÀ


AĈETEBLAJ ĈE K. E. F.

Vocabulari
Català-Esperanto



PREZO: 3 PTOJ.


Vortaro
Esperanto-Kataluna



PREZO: 3 PTOJ.

La Grafo
erarinta


Ĉarma originala rakonto. Volumeto tre lukse presita, kun desegnaĵoj de Torné Esquius.



PREZO: 0'50 PTOJ.

Naivulo -
Karabandolo la
plugisto -
Fiŝkaptisto
kaj Rigardanto

Originalaj rakontoj, kun desegnaĵoj de Torné Esquius, Lukse presita volumeto.



PREZO: 0'50 PTOJ.

AL LA GRUPOJ NI FARAS 25 % DA RABATO

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉ (tx), d, e (t), g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), ĵ (j), ĵ (j), k, l, n, o, p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre a la penúltima síl·laba.

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona ð)

forma el plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufixe per a formar
el femení

sinjorino, reĝino
katino, leonino

O

terminació
substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

terminació
adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb
(infinitiu)

kompreni
labori
komerçi
(comerciar)

E

terminació
adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

mode condicional

U

mode imperatiu o subjunctiu

Mi skribas
Jo esric

skribis
escrigui

skribos
escriurè

skribus
escriuria

skribu
escrigu!

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti* i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita.

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En Esperanto, tota paraula que reb l'acció d'un verb (complement directe) va seguida de la lletra **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo esric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius s'expressa per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.

KATALUNA ESPERANTISTO

(L'ESPERANTISTA CATALÀ)

MONATA GAZETO, ORGANO DE LA



DUA EPOKO - JARO III^a : OKTOBRO-DECEMBRO 1923

Literatura Mondo

Monata gazeto, ilustrita, grand-
formata, almenaŭ 20-paĝa.

Interesa enhavo kaj
bonega stilo. Origina-
lalaj esperantaj
verkoj kaj tradukoj
el ĉiuj lingvoj.

JARABONO : 12 PESETOJ

K. E. F. akceptas abonojn

Andrássy-ut, 81.

BUDAPEST

Esperanto Triumfonta

Ĉiusemajna gazeto,
kun bonega infor-
mado pri nia mo-
vado en la tuta
mondo

PREZO: 0'30 PTOJ. NUMERO

HORREM BEI KOLN
(Germanujo)

CURS PRÀCTIC DE LA LLENGUA ESPERANTO

PER FREDERIC PUJULÀ I VALLÉS,

amb les regles gramaticals,
exercicis en Esperanto i en
Català, i vocabulari
Català - Esperanto.

SEGONA EDICIÓ

PREU: 0'75 PTES.

Gramática Esperanto

— PEL —

DR. J. BREMÓN MASGRAU

3.^a EDICIÓ

PREU DE LA OBRA EN TELA:

4 PESSETES



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redaktoro : Jaume Grau Casas

XI^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Vich: 8 - 9 - 10 Junio 1924



EN la dato definitive fiksita por nia proksima kongreso. Espe-
reble ĝi estos partoprenata ne nur de multaj katalunaj sami-
deanoj, sed de kelkaj eksterlandaj esperantistoj, precipe
francaj, kiuj promesis honorigi nin per sia vizito.

Kun la kutima soleneco okazos la hela festo de la "Floraj
Ludoj," Festeno, Teatra Prezento, Esperanta Ekspozicio, Koncerto, Es-
peranta Diservo, k. c. Oni ankaŭ aranĝos postkongresan ekskurson al Ripoll.

La membroj de K. E. F. estos oportune sciigataj pri tiaj aranĝoj.

Nun estas en presado esperanta gvidlibro pri Vich, dank' al la klopodoj
de la kongresorganizantoj.

Pri ĉio rilatanta la Kongreson, oni sin turnu al la Prezidanto de la O. K.
S-ro Jacinto Comella, Plaça Major, 18, Vich.

Severa unueco, nepra kondiĉo de internacia lingvo

Helplingvo estas afero de interkonsento.

Ĉiu entrepreno, kiu promesas al pluraj homoj certajn avantaĝojn kaj postulas de ili samajn devojn, estas bazita sur komuna interkonsento.

Demokrate organizita ŝtato povas doni al si konstitucion nur per la volo de la popolo. Ne ĉiuj loĝantoj nepre konsentas pri ĉi tiu statuto, sed la malplimulto, la nekontentigita parto de la ŝtatanoj, devas submetiĝi al la volo de la plimulto. «Vox populi, vox Dei». Se tion ĝi ne faras, ni havos revolucion, civilan militon, la haoson. En ne sufiĉe civilizita ŝtato, aŭ en ŝtato kies loĝantaro estas indifera je la ŝtatformo, iu pli bone organizita tribo aŭ klaso ofte sukcesas altrudi al la tuto sian superecon aŭ sian arogantecon. Sed estas historia vero, ke en tiel regata ŝtato la plimulto ne povas esti daŭre kontenta aŭ eĉ feliĉa. Kiu sin sentas subpremita, tiu nature serĉadas rimedon por forigi aŭ senpotencigi la subpremanton. Li kolektadas ĉirkaŭ si la tutan aron da nekontentuloj, kaj kiam tiuj estas sufiĉe forigitaj, ili renversas la ŝtatordon. Tio estas leĝo de la naturo.

* * *

Kiam du viroj fondas komercan entreprenon, ili unue starigas statuton, kiu klare priskribas la rajtojn kaj devojn de ĉiu partoprenanto. Unueco estas la necesa fundamento de ilia sukceso. Kaj kiam unu el ili agas kontraŭ la interkonsentita statuto, li kutime ne nur malutilas al la komuna bono, sed li eĉ difektas sian propran intereson.

* * *

Ĉiufoje kiam pluraj individuoj celadas komunan celon, ili nepre devas agi laŭ certa plano kaj aplikadi samajn rimedojn. Se el du vojaĝantoj, kiuj samtempe intencas ĉirkaŭvojaĝi plej eble rapide la teron, la unua ekmarŝas orienten, la dua okcidenten, ili tamen uzas la samajn rimedojn: fervojo, ŝipo, aviadilo, aŭtomobilo, ktp. Kaj nur supoze ke ili ambaŭ sammaniere uzadas tiujn rimedojn, ili samtempe atingos sian celon. Severa kaj absoluta unueco en la aplikado de iliaj rimedoj estas nepre necesa.

* * *

Ĉu povas esti alie ĉe internacia lingvo?

Esperanto ankaŭ havas sian statuton, sian konstitucion, la Fundamento de D-ro Zamenhof! Internacia lingvo ne koncernas nur du aŭ tri homojn,

ĝi apartenas al granda kaj konstante multiĝanta popolo. Ĝi celadas la unuigon ne nur de certaj triboj, klasoj, ŝtatoj, sed de la tuta homaro. En la Fundamento de Esperanto ni legas:

«Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en »nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon».

Kaj en la «Deklaracio pri Esperantismo» de la Boulogne'a kongreso ni trovas identan ideon:

«La sola unufojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento »de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en »kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon».

Tio estas klara, preciza kaj neniel fuŝkomprenebla. La Fundamento estas akceptita de la granda plimulto de ĉiuj personoj nuntempe uzantaj Esperanton. Do, la malmultaj nekontentuloj ne havas la rajton ŝanĝi en tiu fundamento eĉ la plej sensignifan parton. Ili povas neuzi la lingvon, ili povas forlasi la movadon, ili eĉ povas laŭ sia plezuro akre batali kontraŭ la ideo de helplingvo, sed ili neniel rajtas ŝanĝi la fundamenton kaj altrudi al la Esperantistaro sian personan guston.—«De gustibus et coloribus non disputandum».

Konata proverbo instruas: «Neniu ŝafaro sen skabia ŝafo». Estas ja memkompreneble ke inter centmiloj da Esperantistoj troviĝas kelkaj ŝanĝemuloj kaj reformemuloj.

Mi memoras pri stranga viro, kiu ĉeestis unu el miaj kursoj. Kritiko estas lia animo kaj sen kritiko li absolute nenion akceptas. Kiam mi en la unua leciono klarigis ke la adjektivo finiĝas per *a*, la substantivo per *o*, li tuj kritikis ĉi tiun neakordiĝon en la finaĵo. Instruante pri la multnombro, mi ekpruvis ke la finaĵoj *oj*, *aj* estas la plej taŭga solvo de la problemo. Sed li trovis ilin ridindaĵ! La akuzativo estis por li malnecesita balasto kaj la supersignitaj literoj eĉ naŭzis lian delikatan okulon. Per liaj konstantaj kritikoj li multe malhelpis la instruadon kaj «naŭzis» sian kunlernantaron, ĝis fine mi redonis al li la pagitan kursmonon kaj, je la ridado de la tuta ĉeestantaro, ĝentile adiaŭis lin. — Tiu kritikema ĉarlatano poste transiris al la Idistoj, kie li daŭrigis sian metion ĝis ankaŭ la «Idani» forpermesis lin! Kelkajn monatojn pli malfrue li aliĝis al nia Esperanto Societo, kies fervora kaj tute fidela membro li nun estas. Intertempe li estis atente kaj serioze studinta la tutan helplingvan problemon kaj hodiaŭ li asertas kun plena konvinko, ke Esperanto estas la sola taŭga kaj praktika solvo de la demando.

Bedaŭrinde ne ĉiu kritikema helplingvano alvenas al sama konkludo. Iuj el ili opinias sin multe pli saĝaj kaj sagacaj ol ĉiuj ceteraj Esperantistoj kune. Aliaj estas honoremaj aŭ tro memfidaj kaj vidas en Esperanto la rimedon por kolekti laŭrojn. Plua grupo agas kontraŭ Esperanto kvazaŭ ĝi estus provkuniko. Ili detranĉas ĝian voston, plimallongigas la orelojn, kolorigas la okulojn, tondas la harojn kaj ĝin kripligas ĉiumaniere. Malfeliĉa kreaĵo! Via kreinto estis monstro, kiu ne sciis krei vivkapablan beston!

Iam unu artema ĝardenisto posedis tre belan ĝardenon, kiun li prizorgadis kun vera sindono kaj amo. Multe da diverskoloraj kaj bonodoraj floroj ornamis ĝin. Belaj arboj donis bongustajn fruktojn kaj herboj kaj legomoj ĉiuspecaj maturiĝis la tutan someron. Estis vera paradizeto kaj la pasantoj ĝojis vidante ĝin kaj laŭdis la bonan ĝardeniston. Sed iun tagon venis kritikemulo, vidis la ĝardenon kaj diris al la ĝardenisto: Via verko estas sufiĉe bela, sed ĝi havas diversajn mankojn, kiuj facile estas forigeblaj. La rozarboj devus stari en rekta vico laŭlonge de la vojeto; tiuj blankaj lilioj ne bone efikas apud la bluaj betunioj, oni devus ilin lokigi apud la verdaj legomoj, tiu pomarbo estas tro granda, ĝi kovras la sunon al viaj lekantoj, ĝin vi devus tute forigi aŭ planti en alia angulo, ne decas ke brasiko kreskas ĉi tie apud la bela florbedo, ĝin oni devus lokigi apud la napoj aŭ malantaŭ la pizoj...

La ĝardenisto atente aŭdis la proponojn de la kritikemulo, poste li respondis al li: Vi estas tute prava, sinjoro; se mia ĝardeno ne plaĉas al vi, ŝajnas ke vi havas alian guston ol ĉiuj ceteraj pasantoj kaj ol mi mem. Mi do ĝentile konsilas al vi, iru hejmen kaj aranĝu vian ĝardenon tute laŭ via gusto, kaj mi ne dubas, ke ĝi kontentigos vin. Sed lasu miajn rozojn en la bosketo, miajn liliojn apud betunioj kaj la brasikon proksime de la floroj.

Kaj la kritikemulo foriris balancante sian kapon kaj murmurante ion inter siaj dentoj. Kaj la bela ĝardeno restis tia, kian la artema ĝardenisto ĝin kreis kaj ĝi la tutan someron ĝojigis ĉiun normale sentantan homon.

La kreinto de Esperanto estis ankaŭ tiel artema kaj delikata ĝardenisto, kiu kun inteligento kaj amo kreis sian ĝardenon. Jen li plantis odorantan floron, jen li lokigis fortan fruktarbon kaj apude li dissemis bongustajn legomojn. Kaj ĉio kune estas verko de artisto, kiun oni ne povas aliformigi se oni ne volas difekti aŭ ruini ĝin. Certe iu kritikemulo povas riproĉi al la ĝardenisto pri tiu aŭ alia bagatelo, sed li ne kapablas krei pli belan kaj pli taŭgan ĝardenon. Li do lasu la kritikon kaj ĝoju kun ĉiuj aliaj pri la bela majstra verko de la genia aŭtoro.

Antaŭ dek-kvin jaroj kelkaj kritikulaĉoj kunvenis en Parizo kaj kun scienca ŝajno deklaris, ke Esperanto devas esti plibonigata. Ili ekprenis lupon kaj sekciilon kaj komencis serĉadi la mankojn de la «kuniklo». Unue ili detranĉis al ĝi la voston «oj, aj» kaj almetis ridindan glandon «i». Poste ili elŝiris la okulojn (akuzativon), ĉar kuniklo povas marŝi kaj viveti sen okuloj! Tiam ili kuntiris la kolon per peza rimeno (akcento) kaj fine ili detranĉis parton de la piedoj (vortformado) kaj rigidigis la restantajjn ŝtumpojn. Kaj nun la mizera besto lamas kaj pro la rimeno ĉirkaŭ la kolo preskaŭ ne plu povas spiri. Ne sufiĉis ankoraŭ. La «sciencaj lingvistoj» nutras la malfeliĉan beston per viando kaj alkoholo, ĉar tiaj nutraĵoj donas pli da forto ol herbo kaj akvo! De tiu tempo la kuniklo konstante plimalŝanĝiĝas, apenaŭ ĝi kapablas viveti kaj baldaŭ mortos.

Jen la historio kaj la estonto de Ido!

Alia «Anti-ulo», ankaŭ sciencisto, rimarkis la erarojn, kiujn faris la «hi-

rurgiistoj» de Parizo, sed li ne konsciis, ke la unua kaj ĉefa eraro estas ek-tuŝi la kuniklon. Li do aplikis nur alian metodon, dirante al si: ni interŝanĝu la organojn de la besteto kaj poste la tuta organismo pli bone funkcias! La signo de akuzativo fariĝu signo de multnombro, la ordona finiĝo estu finiĝo de akuzativo, kaj la honoro kaj la vivo de Esperanto estos savitaj! Ŝajno, nura, nuda ŝajno!

Ido kaj Antido ambaŭ estas kreitaj nur por la ŝajno, la eksterajo, la trompiĝo. La animo kaj la vivo de Esperanto plene mankas al ili. Mankas ankaŭ tiu intima, neesprimebla *io*, kiu vivigas la lingvon de Zamenhof kaj ĝin igas kara kaj aminda al ĉiu vera Esperantisto.

Pro tio ni amas nian lingvon, ni ĵaluze gardadas ĝian netuŝeblecon, ĝiajn ĉarmojn!

Esperantistoj, via Majstro postlasis al vi valoregan trezoron, brilegantan juvelon. Ne fordonu, ne difektu, ne malhonorigu ĝin! Estu fieraj je tiu nekomparebla heredaĵo kaj ĝoju pri ĝia posedo.

Lasu al aliaj la plezuron dissekii kaj ruinigi ĝin. La saĝa kaj bonsenca homaro pruvos al ili, ke scienco ne ĉiam estas identa je prudento.

Unueco, severa unueco estu nia devizo. Ni estu kaj restu fidelaj dis-ciploj de la granda, neforgesebla Majstro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

J. SCHMID

Premio de «Kataluna Esperantisto» en la IXaj Internaciaj Floraj Ludoj.



Por «Kataluna Esperantisto»

Krom la sumoj cititaj en nia lasta numero, ni ricevis 50 ptojn. de la Grupo «Lumon» (Terrassa) kaj 50 ptojn. de la Grupo «Ĝerona Espero» (Girona), por forigi la ekzistantan deficiton.

Koran dankon!

Alvoko al la X^a Internaciaj Floraj Ludoj



LA Floraj Ludoj okazis tre solene en reĝaj palacoj jam dum la XIII^a kaj XIV^a jarcentoj, partoprenataj de la trobadoroj, mildaj poetoj, kies kantoj estis la animo de la Meza Epoko. Ĉefe en la landoj Provenca kaj Kataluna enradikiĝis tiu ravanta festo, en kiu oni disdonis orajn kaj argentajn florojn al la aŭtoroj de la plej bonaj poezioj. La urboj Toulouse kaj Barcelona eĉ starigis Akademion pri la Gaja Scio, al kiu sin dediĉis la famaj Bernat de Ventadorn, Gauselm Faydit, Giralt Riquier, Bertran de Born, Jofre Rudel kaj multaj aliaj, kiuj kantis per sonora lingvo la amon, la ĝentilecon, la virinan belecon kaj kavalirajn agojn, en lirikaĵoj plej diversformaj.

Sed iom post iom silentiĝis la harmonia voĉo de la trobadoroj kaj la poezia festo malaperis. Ankaŭ, pro diversaj kaŭzoj, samtempe defalis la kataluna lingvo kaj la tuta nacia spirito.

Tamen, se la Floraj Ludoj disfalis dum la epoko de la kataluna sunsubiro, dum la kataluna renaskiĝo en la pasinta jarcento ili vekigis al denova vivo. En la jaro 1859 la Katalunaj Floraj Ludoj estis solene restarigataj; kaj al ilia senĉesa ĉiujara okazo ni katalunoj ŝuldas la plenan revivigon de nia nacia lingvo kaj grandparte ankaŭ la brilecon de la moderna kataluna literaturo.

Spertinte tiajn valorajn servojn, la organizintoj de la V^a Universala Kongreso en Barcelona (1909) opiniis ke la enkonduko de la Floraj Ludoj en nian movadon povus simile favori la disvolviĝon de la esperanta literaturo, kaj ili aranĝis la unuajn Esperantistajn Florajn Ludojn, kiuj sukcese okazis dum la V^a Kongreso. Malgraŭ tio, oni ne daŭrigis la feston en la ceteraj Universalaĵ Kongresoj, eble ĉar ĝia spirito restis internacie nekomprenata.

«Oni ne komprenis — diris nia kara amiko S-ro Pujulà en sia parolado dum la II^a Floraj Ludoj — ke en tiu festo la boneco de la verkoj estas konsiderinda, sed ne la ĉefa afero; ke la pli-malpli granda riĉeco de la premioj estas tute flanka detalo, kiu ne povas aŭ ne devas naski emocion; oni ne komprenis ke la objekto de ĝia celo estas la komunio de Popolo kaj Poeto ĉirkaŭ la altaro de Beleco kaj Poezio».

Efektive, tia estas la festo kataluna. Oraj kaj argentaj floroj estas la ordinaraj premioj; de tio devenas la antikva nomo de FLORAJ LUDOJ. Tamen la plej grava el la premioj estas natura floro, kiu rajtigas la gajninton elekti Reĝinon de la Festo. Ni konservis tiun ĉi premion en la esperantaj Ludoj, ĉar oni ne povas donaci premion pli valoran por la spirito ol floro oferota al fraŭlino kaj ŝin iganta simbolo de la Beleco en festo de Poezio.

Imagu nun la feston. La plej bela salono de la urbo ornamita per flagoj

kaj girlandoj. La enurbaj aŭtoritatuloj kaj la juĝintaro eniras en ĝin por prezidi la feston, kiun malfermas la urbestro. La nomo de la laŭreato per la natura floro estas laŭte sciigata kaj la gajninto, akompanata de ĉiuj eminentuloj, eliras por alkonduki la Reĝinon elektitan. Ŝi eniras de la brako de la poeto, sekvata de Kortego de Amo konsistanta el kelkaj fraŭlinoj same kondukataj de la aŭtoritataj moŝtoj, dum ludas marŝon muzikistaro kaj aplaŭde salutas la publiko. La Reĝino okupas sian tronon kaj la poeto legas la premiitan verkon. Siavice estas alvokataj ĉiuj gajnintoj, kiuj ricevas la premiojn de la manoj de la Reĝino, kaj la festo finiĝas per altsenca parolado de la Prezidanto. Kun la sama soleneco kiel por la eniro, la Reĝino kaj Kortego forlasas la salonon.

Jen rapide priskribitaj la festo kaj ĝia celo. La «Kataluna Esperantista Federacio», kredante ke estus domaĝe se tiu festo malaperus el la esperanta movado, kuraĝe prenis sur sin la taskon organizi la Internaciajn Florajn Ludojn kaj klopodas regule okazigi ilin, samtempe kun siaj ĉiujaraj Kongresoj.

Niaj klopodoj nunjare ankaŭ plene sukcesis, kaj ĝojante ni faras denovan Alvokon.

Al la esperantistaj verkistoj:

La Komitato de la X^a Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni en la jenaj konkursoj.

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. — Originala *Ama* verko en prozo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

1. — Traduko de unu el la katalunaj versaĵoj "Visions de Catedrals" de Jaume Collell.
- II. Traduko de la kataluna prozaĵo «El gorc blanc», de Martí Genís i Aguilar.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de la Ekscelenca Urbeŝtraro de Vich: 300 pesetoj. Temo: Originala verko.
- II. — Premio de Lia Moŝto D-ro Francisco Muñoz, Episkopo de Vich: 100 pesetoj. Temo: «La Katolikismo kaj la Paco».

- III. — Premio de Lia Moŝto S-ro Albert Rusiñol, Parlamenta deputito de Vich: Artobjekto. Temo: Laŭvola.
- IV. — Premio de la «Terkulturista Ĉambro Ausetana»: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- V. — Premio de la «Terkulturista Sindikato» de Vich: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VI. — Premio de la «Vika Industria Societo»: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VII. — Premio de la «Katolika Junularo»: 50 pesetoj. Temo: Traduko de versaĵo aŭ prozaĵo de la fama poeto kataluna Verdaguer.
- VIII. — Premio de la Grupo «Vika Esperantistaro»: 100 pesetoj. Temo: Originala teatraĵo aŭ novelo.
- IX. — Premio de la «Kanariistoj de Vich»: Bela ekzemplero de la famaj Vikaj kanarioj en latuna kaĝo. Temo: «La amo al la birdoj».
- X. — Premio de la komerca firmo «Vda. de J. Sendra»: Tipa kolbaso de la speciala ellaborado kiu famigis la urbon Vich. Temo: «Bonhumora versaĵo». (La donacanta firmo oferis sendi en konvena pakaĵo tiun «premion» al iu ajn lando).
- XI. — Premio de «Vika Kazino»: 50 ptoj. Temo: Laŭvola.
- XII. — Premio de «Kataluna Esperantisto»: Dumviva abono al la gazeto. Temo: «Pri la esperanta versfarado».
- XIII. — Premio de «Ateneu Enciclopèdic Popular»: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.
- XIV. — Premio de la Grupo «Barcelona Stelo»: Tri lukse binditaj volumoj enhavantaj la faman tradukadon de Kabe «La Faraono». Temo: Rakonto pri «Kio plej impresis min dum mia vivo».
- XV. — Premio de «Círcol Recreatiu Vigatà»: 50 ptoj. Temo: Laŭvola.
- XVI. — Premio de la «Mankomuneco de Katalunujo»: Plena verkaro de la fama poeto kataluna Verdaguer. Temo: Studo pri la Kataluna Lingvo.
- XVII. — Premio de «Literatura Mondo»: Bindita jarkolekto de L. M. kaj senpaga livero de la gazeto dum unu jaro. Temo: Laŭvola.
- XVIII. — Premio de «Literatura Mondo»: «Johano la Brava» kaj «Preter la vivo» (Eldono luksa). Temo: Laŭvola.
- XIX. — Premio de «Literatura Mondo»: la du ĵus cititaj verkoj (Eldono duonluksa). Temo: Laŭvola.
- XX. — Premio de «Literatura Mondo»: la du samaj verkoj (Eldono simpla). Temo: Laŭvola.

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

Th. CART, *prezidanto*. — Julio BAGHY. — Jacinto BREMÓN. — Jacinto COMELLA. — Estanislau PELLICER. — Jaime GRAU CASAS, *sekretario*.

NOTOJ

I. — La aŭtoroj de la kvar premiitaj Ordinaraĵoj Temoj (*Originalaj Tekstoj I, II; Tradukitaj Tekstoj I, II*) ricevos lukse binditan ekzempleron de la verko «Amfitriono» de la senmorta Molière, majstre tradukita de Sinjoro E. Legrand.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraĵoj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo.

III. — La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en plene *Fundamenta Esperanto* kaj ne ankoraŭ eldonitaj nek anoncigitaj.

IV. — La Festo de la X^a Internaciaj Floraj Ludoj okazos en Vich, dum la XI^a Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio», en Junio 1924.

V. — Sur la manuskriptoj — kiuj devas esti ricevitaj antaŭ la 15^a de Aprilo 1924 de la Sekretario de la Floraj Ludoj (S-ro Jaume Grau Casas, Claris, 72, Barcelona) — oni devas skribi devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.


VI. — Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj. Oni konservu kopion de la manuskriptoj.

VII. — La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu el la konkursoj.

VIII. — La komitato publikigos la verdikton per «Kataluna Esperantisto» kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi.

IX. — La premiitaj verkoj fariĝos propraĵo dum unu jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «Kataluna Esperantisto» aŭ «Literatura Mondo». Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.

X. — Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion, ĉar ne estas iuj efektivaĵoj krom tiuj difinitaj en la nuna Alvoko.

LA 15^{AN} DE MARTO

aperos la unua numero de

«L'ESPERANTISTA CATALÀ»

monata gazeto por propagando de Esperanto, redaktata en kataluna lingvo. Ĝi anstataŭos la nunan Federacián presorganon «Kataluna Esperantisto».



Fragmentoj de paroladoj pri "Floraj Ludoj"

CARLO BOURLET, *Prezidanta parolado, III^o Floraj Ludoj*

En neniu lando oni pli kore, pli sincere akceptis la internacian lingvon, ol en la progresema Katalunlando. Neniu popolo pli bone komprenis la altan signifon de nia homama entrepreno, ol la nobla kataluna popolo. Esperanto trovis inter vi veran hejmon; ĝi trovis ĉiujn apogojn, ĉiujn helpojn necesajn por sia disvolviĝo, por sia pliriĉiĝo, por sia egaligo al la plej malnovaj kaj famaj lingvoj de plej kulturitaj popoloj. Jam du fojojn mi havis la grandan plezuron viziti Katalunlandon, kaj du fojojn mi pasigis inter vi plej feliĉajn horojn de mia tuta vivo. La ĉiekonata gastameco de la Katalunoj, la nesuperebla progresema de ilia spirito estas por la atilanda vojaĝanto nekomparebla ĉarmo kaj allogo. Vi do komprenos, ke mia bedaŭro ne estas simpla esprimo de ĝentileco, ke ĝi estas sincera, profunda, kaj ke, en la horoj, kiam okazos viaj festoj kaj al vi unu el miaj kolegoj legos ĉi tiun tekston, mi, de malproksime, pensos al via bela lando, pensos al via admirinda propagando kaj mi kore krios: «Vivu la lando de la Katalunoj! Vivu Esperanto inter la Katalunoj!»

Neniu kutimo, inter ĉiuj centjaraj kutimoj de ĉiuj civilizitaj popoloj, estas pli bela, pli eleganta, ol la kataluna kutimo de la Floraj Ludoj. Ŝajnas, ke nur en lando de Latinoj, en lando de suno, de flamo kaj amo povis naskiĝi tiu Festo, kiu ligas la du plej noblajn sentojn de la homo: la Amo al la Belparolo kaj la Amo al la Belvirino. Unu subtenas la alian, unu plibeligas la alian. Literaturo sen Amo estas bildo sen koloroj; Amo sen delikata esprimo estas multekosta metalo kaŝita en gango.

Same kiel la Katalunaj Floraj Ludoj helpas al la disvolviĝo, al la konservo, al la ornamo de via nacia lingvo, same la Esperantaj Floraj Ludoj helpas al la pliriĉiĝo, al la firmigo, al la plenfino de nia kara lingvo Esperanto. Stultuloj ofte ripetas, ke lingvo artefarita neniam povos posedi literaturon. Ili mokas niajn poeziojn, kiujn cetere ili neniam aŭdis; ili mokas niajn aktorojn, kiujn cetere ili neniam vidis. Ili venu al la Kataluna lando, ili partoprenu tiujn grandajn festojn, kiujn vi tiel bele scias efektiviĝi; ili venu legi la verkojn de niaj premiitoj; ili venu aŭskulti viajn elokventajn paroladistojn; ili venu por vidi la prezentadon de la admirindaj teatraĵoj, kiuj naskiĝis en via medio: Ili tiam eble komprenos ke Esperanto ĉesis nun esti artefarita lingvo, ke, parolita de miloj kaj miloj da homoj, skribita de plej diversaj aŭtoroj, prilaborita de plej malsamaj inteligentoj, kvazaŭ elskulptita kaj modelita de plej kontraŭstaraj literaturaj tendencoj kaj penadoj, ĝi akiris vere nun la rajton al la vivo kaj la spiron de lingvo de granda popolo.

FREDERIC PUJULÀ, *Prezidanta parolado, IVaj Floraj Ludoj*

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam okaze de milita stato la vivo en Barcelono estis haltigita, mi havis la honoron, en tiu ĉi urbo kaj en tiu ĉi sama teatro, prezidi antaŭ vi feston de katalunaj Floraj Ludoj kiuj devis, sed ne povis, okazi tie. Hodiaŭ mi havas la honoron paroli al vi en la loko de nia forestanta prezidanto de tiu ĉi festo de Esperantistaj Floraj Ludoj. Tiam ni festis la lingvon de niaj prapatroj; nun ni festas la lingvon de niaj pranepoj. Tiam ni flugis al la idealo de beleco kiel katalunoj; hodiaŭ ni flugas al regno de poezio kiel homoj. Nenion ni devis forlasi el ni mem por paroli al vi per la lingvo per kiu mi nun uzas vian atenton, sed male, ni nur bezonis vekti la internaciemon, kiu dormetas en la koro de ĉiu bona kataluno. Mi staras antaŭ vi pli kataluna ol antaŭe, ĉar mi *min* sentas pli homa; kaj mi estas certa ke la eminenta polo, kiu spirite nin prezidas, subskribus tiujn miajn vortojn kaj sentojn.

Mi nur miras, ke mi, la plej humila inter ni ĉiuj, estis elektita por resumi la feston anstataŭ la eminenta doktoro Leono Zamenhof, kies manuskripto bedaŭrinde ne ĝustatempe venis al nia komitato. Mi penas klarigi al mi la kaŭzon de tiu por mi tiel granda honoro, kaj mi nur scias vidi ĝin en la amikeco, tiu granda nobla sento kiu tiel bone floras en la ĝardeno de Esperantismo, kaj tiel nature kiam per ĝi ni levigas tre alten en festoj kiel la nuna. Granda amikeco efektive kunigas min al nia Prezidanto; amikeco ebligita de la povo de nia lingvo. Se nun ankoraŭ la scienco ne sufiĉe progresis por nuligi la distancon inter la korpoj, nia lingvo jam nuligis ĝin por la spiritoj; se la persono de nia prezidanto ne troviĝas ĉi tie, mi povas tutbone reprezenti lian spiriton pro nia amikeco, kiu kvankam ne povas fari la miraklon, ke mi diru al vi la belajn aferojn, kiujn li mem certe estus dirinta, tamen permesas al mi, sen antaŭa interkonsento, danki kaj gratuli en lia nomo la Reĝinon kaj ŝian kortegon, la honorigan aŭtoritaton kaj la inspiritajn poetojn.

Neniu pli bona scenejo por nia laborado, ol tiu de ĉi tiu urbo, kie ni havas la ĝojon okazigi niajn kvarajn Florajn Ludojn. Ĝi estas kvazaŭ simbolo de la fundo kaj de la formo de nia movado. Unuflanke, la beleco de la fraŭlinoj, kiuj nin prezidas, la graveco de la aŭtoritatuloj elektitaj de l' popolo kiuj nin akompanas, reprezentas la poezion, la altecon, la homecon de nia celo. Aliflanke, jen, por reprezenti nian movadon, la naturo, kiu nin ĉirkaŭas; jen la okroj akutaj de la abruptaj rokoj kiuj distranĉas la maron kiel laŭ rando de pontoj; jen la festa gaja bluo de la akvoj tra kiuj la facilrompeblaj praŝipoj alportis al ni sangon kaj civilizacion novan. Tiuj okroj kaj bluo kunigas en nia imago kaj konsistigas la verdon sur kiu malfaldiĝas la veloj de la ŝipo de nia idealo..

JOSEP GRAU CASAS, *Prezidanta parolado, VIII^{aj} Floraj Ludoj*

En nia spirito estas ĉiam vivanta la rememoro pri la efiko de la katalunlingvaj Floraj Ludoj, kies unuaj paŝoj estis rigardataj kun ekridemo de tiu sama popolo kiu post duonjarcento ŝuldas al ili la plenan revivigon, la realtigon de sia lingvo; kaj tia rememoro estas la kaŭzo kial ni, esperantistoj kaj katalunoj, atendas de niaj internaciaj Floraj Ludoj, en kiuj la kulturado de la lingvo estas farata en la plej altaj kampoj de la intelekto kaj de la spirito, ke ili havos la povon venki la eblan ekridemon de la indiferentularo, kiun certe ni timas neniel, kaj kiun ni forte pravaj kuraĝas moki.

En niaj Floraj Ludoj montriĝas ĉiujfoje, ke ne nur la interkompreno lingva inter la esperantistoj de tre apartigitaj landoj estas absoluta, sed ankaŭ ke niaj poetoj trovas en la fleksebleco kaj admirinda belsoneco de Esperanto la esprimilon plej akuratan, kiu povas, tra la interspaco kaj super la lingvaj limoj kaj diverseco de popolaj moroj, vibrigi niajn korojn akorde kun la sentoj de Poezio, kiuj al ni katalunoj sonas mirige kaj kortuŝe, tiel same kiel la verkoj de niaj naciaj poetoj, sentitaj kaj esprimataj tra nia natura lingvo. Kaj tio okazas—konsideru tion, se vi volas, kiel veran miraklon—ĉar en la esperanta internacia lingvo povas resonori tiel same kiel en la kataluna lingvo la klasikaj kaj ĉiam vivaj agordoj grekaj kaj latinaj.

Ni ĉiuj ĝuis la belaĵojn de la premiitaj verkoj, kelkajn el kiuj vi ĵus aŭdis, kun tia sento de admiro, kun tia ravata impresio, kiel se la legataj verkoj estus verkitaj en la respektiva patra lingvo.

Ĉu vi imagas kian grandan forton ni povas ĉerpi en tiu spiriton altiganta konstato? Ni tial kredas ke se la Floraj Ludoj katalunlingvaj povis, venkinte rapide la unuamomentajn ekridojn, reentronigi la malnovan katalunan patran lingvon, nur tial ke ĝi parolis rekte al la koroj ĝin forgesintaj, la internaciaj esperantlingvaj Floraj Ludoj kondukos al la starigo de la nova interpopola lingvo tial ke ĝi katenas la malproksimajn korojn per mildaj ligiloj ne imageblaj de tiu ne kredanta ankoraŭ je la diverslingva interkompreno.

Via promesoplena juneco, bela Reĝino kaj ĉarmaj Korteganinoj, samideaninoj niaj; via protekto kaj aprobo, respektindaj aŭtoritatuloj; via atento kaj scivolemo, popolo de la senmorta urbo; via konstanteco kaj entuziasmo, karaj gesamideanoj kiuj kun mi estas feliĉaj ĝui tiujn ravantajn momentojn, kuraĝigas nin tiel, ke, eĉ se ni povus ekdubi iam pri la efiko de la ĉefe spirita valoro de nia ideo, ni povus retrovi en via kunesto la apogon por restarigi la unu momenton ekŝanceliĝintan entuziasmon nian.

MARIAN SOLÁ, *Sekretaria Raporto, IX^{aj} Floraj Ludoj*

Dolĉa, bongusta frukto tiu kiun distilas la arbo de la Poezio! Benataj estu ĝiaj kulturantoj, kiuj proponas ĝin al ni malavare, kaj per siaj kantoj kiujn la espero heligas, igas nin ami la vivon kaj la mondon! Benataj estu tiuj, kiuj la disigitajn kaj malordigitajn lingverojn scias tiel akorde kunligi kaj ordigi ke ili sanĝiĝas en ravantan muzikaĵon! Benataj estu tiuj, kiuj per siaj poemoj, jen vidigas al ni la ĝojojn kaj triumfojn de la homa vivo, jen plorigas kaj kortuŝas nin per la hela priskribo de niaj malgajaj sentoj, jen vibrigas nian animon per la ektuŝo de ĉio nobla, bela kaj sankta!

Kiu malkonos vian altan potencon, Poezio? Kiu ne submetiĝos bonvole kaj sorĉite al via alta trono? Kiu animo restos surda al viaj vokoj tiel ĝentile kaj plaĉe faritaj? Kiun spiriton ne revigos viaj regulaj agordoj?

Per lingvo ritmita, per lingvo imagoplena kaj poezia, sin turnas la homoj al Dio, ĉar neniu alia formo de lingvo estas inda je Lia potenco!

Per lingvo kantanta, milde sonanta kaj karesema, la patrino lulas sian infaneton karan!

Per lingvo, kiun la ama pasio igas poezia, la amanto malfermas sian koron vunditan kaj diras sian konfeson al la amatino!

Per lingvo simpla kaj naiva, kun ritmo hela kaj kortuŝanta, la nacioj elmontras sian puran animon, kaj sian kuraĝan ekfloron en la unuaj momentoj de sia ekzistado!

Per lingvo forta kaj esprimpotenca, kiun la patrujamo igas batala, la popoloj ekkantas kun siaj himnoj la fidelecon kaj eternan amon al sia patrolando!

Lingvon preskaŭ forlasitan, malnoviĝintan, preskaŭ mortintan jam, vi poetoj, vi kantistoj, per la sorĉo de viaj ritmoj, per la vibrado de viaj lirikoj, kaj per la enblovo de via spirito, elprenis el la dormantaj cindroj, kaj revivigis ĝin pli juna, pli bela, pli sangoriĉa kaj pli vivipova ol antaŭe!

Nia kataluna lando ŝuldas al vi nepridubeble la ekziston kaj konsevon de sia propra lingvo, la lingvo de niaj prapatroj, la lingvo de niaj kronikistoj, la lingvo de niaj reĝoj, de niaj gloroj kaj triumfoj, nia plej kara heredaĵo!

Miraklon similan, mirindaĵon saman, ni postulas de vi, poetoj kaj artistoj; de vi, ni volas, ke en la korpon de nia kara lingvo internacia, ke en la korpon de nia estimata Esperanto, vi enblovu vian spiriton, soifantan de amo kaj beleco!

Ni volas ke per via talento kaj per via majstreco, vi faru el ĝi, antaŭ la okuloj de la mondo, la plej disvastigitan, la plej senmortan, la plej ŝatatan lingvan kreaĵon.

Kaj tion vi povas fari!

Bibliografio

STRANGA HEREDAĴO. H. A. Luyken. Eldonis: Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1922.

Dika volumo, kun 320 paĝoj, bele presita kaj bindita, enhavanta interesan romanon originale verkitan en tre bona stilo. S-ro Luyken estas unu el la plej bonaj esperantaj stilistoj kaj lia valoro, kiel aŭtoro de verkoj *originalaj*, estas ankaŭ tre atentinda.

PRETER LA VIVO. Julio Baghy. Eldono de «Literatura Mondo», Budapeŝt, 1923.

Plaĉa volumeto, 124-paĝa, enhavanta preskaŭ ĉiujn poemojn de la eminenta poeto Julio Baghy, el Hungarujo, lastjare premiita per la Natura Floro en la Internaciaj Floraj Ludoj. Ĉiuj verkoj de Baghy premiitaj en nia poezia festo estas troveblaj en tiu ĉi volumo. Niaj legantoj jam konas la poetan talenton de nia karega hungara amiko, ĉar «Kataluna Esperantisto» jam kelkfoje honorigis publikigante liajn verkojn. Julio Baghy estas ne nur tre lerta versfaranto, sed vera poeto, plena de emocio, sento kaj sincereco. Li estas ĝenerale konata kiel unu el niaj plej bonaj poetoj kaj lia verkaro restos por ĉiam gloro de la esperanta literaturo.

UNUA LEGOLIBRO. Doktoro KABE. Eldonis: Esperanto Verlag Ellersiek & Borel, Berlin, 1922.

160-paĝa volumo, enhavanta gradigitajn legaĵojn kun frazlibro kaj modelojn de leteroj.

Legante tiun libron, ni ne scias ĉu admiri pli la belegan kaj klaran stilon de nia fama aŭtoro «Kabe» aŭ la lertecon per kiu estas elektitaj la diversaj anekdotoj kaj rakontoj; tiom ili estas interesaj kaj agrablaj. Ni rekomendas tiun bonegan legolibron, super ĉiuj aliaj.

ABISMOJ. Jean Forge. Eldonis Hirt & Sohn, Leipzig, 1923.

Libro 150-paĝa, romano originale verkita. Kun intereso oni legas la 15 ĉapitrojn de tiu romano, kies aŭtoro celas kontentigi la guston de la moderna leganto, «kreante ion, kio similas kaj samvaloras la hodiaŭan naci-lingvan romanon laŭ stilo kaj enhavo, verkante ion nuntempan en la Esperanto de la jaro 1887». La stilo estas efektive bona kaj la verko plene rekomendinda.

JOHANO LA BRAVA. Aleksandro Petofi. Traduko de K. de Kalocsay. Eldono de «Literatura Mondo», Budapeŝt, 1923.

Tre plezure oni legas tiun «Popolfabelo en versoj» de la fama nacia poeto hungara Petofi. Krom la valoro de la originalo, oni ĝuas la ĉarman

tradukon faritan de la sperta tradukanto de versoj, kaj ankaŭ originala esperanta poeto, K. de Kalocsay. Li havas riĉan stilon kaj veran arton kaj majstrecon en la tradukado. «Johano la brava» estas unu el la plej legindaj versaj tradukoj.

JOSEPH RHODES KAJ LA FRUAJ TAGOJ DE ESPERANTO EN ANGLUJO. Angle verkita de John Merchant (Prezidanto de B. E. A.), esperanten tradukita de Louise Briggs. Aĉetebla: Brita Esp. Asocio, London.

Tre bele bindita libro, klare presita, 141-paĝa, kun 20 ĉapitroj priskribantaj la vivon de la eminenta pioniro de Esperanto en Anglujo. Unuavide, ŝajnas ke nur al la angloj povas esti speciale interesa tia detala biografio. Sed por ĉiuj esperantistoj tiu libro estas plene interesa kaj instrua. Kuraĝon oni sentas en si, legante la priskribon de la modela vivo de la fama esperantisto angla. La redaktado estas majstre farita de la eminenta prezidanto de la Brita Asocio S-ro Merchant, kaj la traduko konstante elspiras la mildecon kaj korektecon de la stilo de Louise Briggs, la talenta verkistino kaj simpatia virino tre konata de la kataluna samideanaro.

Tiaj biografiaj libroj ordinare ne atingas grandan atenton, sed tiu ĉi estas ĉiel leginda kaj laŭdinda.

LEGENDOJ, A. Niemojewski, el la pola originalo tradukis Bronislau Kuhl. Kun antaŭparolo de Antoni Grabowski. Dua eldono. Eldonisto: Hirt & Sohn, Leipzig, 1923. Vol. 2 de la kolekto «Internacia Mondliteraturo».

LA NIGRA GALERO, Wilhelm Raabe, el la germana originalo tradukis Fritz Wicke. Dua eldono Hirt & Sohn, Leipzig, 1923. «Internacia Mondliteraturo», n-ro 4.

EL LA «CAMERA OBSCURA», Hildebrand, el la holanda originalo tradukis H. C. Mees. Hirt & Sohn, Leipzig, 1923. «Internacia Mondliteraturo», n-ro 5.

LA MIRINDA HISTORIO DE PETRO SCHLEMIHL, Adelberto de Chamisso, el la germana originalo tradukis Eugen Wüster. Hirt & Sohn, Leipzig, 1923. «Internacia Mondliteraturo», n-ro 7.

NUNTEMPAJ RAKONTOJ, G. P. Stamatov, el la bulgara originalo tradukis Ivan H. Krestanoff. Hirt & Sohn, Leipzig. I. M. n-ro 8.

HEBREAJ RAKONTOJ, Šalom-Aleĥem Perce, el la hebrea originalo tradukis Is. Muĉnik. Hirt & Sohn, Leipzig. I. M. n-ro 9.

TRI NOVELOJ, A. S. Puŝkin, el la rusa originalo tradukis D-ro Andreo Fiŝer. Hirt & Sohn, Leipzig, 1923. «Internacia Mondliteraturo», vol. 10.

“Kataluna Esperantisto” mortas...

Kun granda ĉagreno ni sciigas al niaj legantoj, la katalunaj esperantistoj kaj kelke da karegaj eksterlandaj amikoj, ke tiu ĉi numero de nia gazeto estas la lasta...

Nia kara «Kataluna Esperantisto», pri kiu, kompreneble, ni mem ĉiam evitis fari laŭdojn, sed kiun, en la nuna momento, ni trovas tiel bona, plaĉa kaj estiminda, mortigas kvazaŭ subite, sufokata de nespirebla aero.

Diversaj kaŭzoj kunefikas por malebligi la ekziston de «K. E.» Financaj malfacilaĵoj, milfoje aluditaj, premas la Katalunan Federacion, kiu dum dek jaroj subtenis nian gazeton; troa ŝarĝo pezas sur la homaj ŝultroj de nia Redaktoro, kies fervoro estas neelĉerpebla sed ne sufiĉas tamen por venki la laciĝon; grava kaj malagrabra malhelpo estas por la funkciado de nia Direkta Komitato la fermiĝo de la «Enciklopedia Popola Ateneo» (kiu malavare donas loĝejon al la “Kataluna Esperantista Federacio”), fermiĝo okazinta laŭ ordono de la Madrida registaro; ĝena komplikaĵo fariĝas ankaŭ la regimo de milita cenzuro por la gazetaro, al kiu ankaŭ “K. E.” devas submetiĝi...

Pro la diritaj kaŭzoj, do, “Kataluna Esperantisto” ne plu aperos. Ni firme esperas, tamen, ke estos eble aperigi anstataŭ ĝi malpli vastan presorganon.

La malapero de “K. E.” neniel influas la bonan disvolviĝon de la preparaj laboroj de nia proksima kongreso, nek la regulan funkciadon de la Federacio, nek la organizadon de la X^aj Internaciaj Floraj Ludoj, kies “Alvokon” kaj plenan liston de premioj ni publikigas hodiaŭ. Eĉ ni diros ke, en la fundo de la koro, ni havas la esperon ke la malapero de nia gazeto ne estos definitiva. Eble ĝia morto ne estos vera morto, sed nur vintra dormado...



La nuna numero estas submetita al la milita cenzuro.

Ni esprimas nian dankon al la bona samideano S-ro Luis Santamarina, polica oficisto, kiu afable helpis nin en tiu ĉi afero.

VERKOJ DE PUJULA


AĈETEBLAJ ĈE K. E. F.

Vocabulari
Català-Esperanto



PREZO: 3 PTOJ.

Vortaro
Esperanto-Kataluna



PREZO: 3 PTOJ.

La Grafo
erarinta

Ĉarma originala rakonto. Volumeto tre lukse presita, kun desegnaĵoj de Torné Esquius.

PREZO: 0'50 PTOJ.

Naivulo -
Karabandolo la
plugisto -
Fiŝkaptisto
kaj Rigardanto

Originalaj rakontoj. kun desegnaĵoj de Torné Esquius, Lukse presita volumeto.

PREZO: 0'50 PTOJ.

AL LA GRUPOJ NI FARAS 25 % DA RABATO

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉ (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (i), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba

LA
article determinatiu
el, els
la, les

J
(sona ĵ)
forma el plural
faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN
sufixe per a formar
el femeni
sinjorino, reĝino
katino, leonino

O
terminació
substantiu
lakto
urbo
komerco
(comerc)

A
terminació
adjectiu
blanka
antikva
komerca
(comercial)

I
terminació verb
(infinitiu)
kompreni
laboci
komeraci
(comerciar)

E
terminació
adverbial
klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

	AS	IS	OS	US	U
	<i>temps present</i>	<i>temps passat</i>	<i>temps futur</i>	<i>mode condicional</i>	<i>mode imperatiu o subjunctiu</i>
Mi	skribas	skribis	skribos	skribus	skribu
Jo	escrie	escrigii	escriuró	escriuria	escrigi

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti* i les formes de participi *ant, int, ont* (actiu: present, passat i futur) i *at, it, ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta, jo estic esribint. La letero estis skribata*, la lletra fou escrita.

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En Esperanto, tota paraula que reb l'acció d'un verb (complement directe) va seguida de la lletra **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius s'expressa per mitjà de les preposicions *al, de, kun, per, sur, super, sub, en, ekster, tra, trans, antaŭ, post, inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.